


eLIBRO

# LA DEKA LOGO



INKO

## **LA DEKA LOGO**

*Kompilis: Ana Manero*

*Ilustris: Pedro Ullate*

*Reviziis: Antonio Valén*

© de la apartaj verkeroj ĉe la autoroj

© de la verko ĉe Hispana Esperanto-Federacio

## **eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-204-2**

*inko@omnibus.se*

*http://www.omnibus.se/inko*

JULIO 2003

## ENHAVO

<i>Miguel Ángel Sancho: Enkonduko</i>	5
<i>Jorge Camacho: La Verda Sizifo</i>	8
<i>Miguel Fernández: Al la lirika Liven</i>	10
<i>Sten Johansson: Nifulo</i>	30
<i>Flo Martorell/Liven Dek: Sur muzika pado</i>	35
<i>Gonçalo Neves: La kalsoneto</i>	43
<i>Antonio Valén: Novelistaj trajtoj de Liven Dek en "Marta kaj Maria"</i>	49
<i>Jorge Camacho: "Miguel Gutiérrez Adúriz, pinte kaj ponte"</i>	61
<i>Trevor Steele: Bonŝanco</i>	64
<i>Gonçalo Neves: Esperanto kaj socia respondeco</i>	81
<i>Giulio Cappa: Post la fina venko</i>	87
<i>István Ertl: Kafo preta</i>	127
<i>Gian Carlo Figliera: Superherooj kaj herooj en la "Nibelunga kanto"</i>	130
<i>Gerrit Berveling: Al Liven Dek</i>	139
<i>Gonçalo Neves: La nigra kato</i>	140

<i>Abel Montagut: La dek ses fundamentaj malreguloj</i>	144
<i>Antonio Marco Botella: La popolstilo en la poezio de Lorca</i>	164
<i>Ana Manero: Tro maldare</i>	187
<i>Toño del Barrio: Testo: Ĉu vi estas bona Migelukologo?</i>	190
Fotoalbumo	204

MIGUEL ÁNGEL SANCHO

## ENKONDUKO

**D**e antaŭ multe da tempo mi priserĉas la kialon pro kiu iam mi lernis Esperanton, kaj ĉefe ankaŭ la kaŭzon, kiu tenas min ene de ĉi tiu afero, konsiderante ke, almenaŭ de neatenta vidpunkto, ĝi aspektas tempo-perdo kaj malatingebla celo.

Fine mi konkludis, ke la veraj kialoj neniel rilatas al la progreso de la homaro, eĉ se tio multe zorgigas min, sed al miaj propraj personaj streboj kaj viv-ideologio. Nia movado ne brilas pro la granda kvanto da homoj, kiuj sin dediĉas al helpo de aliaj homoj; tamen ĝi baziĝas sur konstanta opono al ĝenerala maljusteco. Certe tiun pozicion multaj defendas kun granda entuziasmo, kaj ja vere ili rezistas la ĝeneralan malkomprenemon de la socio sen falo en fanatikan amon al simboloj, kaj kun granda digno kaj fiero pro la historia heredaĵo ricevita.

Jen la personaj valoroj de la plejmulto movadanta en nia afero: kohero kaj persisto. Nekomforta sinteno, ĉar elstara eco de nia nuntempa socio estas facila cedo antaŭ malfacilaĵoj. Sed ne ĉiuj agas laŭ tiuj principoj kun simila kuraĝo, sammaniere, aŭ dum same longa tempo. Kelkaj, sen forgesi la pasintecon, gvidas per vojo certa al

la futuro, kaj tion ili faras sen atendi honorpagon aŭ ĉefrolon. Kelkaj senĉese laboras ne gravas ĉu pri "elitaj" aŭ "pli malaltaj" taskoj. Kelkaj ne publikigas sian genion kaj klare montras, ke talento valoras nur se donata al la aliaj.

Se kiam junulo, mi vidintus nur fanatikulojn aŭ honor-serĉantojn, verŝajne ankaŭ mi nun kondukus tiel, aŭ eble simple mi ne plu partoprenus la movadon. Tamen, en tiu momento, kiam ajna evento profunde influas vian vivon, mi povis vidi kiom brilas la grandeco, de multaj "normalaj" individuoj. Dank' al tiuj mi daŭre restas en Esperantujo, kaj miaopinie iĝis pli bona homo. Tial mi deziras esprimi, kiel amiko, mian respekton al Miguel Gutiérrez Adúriz. Ĉar ne tiom gravas la influo de unuopulo en socian fenomenon, kiom ties pozitiva spuro sur la pensmaniero de aliaj homoj.

Omaĝo post morto ne estas omaĝo, sed provo mildigi nian doloron. Kolektiva omaĝo ne sufiĉas en multaj kazoj. Rilate ĉi tiun ni rajtas esti trankvilaj: Miguel konkretigas sendube per sia persono tiujn trajtojn, kiujn mi priskribis antaŭe, kaj bonŝance li ja vivas, kaj ni ĉiuj esperas, ke tiel estos longe.

Mi ne kompetentas kiel literatura kritikisto, kaj kapablas nur kiel leganto priskribi la gravan laboron de Miguel sur tiu kampo, evidenta ne nur pro la influo de lia kvalita verkado, sed ankaŭ ĉar li ebligis la eldonon de

multaj ali-aŭtoraj verkoj. Por tio li eĉ riskis sian propran kapitalon.

Pluraj generacioj de novaj parolantoj kaj aktivuloj citas lin sen dubo, kiel la ĉefan referencon de iliaj komencoj. Ekde la sepdekaj jaroj li estas unu el la homoj, kiuj plej multe influis la hispanan esperanto-movadon. Tial mi profitas ĉi tiujn liniojn, kiujn mi havas la honoron redakti kiel nuna prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, por publike agnoski la grandan dank-ŝuldon, kiun la hispana esperantistaro havas al li.

La aŭtoroj, kiuj volonte partoprenis la eldonon de ĉi libro deziras regali lin per siaj verkoj. Sed kiam ĉio finiĝos kaj silento anstataŭos la aplaŭdojn de ĉi omaĝo, restos ĉe ni kaj ĉe la venontaj generacioj la valoro de lia vivo-verko.

J O R G E C A M A C H O

## LA VERDA SIZIFO

*(rondelo kun suplemento)*

Vortaras, verkas, varbas, viglas  
Miguel Gutiérrez — Liven Dek.  
Esperantuj' dekliven? Ek!  
Ju grandas tasko, li malpigras.

Li movas onin kaj mem vibras.  
Ĉi tial (eminenta pek')  
vortaras, verkas, varbas, viglas  
Miguel Gutiérrez — Liven Dek.

Kaj kvankam jam dek Sferoj migras  
al la Babel-bibliotek'  
(au ĉu prefere nifen?) . . . fek!!!

plu vortas, verkas, varbas, viglas  
kaj miajn ŝtalajn nervojn tiklas  
Miguel Gutiérrez — Liven Dek.





MIGUEL FERNÁNDEZ

## AL LA LIRIKA LIVEN

U nue li estis "iu el Santander"<sup>1</sup>. Fine de mia progresiga e-kurso en Madrida Esperanto-Liceo, la instruisto ekzercocete proponis al ni esperantigon de iu nefacila kaj samtempe suka hispana beletraĵo. Mi, kiel poezi-ama andaluzo, elektis ĉefverkon de universala samlandano, la nobel-premiito Juan Ramón Jiménez. Temas pri *Platero<sup>2</sup> y yo* (*Platero kaj mi*), emblema titolo de poezia prozaĵo en la hispana literaturo. Kaj mi tradukis kaj tradukis . . . Kaj iam, kiam mi transpone elbalbutis mi ne scias kiom da paĝoj el la internacie laŭdata beletraĵo, kun la naivo, kaj tamen, verŝajne, la freŝo, kiujn donas la nesperto, iu saĝulo avertis min pri tio, ke iu el Santander jam delonge entreprenis la esperantigon de *Platero y yo*. Kaj mi "englutis" miajn fruajn atencojn kontraŭ esperanta beletra bongusto kaj ekprojektis novajn murdojn kontraŭ literatura belo. Tiu "iu el Santander", poste mi sciis, estas nia Miguel Gutiérrez Adúriz, alino-

1 *Santander*: Urbo en la Nordo de Hispanio ĉe la Kantabra Maro, ĉefurbo de la Aŭtonoma Komunumo Kantabrio.

2 *Platero*: Hispane, "Arĝentaĵisto", nomo de iu el la plej renomaj azenoj en la hispana beletro.

me Liven Dek, unu el la nun plej fratecaj el miaj frataj amikoj.

Ankaŭ la dua —virtuala— kontakto kun nia priomaĝato havis lirikan fonon. Tiuokaze kadris la gazeto *La Kancerkliniko*, kie aperis versoj livendekaj. Se mi ne mismemoras, aferis i.a. la poemo *Estas vorto*:

Estas vorto  
 mensforto  
 tra risorto  
     laringa.  
 Estas vorto  
 homforto  
 el retorto  
     pensinga.<sup>3</sup>

Mirinde! Tiom da *ort*-oj kaj *ing*-oj, karno kaj sango de postaj kontribuoj al *Ibere libere*, poem-kolekto, kiu, malgraŭ reakciuloj —vivu ili, kiuj plifirmigis nian progreseman bataladon por la nuntempa esperanta belo! — starigis novan percepton pri la esperantaj poeziaj rimedoj, kaptis min, ravis min, fronte al la ekstertempecaj, eksaj, dekadencaj, gurdaj, teruraj ordinaraĵoj abortaĵoj el la plimulto de niaj verdamondaj bardaj lucernoj.

Kaj mi ekamis la esperantan poezion. Kaj mi ekpoezis surbaze, se ne, ĝuste, de tiuj *ort*- kaj *ing*-eroj, tamen

3 *Ibere libere*, Pro Esperanto (Vieno), p. 86.

similtembre. Mia poemo *Pri la angor' sonora*, parto de *Ampoemaro*, mia kontribuo al *Ibere libere*, konservas la rezulton de tia tiama penado miaflanka por akiri al mi tian poezian proponon. Ĉi-kaze, temas pri aliteraciaj ore-oj, ora-oj, are-oj, oro-oj ktp. Jen ĝi:

Angore,  
angore fora.

Fore  
de la nektar' amora,  
skvare,  
odoras mi dolorojn  
kaj amarojn.

Min mare  
erodas la stertoroj  
de niaj amo-jaroj.  
Kaj rore  
la rememoroj  
elrodas mian koron,  
min forvoras.

Langvore  
la vesper-horoj  
korodas mian ploron,  
min traboras.  
Kaj la aŭror' purpura  
terure kaj terore

kolorojn akaparas,  
 dum mi, angoro pura,  
 obskure kaj angore,  
 ho ve!, angore, fore  
 de vi,  
 dolore,  
 rore,  
 plore,  
 skvare,  
 mare  
 kaj amare  
 vin avaras.<sup>4</sup>

Miguel — ho, Miguel! —, probable neniam mi diris al vi, sed vi konstituas la ekon de miaj poeziaj e-vibroj pere de viaj eniĝoj en niajn originalajn ekspluatindajn sonorojn kaj latentojn.

Kiam mi legis la poemon *Estas vorto*, mi ricevis tian impreson, ke mi komentis kun miaj madridaj gekunuloj, ke mi sentas min ĉiel-transportita de la versoj de iu Nordiano, Liven Dek, kaj Juan Carlos Ruiz Sierra —ho, ve al niaj fruaj murditoj de la morto! — klarigis al mi, ke temas ne pri eksterlandano, sed pri hispano: Miguel Gutiérrez Adúriz, "el Santander". Kaj mi ekkontaktis vin nome.

4 *Ibere libere*, Pro Esperanto (Vieno), p. 107.

Jes, Miguel, tiam mi sendis al vi mian tradukon de la Lorca-aĵoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*. Kaj vi, laŭkutime, donis al mi, krom kvanto da valoraj sugestoj, kvanton da stil-konsiloj, kiujn mi poste sekvis kun la intenco redoni kaj la kor-batojn kaj la etoson de la Lorca-a universo. Poste temis pri mia esperantigo de la poemoj de nia adorata Miguel Hernández. Mian tradukan antologion de lia poemaro, *Poeto de l' popolo*, vi superrigardis kaj aprobis. Kaj mi ĝojis pri tio, ke vi min helpas klopodante ekspluati kaj disvastigi la alportojn — izolajn, mirinde izolajn kaj sendankajn— de niaj pioniroj, la majstroj Régulo kaj de Diego. Ja nur vi, Miguel, pontis tian poezian agadon inter tiuj eksterordinaraj robinsonoj kaj ni, nuntempaj modestaj "idoj" kaj studentoj de iliaj literaturaj prodaĵoj.

Pli poste, ni kolektiĝis en tian unikan —amikan— rondon, nun de multaj nomatan *Ibera Skolo*, tian miraklon de amikeco, solidaro, kaj kundivido de poeziaj anim-trempoj, ankoraŭ vivan preter Esperantujo mem. Mi ne povas ne revenigi en nin resumeton de viaj plej trafaj lirikaĵoj, kadre de nia komuna laboro *Ibere libere*:

Tie vi diris, i.a.:

Vi  
kaj  
mi,

kilometroj  
de vivo  
kune.  
Vi  
kaj  
mi  
sune,  
laboro;  
amoro,  
lune;  
kaj intere,  
senpaŭza batalo  
por kunvivado.<sup>5</sup>

Jen versa minimumismo talente aplikita al iu ama kuno ("vi kaj mi") splenda kaj intensa, sed, forme, mirinde seka, sena je ĥimeraj flugoj kaj bombastoj, algluita al la tero, al la ĉiutago, al tiu nepra kaj nekomprenebla "batalo por kunvivado" aŭ doloro, kiun implicas ĉiu vera amo. Doloro foje proksima al nego de la eblo ami en paco kaj en kuno, kiel en la jenaj kortuŝe nudaj versoj samkolektaj:

Sur la tombon  
de nia amo,  
kiel ĉiudimanĉe,

5 *Ibere libere*, Pro Esperanto (Vieno), p. 77.

jam de tri jaroj,  
mi lasis hodiaŭ  
mian faskon de floroj  
apud la via.<sup>6</sup>

Spireblas el ĝi ia metafizika, ekzistadisma, neeblo realigi la amon, kontentigi la soifon ami longe-daŭre. Sed, aliflanke, ankaŭ fizikaj aŭ sociaj baroj kontraŭagas la amon, la liberon ami ekster ajna limo, la rajton memi pri ajna ama emo, super konvencioj kaj artefaritaj-hipokritaj moraloj. Tiele, la lirika Liven denunce pripaladinas, ekzemple, la figuron de samseksamulo sinmortigita pro socia sieĝo, per la jenaj superbaj versoj, kadre de unu el la neabundaj vere bonaj sonetoj — ”sonegoj” nomas Gonçalo Neves tiuspecajn rare altkvalitajn majstraĵojn— iam ajn verkitaj en la lingvo zamenhofa, *Al viro nomata Suzana*:

Kaj kiam evidentis la tumoro,  
klakadis vipe langoj senkompataj,  
diskrevis alibioj akrobataj,  
kaj sekvis la sieĝo per angoro.

Ferocis lante, gute, la rigoro,  
minacis vojoj raspaj kaj malglataj,

6 *Ibere libere*, Pro Esperanto (Vieno), p. 80.



pasioj oceanis onde hataj  
en streta senrevena koridoro.

Kaj fuĝis homo for el ostracismo,  
drivante sur la eĝo de tranĉilo,  
ĥaosen tra marasma paroksismo.

Kaj ŝnuro, nodo, stranga okulbrilo,  
redemptaj elementoj ĉe l' abismo,  
fariĝis ombro ĉe la pendumilo.<sup>7</sup>

Sed, se ama pasio ĉe la lirika Liven ŝajnas fatale drivi al nerealiĝo, aliaj formoj de amo: amikeco, patrineco k.s., trovas, ĉefe ĉe lia prozo — tiomfoje poezi(ec)a teme, takte, ritme— oran plenumon pere de esence bonaj roluloj, pretaj al plejaj sinoferoj kaj humanaj prodaĵoj. Tion priparadigmas kelkaj rakontoj — kiaj rakontoj! — el lia kontribuo al la komuna — kvaropa — novelaro *Ekstretoj*. Kiom da neforgeseblaj travivaĵoj! Kiom da kunvibroj! . . .

Miguel, samkiel ĉiuj membroj de nia grupo, ŝatas ne nur la skriban poezion, sed — mi dirus eĉ precipe — la parolan. Miamemore freŝas ankoraŭ bildoj de iama kunbusado al Valencio por partopreno en iu e-renkontiĝo. Parolinte pri ĉio priparolinda, ni komencis reciti versojn. El la zamenhofa *Hamleto*. El la mezepoka hispana juvelo

7 *Ibere libere*, Pro Esperanto (Vieno), p. 93.

*Poema de Mío Cid*. El nia propra produktado . . . Unu el la hispanaj poemoj, *Las fuentes de Granada* (*La fontanar' Granada*), de la andaluzo Francisco Villaespesa (1877-1936), aparte kaptis la lirikan Liven. Ĉi-poeme la tuta magio de la noktoj de Granado, mia naskiĝ-urbo, ties atmosfero, ties parfumoj, ties sonoroj delice rekreiĝas, kunfluas en kresĉendon de sensismo, de plastiko vortabilda, de eskvizita belo. Iom poste mi esperantigis tiun perlon de la skolo nomata *modernismo* —hispana kaj hispan-amerika poezia movado kreita de la nikaragvano Rubén Darío (1867-1916) surbaze de ia sintezo de la francaj parnaso kaj simbolismo—, kaj nun, Miguel, mi diskonigas ĝin ĉi tie, omaĝe al vi, kaj emocie rememorante tiun kor-karesan epokon de versoj kaj esperoj.

*La fontanar' Granada . . .*

*Kia sono,  
en splenda nokto stele parfumata,  
pli sombre suferigas ol ties ĝema tono?*

Jen, svage ensorcĉita, kuŝas ĉio  
en fluidaĵo el arĝento luna.  
Kiam la brizo portas aromojn je lilio,  
la akvo-frisko rolas kiel juna  
plej refreŝiga mano sur frunton febro-svenan.  
La akv' estas l' animo de l' urbo. Tiun gardas  
dumnokte; al la rita

silento flustras gemajn  
legendojn, plue vivajn trans la forgeso spita,  
kaj en serenaj noktoj, kiam la steloj ardas,  
palpitacias kiel korego travundita.

La akvo-voĉo sanktas!

Se vi la kernan ritmon de ĝia son' divenos,  
la di-parolon iam sendube vi komprenos.

La akvo guzlas; dio per ĝi misterojn kantas.

*La fontanar' Granada . . .*

*Kia sono,  
en splenda nokto stele parfumata,  
pli sombre suferigas ol ties ĝema tono?*

Fontan' ĝardena, gugle, suspiras en rosumo  
de floroj, atendente, ke revo-man' velura  
elmetu ĝian helan ŝprucaron al la luno,  
por doni al la nokto gemojn el songo pura;  
kaj tiam disperligas marmoren, ho!, sen fino  
sian kolier-doton de riĉa sultanino.

Sin ĵetas kelkaj akvoj kun rumoroza bruoj;  
kiel torento-eĥoj rul-falas vigle folaj,  
trenante sur aleoj, per vive splenda fluo,  
kadavrojn, ve!, de rozoj en ŝaŭmo-ĉerkoj bolaj.  
Alia akvo ade surmure glitas lante  
kaj sur heder-tapiŝo ploretas plenda-kante  
kvazaŭ ĝi poiome, tra ia vundo streta,

sangus ĝis fina perdo de sia viv' diskreta.  
Blindas aliaj; svarmas  
en ilin stel-argento, kiam la steloj larmas.  
Aromon likvan, freŝan, diluas la aero.  
La nokto humid-riĉas tiel, ke oni fridas.  
La akvo, ploras, ĝemas, suspiras, kantas, ridas,  
kaj, super ĉi eterne murmura atmosfero  
regas la serenadoj ronkaj de la rivero.  
La sango de Granado fluas kun tiaj fontoj,  
kaj en la mut' profunda de l' noktoj kalm-ebriaj,  
sensante ĉi muzikon sur la antikvaj pontoj,  
ni sensas ilin flui ankaŭ tra vejnoj niaj.  
Somnolas la spirito ĉe ŝpruc-muzikaj ĉarmoj,  
ni trinkas la raviĝon de fontoj-spiroj skandaj,  
kiu nin enpenetras per tralikiĝoj lantaj  
kaj tra la okul-paro fuĝas per kaŝaj larmoj.

*La fontanar' Granada . . .*

*Kia sono,  
en splenda nokto stele parfumata,  
pli sombre suferigas ol ties ĝema tono?*

Apartan — eble la ĝisnunan lastan grandan— okazon, kiam nia grupo preskaŭ kompleta kunis kaj ni prezentis nin publike —jen plurope, jen unuope, jen prelege, jen debate, jen seminarie, jen aktore . . . — e-kadre, konstituis la nordia somera e-festivalo KEF-2000, en Helsin-

ko. Kiel superbe! Kiel forgesi tiom da belaj momentoj? Jes, Helsinke kulminis niaj streboj, sed jam antaŭe, en februaro samjare, nia Riitta Hämäläinen, responsulino pri la kultura programo, venis Hispanien, por kontroli la iradon de la prepar-laboroj —nu, verŝajne, tio estis, krom vero, ĉefe preteksto (mirinda preteksto) por kuni kaj kundividi orajn travivaĵojn—, kaj granda parto el ni madridumis (vine, promene, trinkeje, muzee, restoracie, parke, poeme ktp ktp ktp) dum unu tuta semajno, kiun poste István Ertl, trafe, baptis ”la semajnaĵo”. Nu, en unu el tiuj ankoraŭ sopirataj noktoj, ni kunsidis en bela kelo de trinkejo en la koro de Madrido, antaŭ tablo, kie ne mankis diversaj bongustaj pladoj kaj vinoj. Kiom da ŝercoj, rido, viv-ĝojo, poezio . . . ! Nu, tiukadre, mi legis poemon miapluman —*Vilaĝo en kalko*— kreitan ĝuste por tiu okazo kaj dediĉitan al Riitta Hämäläinen, nia Nordia muzo. La poemon —al mi tre karan— mi poste ne diskonigis al plia publiko. Ĝin mi konservis seneldona, ĝis alvenos speciala momento. Nu, tiu momento jam alvenis — kiel oportuna! kiel justa! —: omaĝo al nia Miguel (Gutiérrez Adúriz) aŭ Migeluko aŭ Guterres aŭ Liven Dek . . . *Vilaĝo en kalko* volas esti ia provo priakvareli per versoj diversajn aspektojn de blanka andaluza preskaŭsenhoma vilaĝeto en la fora Granada regiono nomata ”La Alpujarra” dum tuta tago —de mateniĝo al mateniĝo— surbaze de la lumo kaj de la tieaj diversaj

lumo-ŝanĝoj, nome ĝi volas esti strat-post-strata promonado tra lumo sud-eŭropa. Sed temas pri promenado ne nur ekstera, sed ankaŭ interna, trae de nia anima vilaĝo, kie reproduktiĝas la elaj heloj, ombroj, klaroskuroj. Sen ajna intrigo: nur pejzaĝo, akvareloj —are—, krom disaj vilaĝano kaj vilaĝanino, jam preskaŭa parto de la pejzaĝo mem. Temas ja pri humila provo de alproksimiĝo al la skolo, kiun la franco Paul Valéry kaj la hispanoj Juan Ramón Jiménez kaj Jorge Guillén nomis ”pura poezio”.

Odoro je mateno. Monto-dorse,  
jen la vilaĝo —viva betleĥemo<sup>8</sup>,  
neĝa kolombo aŭ meringo— songas.  
Unuaj hel-radioj  
mute disŝiras lastajn nokto-tulojn,  
glatigas vojon al aŭbado koka  
— aŭdaco troa el kratero praa—,  
sonora ĉiel-arko, kiu bolas  
— kresĉende—. Kokeriko:  
fulmo el fajro sojle de la tago.

Odoro je mateno. Maten-ruĝo.  
Jen svelta kaj memcerta

8 *betleĥemo*: miniatura blanka dometaro kun stalo, kripo, paŝtistoj, La Tri Reĝoj ktp. simbolanta la naskiĝon kaj naskiĝlokon de la legenda Jesuo.

aŭroro ŝutas dis sian kulminon  
— oran pulvoron— valen kaj terasen,  
kvazaŭ diino —ia Persefona—  
emerĝa el tenebro —el Hadeso—  
en perfidado de la propra morto.

Kaj pluas la muziko.

Kaj ekas la kunkanto ĉiutaga:  
rivera kaj pasera,  
bova kaj popla, buba, laborila,  
vira, ina, anima, kora. Ĥoras  
plue la vivo en la tag-fandujo.

Ĉestrate, klaroskuroj. Kaj subite  
ega puŝo de suno ŝprucas —pura! —  
kvazaŭ gejsler' el amo, kiu sagus,  
atingonte la alton de foresto.

La lumoj kaj la ombroj arabeskas,  
ludas, amoras kaj priĵaluzias  
la ĵaluzplenajn kriojn de la helo.

Kapsikaj rozarioj ĉefenestraj:  
seka vundaro sur sukera blanko;  
ĉebalkone, dianta firmamento:  
freŝaj makuloj sangaj. Sube, sole,  
ronrone ĉe strat-muro  
buligas sin la suno,

sunumas sin la suno dormo-kuŝe.  
Vekadas sin la suno  
kun la palpebroj pezaj, nur por ĝui,  
nur por leki la virgon de la kalko.

Zenita horo sonas.  
Tenora sonorilo nun soloas  
bronzan arion rondan, apogean  
— tagmezon ludas, laŭdas—,  
kaj tremas la skeleto preĝej-tura,  
kaj ĉio poiome iĝas penda  
je blinduma sun-flagro,  
pretigas sin nirvani,  
dilua en la mar' siaĥimera.

Zenita horo. Pleje  
subtile sin disverŝas.

Zenita horo: soro:  
ascendo vertikala de l' espero,  
dum estingiĝas birdoj, vidoj, veoj . . .  
kaj la muroj soifon sekrecias.  
La lumo disbranĉigas  
la multkoloran palmon de sia ekzistado  
kaj pri rebriloj revas, songâs; rongâs  
sian deziron flosi ĝisorgasme  
en la suko de sia pom-esenco.



Eksfelisa, la tago sin disstreĉas,  
dissternas sin ĝisrande de l' vilaĝo.  
Grapol-plenaj frondozaĵoj vito-laŭboj  
superporde proponas siajn perlojn  
kaj reton da neeblaj frisko-fontoj.

Soporo ĝenerala. Poiome  
dampiĝis la naturo  
preskaŭe ĝis la limoj de l' nenio,  
preskaŭe ĝis la limoj de la memo,  
kie kun ĝuo aŭ teruro eblas  
trasensi la ĉirpadon de l' silento.  
(Ho, iam mi posedis nur ĉi muton!  
Nur ĉi silenton ŝaktan kaj mistikan!  
Nur ĉi sensono frosta min posedis!  
Pli frue amo-frapo  
ene de mi fortranĉis miajn rozojn,  
forpelis miajn merlojn,  
sufokis miajn voĉojn:  
mi fulgadis).

Vespero sin enŝovas.  
Vespero el sukveno.  
Vespero aŭ medolo de la flavo,  
kiun enspiras li, dum soras fumo  
el lia cigaredo.  
Li sidas pordo-sojle:

lia rigardo, ie — en kiu paradizo  
perdita? Kiutempe? —  
Led-haŭta, beret-porta kaj aĝe sendifina,  
li, reĝo de la ŝvito,  
de la plugilo kaj la kordurojo,  
sidas surseĝe. Lia vivo arkas  
inter la korto kaj la olivarboj.  
Sed iam, unu fojon, li certe havis revon:  
li stelon prirevadis kaj interne  
iluminiĝis plene, ĝis la bordoj,  
kaj en la stela lumo li perdiĝis.  
Por li la ter' printempe  
aspektas virgulino  
— tim-trema, bon-odora —, kiu, nuda,  
en la river-spegulo sin rigardas  
ameme, mam-karese,  
amor-invite: tente.  
Li havas sole nur unu aspiron  
— pasion el knab-aĝo—: endormiĝi  
en la ombro de tiom da libero.  
  
Ien-tien la tremoj  
de muĝa frosta suno sieĝita,  
vundita de la tempo, lante ondas.  
  
Kaj la vespero pace sin malŝpinas  
en plej serena lumo barboporta.

La brizo — aŭ kareso — kalme rojas  
rabante for kotonon,  
kiun obstina valo vane provas  
reteni ĉe la dorso. Fine haltas,  
ke montoj, plorsalikoj, domoj, pensoj . . .  
en ĝia sino klare konturiĝu.  
Kaj, kiel adiaŭo, kiel ĝiso,  
pejzaĝen greftas sin la nostalgio.

La ombroj jam limakas  
randojn de pratoj, padoj, monto-gorĝoj . . .  
dum la suno rezistas per rebriloj  
en la viv-provo lasta de la tago.

Kaj, kvazaŭ seka trunko,  
jen staras ŝi, la dorson sur strat-muro:  
portreto blanka-nigra,  
kiun flavigis miloj da vesperoj.  
Ŝiaj memoroj gustas tiel foraj,  
ke ili preskaŭ gustas je nenio,  
ŝin preskaŭ plu ne tuŝas.  
Ĉi tie ŝin la nuno  
atingas ĝisokule, forpuŝante  
ŝiajn sopirojn el la elvokejo.  
Tiom ŝi memas, ke ŝi nur mortadas  
ĉi tie ĉiutage,  
dum ŝiaj songoj sidas sen flugiloj.

Ĉi tie ĉio estas  
sereno kaj ĉagreno kaj atendo  
kvieta — sed de kio? —.  
Atendo, dum la vivo lante giras.

Sed la vespero ne rezignacias.  
La vespero sin ŝminkas — povra! povra! —  
per pudroj el krepuska vermiljono.  
Kaj la vespero nun afektas junon,  
sian kanceron maskas — ho, la brava! —,  
sin kreas re, prokrastas sian morton  
ĝis la momento tuja,  
sublima, efemera,  
kiam la tago falos  
truita dis de siaj propraj lumoj.

Profunda nokto. Vagas la obskuro  
— vaporiginta nigro —  
zigzage laŭ la strata labirinto,  
kolektas siasinen ŝaŭman nubon  
el revoj kaj el songoj vilaĝanaj.  
Kaj, jam graveda, la obskuro sidas,  
atendas la miraklon noktomezan,  
atendas la momenton, kiam, fola,  
ĝi transiĝos en bluan senmakulan,  
stompitan kaj subtilan . . .

Ektagiĝo.

Odoro je mateno. Montodorse,  
jen la vilaĝo — viva betleĥemo,  
neĝa kolombo aŭ meringo — songas.  
Unuaj hel-radioj  
mute disŝiras lastajn nokto-tulojn,  
glatigas vojon al aŭbado koka  
— aŭdaco troa el kratero praa —,  
sonora ĉiel-arko, kiu bolas  
— kresĉende —. Kokeriko:  
fulmo el fajro sojle de la tago.

(Ĉio scintilas kaj disfalas poste  
kaj sin kroĉas kaj ligas kaj almetas  
al faktoj alitempaj,  
al songoj aliesaj kaj sensencaj.  
Formiĝas tiel vivo-historio).

S T E N J O H A N S S O N


## NIFULO

**L**a blua planedo turnadis sin lace ĉirkaŭ sia akso. Komenciĝis pala nokto efemera en eta homa setlejo ne malproksime de maro preskaŭ sensala kaj senviva. Kontraŭ atmosfero malsanece violruĝa siluetis nigraj karbonkombinaĵoj de mezalta ordo. Post kelkaj horoj la ruĝa stelnano mortonta denove montros sin super la malebena horizonto por bombardi ĉi mondon per siaj mortigaj radioj ultraviolaj, sed ankoraŭ regis nokto indulga.

Mi eliris el la setlejo por sperti la naturan atmosferon de la planedo en ties malmulte manipulita formo. Pro nesufiĉa alkitimiĝo ĝi ja efikis iom ebriige al homa organismo, tamen mi ekŝatis tiun etan vertiĝon. Mi sciis, ke la kolegoj rigardos min kun suspekto, kiam mi revenos al la homa loĝejaro kun rideto feliĉa, eble stulta, sur miaj lipoj. Tamen, mi ne povis rezigni tion. Mi simple devis eliri. Eble ĉi planedo envultis min?

Super mia kapo jen kaj jen scintilis aliaj steloj de nia galaksio — kaj de milionoj da aliaj. Mi atingis maldensejon inter la hirtaj vivoformoj emergantaj el grundo mola, muskeca, spicodora. Al mia vido prezentis sin gol-

feto kaj strando, al kiu peze plaŭdis plumbe grizaj ondetoj el venena likvaĵo. Friska vento alblovigis la gasmiksaĵon propran de ĉi forgesinda gruzero en la universo kaj plenigis per ĝi miajn pulmojn. Aĥ! Kia stimulo! Kia vertiĝa volupto!



Subite io kontraste interrompis la violruĝan ĉielbrilon. Verda stelo eklumis kaj rapide alproksimiĝis de fore, ŝajne el galaksio trans multaj lumjaroj. La stelo kreskis, ŝvelis, grandiĝis kaj fine manifestiĝis en formo de verda nifo, kiu sensone alteriĝis sur la strando antaŭ miaj gapantaj okuloj. Malfermiĝis pordeto, kaj aperis vivanta organismo el dio-scias-kiu mondo. Ĝi senhezite plandis kontraŭ mi sed haltis je kelkmetra distanco.

El kiu ajn galaksio devenis la nifulo, ĝi ĉiuokaze estis tajlita tre simile al ni homoj. Du kruroj, du brakoj, unu kapo. La sola vere fremda trajto estis, ke sub la flarilo ĝi portis iaspecan nigran broson, kies celo restis al mi nebula. "Kredeble ĝi estas io, kion ili uzas dum la pariĝado", mi pensis, kaj plu profundiĝis en konsiderojn, kion tio povus signifi pli konkrete.

Mi vekigis el la revoj, kiam la nifulo komencis komuniki al mi. Kompreneble mi ne parolis ĝian lingvon, nek ĝi la mian. Tamen okazis komunikado! Mi deduktis, ke ĉi vivulo evidente devenas el civilizo tre evoluinta. "Kian mirindan komunikilon ili inventis!" mi pensis. "Ĝi ja funkcias tute glate, sen obstinaj baroj, kaj eĉ preskaŭ sen neologismoj."

"Jes, ĉu ne linde kaj mirinde?" komprenigis al mi la nifulo. "Kaj ni eĉ kreis ĉi tion", li plus kaj enmanigis al mi platan objekton rektangulan. "Ni nomas ĝin *libro*", li informis min. "Bonvolu malfermi ĝin!"



Post iom da esplorado mi efektive sukcesis malfermi la aĵon ĉe unu flanko. Ekvidante la enhavon, mi spertis veran miraklon. Iel laŭ nekonataj ondoj komuniĝis en mian cerbon rakontoj absolute novaj, logaj, fascinaj. Kiel okazis tiu transcenda transsendo, mi ne sukcesis diveni. Tute klare evidentis, ke mi jen traktas kun supera inteligento, kapabla estigi psikajn efikojn vere elstarajn, fojfoje eĉ preskaŭ harstarigajn. Kaj kiajn rakontojn peris al mi tiu objekto nomita "libro"! Temis pri aliaj mondoj, aliaj vivuloj, aliaj ĝuoj ol la niaj. Kia riĉaĵo! Tamen tio ne estis ĉio. Kelkaj eroj de la "libro" eĉ rakontis al mi pri la estonteco. Mi preskaŭ ne kuraĝis enlasi tiujn aŭgurojn en mian cerbon, sed ankaŭ ne eblis rezisti. Mi jam estis plene sub la povo de ĉi verda nifulo el la spaco.

"Bela, ĉu ne?" diris la broso-porta verdulo. "Kaj ĝi estos via posedaĵo kontraŭ nur kelkaj steloj!"

Mi ne plu kapablis konsideri. En mia zumanta cerbujo nestis unu sola penso — ke mi akiru tiun objekton, kiun la nifulo ofertis al mi. Ial li nomis ĝin "sfero", kvankam en miaj okuloj ĝi ŝajnis klare rektangula paralelepipedo. Strange! El kiu dimensio li efektive alvojaĝis?

Tuj vendinte la unuan rektangulan sferon, li eldonis duan. Poste trian. Poste . . . mi ne plu scias kioman. Finfine mi staris tie sur la strando kun la manoj plenaj de deko da plataj sferoj kaj la kapo plena de mirindaj, sor-

ĉaj voĉoj, kiuj flustris al mi la plej ekzotajn aventurojn. Jes, efektive deko da!

Ĝuste en tiu momento la unua arko de la sundisko ekbrilis ĉe la horizonto kaj tuj ŝanĝis la ĉielan koloron en akre kapsike ruĝan. La verda nifulo antaŭ mi tuj ektermis kaj komencis ŝrumpi, dum li videble misfartis pro la sunradioj. Antaŭ ol plene neniigxi li tamen savis sin en sian nifon kaj forvojaĝis, sendube reen al sia hejmo ie for en la tempo-spaca teksaĵo.

Konsternite de la nokta sperto ankaŭ mi stumblis hejmen por sobriĝi en mia apartamento en griza antaŭurbo ĉe la Baltiko, perdinte plenan galaksion da steloj, sed gajninte ion nemezureblan, ion plenan de kosma klarvido. "Li vendis dek sferojn" mi murmuris irante tra la picea arbaro. "Li venis de kie? Li ekvendis . . . Li vendis dek . . . Li vend . . . ek . . . Li ven . . . de k . . . Li ven . . . Dek . . ."

## SUR MUZIKA PADO

*Prezentas kaj komentas Flo Martorell, rakontas Liven Dek (Miguel Gutiérrez)*

**D**um KEF en Helsinko en la jaro 2000 Miguel Gutiérrez Adúriz (Migeluko por la intimoj) prezentis kantojn al infanoj . . .

*Li faris tion mirige bone!*

*Miguel klarigis al mi ke dum sia juna aĝo li muzikis, kaj eĉ ludis en bando adoleske.*

*Mi ŝatus fari al vi detalan prezenton pri tiu kaŝita face-to de la vivo de Miguel, famkonata jam pro siaj verkoj sub la kaŝnomo "Liven Dek" kaj ankaŭ pro la sciencfikcia serio "Sferoj".*

*Mi ŝatas la rilaton ĉe Miguel inter literaturo kaj muziko.*

*En diversaj projektoj jam eblis ĝui lian talenton (tradukoj en la subgrunda kompilo kaj La Bambo en la albumo JoMo friponas!, ktp . . .)*

*Mi provis intervjui Migelukon, kiu ne tiel facile ellasis la informojn en la komenco (eble pro troa modesteco) kaj finfine intervjuo fariĝis ĉi pasia ekflamiĝa rakonto:*



Muziko ĉiam estis esenca parto de mia vivo. Fakte, mia fola koro, kaprica drumisto kiu foje blusas foje rokenrolas, ĉiam diris al mi ke la unuaj lecionoj pri ritmo kaj harmonio mi ricevis en la ventro de mia kara patrino. Tuttage, dum ŝi kuiris, purigis la plankon, aranĝis la litojn aŭ gladis, ŝi kantis per eksterordinare bela kaj kortuŝa voĉo. Kiom multe da kantoj mi senkonscie lernis de ŝi en mia infanaĝo.

Kvankam, onidire, mia unua muzikilo estis maraketo, t.e. beb-tintilo, mi devis atendi 12 jarojn ĝis malnova klasika gitaro, flankenlasita de mia riĉa kuzo, venis al miaj

NOTO: Vidu pli da bildoj en la "Fotoalbumo", ek de p. 204

manoj. Tiam, krom la tiu-epokaj komiksaj herooj, en mia buba koro regis Beatles, Kings, Herman's Hermits, Brincos . . .

Per tiu olda gitaro mi komencis komponi miajn unuajn kanzonojn, tiel sukcese, ke oni invitis min partopreni en regiona festivalo. Mi ne gajnis. La unua premio iris al infaneto kiu "ĉarmis" la juĝantaron, la dua iris al sufiĉe bona grupo kiu "protestis kontraŭ milito", kaj mi, kaj mia amkanto, "Yolanda", ricevis la trian premion.

Io neatingebla, revo ene de revo, absoluta kimerio estis elektra gitaro. Tial eĉ ne unu sekundon mi dubis kiam prezentiĝis la ebleco aĉeti tiun sopiratan instrumenton. Eĉ la lasta cendo de miaj ŝparoj forflugis por akiro de malnova elektra gitaro, kiu, tamen, ne sonis . . . ĉar mi ne havis amplifilon. Tiu nepra elemento venis poste. Oni varbis min por juna ensemblo *Los Alacranes* (La Skorpionoj), kaj mi devis subskribi amason da tratoj kaj tiel enŝuldiĝi preskaŭ por eterne aĉetante de uzuristo malnovan amplifilon.

Sabate, dimanĉe kaj festotage ni ludis en dancejoj kaj teatroj. Kiel feliĉa tempo. Mi eĉ plienŝuldiĝis per la aĉeto de Fender-gitaro.

Mia dua grupo estis *Los Golpes* (La Batoj), kiu sukcese ludis kelkajn el miaj komponaĵoj. Ĉi grupo registris du diskojn kaj estis lanĉita en la tuta lando. Bedaŭrinde mi



ne partoprenis en la dua epoko de la bando, kiun mi devis forlasi por "soldat-servi", tuj kiam mi fariĝis 17-jara. Feliĉe, dum la tempo de soldat-servado en la aer-armeo, mi lernis Esperanton.

Poste, reveninte hejmen, mia vivo "serioziĝis", mi dediĉis mian tutan tempon al studado de kemia inĝenierio, kaj venis la fino al mia muzik-aventuro. Se diri la veron, nur dufoje mi kantis publike okaze de E-renkontiĝoj. La unua en TEJO-kongreso en Fredericia (Danio), kaj



la dua en la 3a ILF de LF (Literatura Foiro). Plurfoje mi komponis, ĉiam en Esperanto, jes, sed ŝajne ĉio perdiĝis. Kie vi estis tiam, Flo?

Nu, venis la tempo krei la libro-serion "Sferoj" kaj verki, komence nur sciencfikciajn novelojn, poste poemaron por "Ibere libere", novelaron por "Ekstremoj". Tamen, dum mi verkis, la muziko akompanis min, ĝin oni povas senti en iuj el miaj noveloj. Ekzemple en "Rompita koro", kie "La kvar sezonoj" de Vivaldi signas la tempon de la elnodiĝo.

Nura muzika agado en la okdekaj jaroj estis la kreado de kantoj por infanoj, stimulita de la projekto "Infan", lanĉita de LF. Tamen, en tiu tempo, mi plurfoje transloĝiĝis de unu ekstremo al la alia de Hispanio, mi tro



solis, kaj, denove, preskaŭ ĉiuj akumulitaj komponaĵoj perdiĝis.

La lasta parto de mia rilato al muziko ekis en la jaro 1999, kiam, eskapante el la frida vintro finna, venis al Madrido la Generalino, Riitta Hämäläinen, por konvinki la membrojn de la Ibera skolo partopreni en la Kultura Esperanta Festivalo, KEF, okazonta en Helsinko en la jaro 2000.

En la kelo de trinkejo, abunda manĝo, vinoj kaj diversaj alkoholaĵoj spicis la stomakojn kaj la etoson. Tie konturiĝis la skeĉo, bazita sur novelo de Gonçalo Neves, kiun poste la iberskolanoj prezentis en Helsinko. Tie la Generalino difinis la diversajn taskojn plenumotajn de Jorge Camacho, Miguel Fernández, Antonio Valén, Gon-





çalo Neves kaj mi. Pluraj aliaj iberskolanoj partoprenis: Abel Montagut, Joxemari Sarasua, Ana Manero . . . Ridoj, multaj ridoj, maldecetaj ŝercoj, vino, multe da vino. Miguel Fernández kaj mi kantadis "kiĉajn" kantojn el la sesdekaj jaroj. Pli! Pli! estis la ĝenerala devizo. Kiel radiis Riitta! Eĉ larmoj ne mankis. En certa momento, parolante pri eventuala koncerto por infanoj, mia lango perfidis min, kaj mi konfesis ke iam mi verkis kelkajn kantetojn. Kia mispaŝo! Reveninte al mia urbo, mi devis traserĉi miajn malnovajn paperojn, ĝis fine kelkaj kantoj aperis.

Nu, en mia prezento al infanoj, mi perceptis pozitivan reagon de la gepatroj, kaj eĉ Flo instigis min al plua komponado kaj eventuala pretigado de k-disko. Nu, kion fari? Mi tre bone sentas min ĉirkaŭata de publiko, sed registri diskon . . .

Sincere dirite mi ŝatus denove aktive rilati al muziko. Fakte en Helsinko mi transdonis kanton al "Esperanto Desperado". Kaj mi eĉ tradukis kanton de la grupo Traŝ-Bog por la k-disko "Esperanto subgrunde". Finfine, kiu scias, eble mi povos verki tekstojn laŭmende, aŭ eĉ en venonta kompilaĵo de Vinilkosmo oni povos aŭskulti min. Jes, sendube allogaj proponoj.

*Tuj post tiom brila kaj ekscitiga rakonto, apenaŭ reveninte el la emocioj, Miguel jam forkuris al siaj multnombraj taskoj.*

*Nu, vi ĉiuj estas atestantoj: atendu ricevi surprizojn de Miguel en la venontaj monatoj.*

*Kion li rezervas por ni ĉiuj kaj por la esperanto-muzik-kulturo?*

*Suspenco kaj mistero . . .*

G O N Ç A L O N E V E S

## LA KALSONETO

**K**ara amikino,  
Mi promesis al vi rakonti la odiseadon de kalsone-  
to. Jen do. En iu mateno de la pasinta semajno, mi kom-  
encis pendigi sur la sekiga ŝnuro la vestojn ĵus ĉerpitajn  
el la lav-maŝino. Vi ankoraŭ memoras, mi supozas, ke  
mi loĝas sur la sesa etaĝo; ke mia ŝnuro longas inter la  
fenestroj de du ĉambroj — la mia kaj tiu de mia filino; ke  
ambaŭ fenestroj rigardas al aperta skvaro, kie la loĝantoj  
de mia konstruaĵo promenigas siajn hundojn matene kaj  
vespere; ke la suno tie frapas brule dum fasko da horoj  
posttagmeze; ke mi aparte ŝatas mian ŝnuron pro ĝia  
sekigo rapida.

Nu, mi do komencis ilin pendigi. Veston post vesto, vi  
konas la metodon. Venis la vico de iu tuko, tute ĉifita pro  
la premoj kaj turnoj de l' maŝino. Mi disfaldis ĝian vas-  
ton, por ke ĝi povu ĝui la varman spiron de l' suno, kaj  
— prezentu al vi — el ĝia sino elfalis kalsoneto, kiu tie  
eltenis kaŝe la impeton de la lavo. Mi ĵetis al ĝi manon,  
sed vane. La ŝirmilo de l' hontindaĵoj flugis suben kun la  
trankvilo de sia pezo liliputa kaj eksidis sur la ŝnuro de  
l' kvara etaĝo. Ĝi staris iom ŝancele pro la falo, sed poste



haltis, kun fiera nazo, ĝuante la panoramon el la nova belvedero. Mi restis iom ĉe la fenestro, admirante la kuraĝon de l' vesto, atendente blovon kiu aerumus ĝian vanon kaj ĝin faligus sur la skvaron — sed neniam zefiro nek brizo tie pasis. La aero sinkis en profunda siesto, kaj neniu folio tremolis.

Atendente blovon mi venis al cerbumoj pri la eblaj destinoj de tiu kalsoneto. Plejverŝajne baldaŭ ventos, mi pensis. En tiu okazo, venos la humiliga falo, mi kuros suben, reakiros ĝin, kaj finita la aventuro. Triumfo cezara. Kaj se ne blovos? Dua akto. En tiu okazo, mi eliros al miaj taskoj, kaj iu dommastrino — aŭ pli bone, iu mastrumistino, ĉar la dommastrinoj ĉi-kvartalaj estas matronoj kun fiera nazo kaj do ne zorgas pri sekigo de vestoj kaj similaj pestoj — certe venos fenestren kaj vidos la fremdan ŝtofon. Tiam la mastrumistino certe ĝin plukos. Sekve la akto allasos plurajn scenojn. Eble la mastrumistino pro skrupula premo pendigos la kalsoneton sur la apog-relo en la enirejo de l' konstruaĵo, kiel oni ordinare faras al perditaj vestoj, kaj en tiu okazo mi nepre ĝin trovos revenante hejmen, ĉar mi ĉie rekonus intiman veston kiu la unua atestas la flusojn kaj malflusojn de mia vireco. Aŭ eble la mastrumistino havas estimon al la mastro — sceno klasika, ĉiam dezirata de la mastroj kaj timata de la mastrinoj — konas la vaston de liaj koksoj, kiuj hazarde havas la saman enverguron kiel la miaj, kaj

tiam mi sidos en amaso da embaraso, ĉar la zorgema intendantino certe cedos al la tento uzukapi la vagabondan kalsoneton en la garderobo<sup>1</sup> de l' mastro, kaj ĝin mi neniam plu revidos.

Mi cerbumis kaj cerbumis konstante, sed da vento neniom. Mi ankoraŭ prenis iom da tempo super etimologiaj konsideroj, rimarkante ke en la ŝirmo de ĉiuj kalsonetoj sidas haŭtoj senaj je kaloj kaj ankaŭ mukozoj indaj je sonetoj. Kaj dume la tempo forfluis sen blovoj. Kion fari, mi pensis, mi eliros al miaj taskoj, kaj tiu fanfara vesto baldaŭ flugos ĝis la grundo de l' skvaro. Nenion ĝi gajnos de tio.

Mi do eliris al miaj taskoj. Pri kiuj taskoj temis mi jam ne memoras, sed tre absorbaj ili certe estis, ĉar la kalsonego ne plu venis en mian kapon dum la tuta daŭro de l' tago. Eĉ vespere — kiam mi entreprenis la rikolton de l' vestoj, jam ĉiuj bone sunumitaj — ne venis al mi en la memoron la dizertinto. Mi plukis de la ŝnuro ĉiujn pecojn, ilin sternante laŭ klasoj sur la lito, kaj nur fine de la tasko, kiam mi komencis fermi la fenestron, io flagris en mia cerbo. Unu el tiaj sparkoj kiuj faras ŝalton en cirkvitoj ŝajne senkonektaj, kiam la okuloj esploras ob-

1 garderobo: ŝranko, ŝrankaro, kamero aŭ alispeca fako aŭ ejo, kie oni gardas vestojn, kostumojn aŭ uniformojn. Ankaŭ la tuta vestaro, kostumaro aŭ uniformaro de homo, familio, trupo aŭ alispeca grupo.

jektojn kies parenceco fariĝas ĉiam pli klara. La kalsone-  
toj stake sternitaj sur la lito, jam krispaj pro longaj ho-  
roj da sunumo, la brizo kiu alŝovis la vesperon. Kalsone-  
toj, brizo — damne! Revenis al mi en la kapon la fuĝinta  
peco. Refarita la ŝalto! Mi apertis larĝe la fenestron kaj  
ĵetis rigardon al la ŝnuro de l' kvara etaĝo. Vaka. Mi es-  
ploris de supre la pavimon de l' skvaro, sed neniom da  
vestoj vrakaj. Sole iom da folioj, kiuj uverturis la autu-  
non. Ĉe tia svingo de la okuloj mi rimarkis la ŝnuron de  
l' partero. Kaj kion mi vidis? Jen kalsoneto flirtanta sur  
ĝi. Ĉu la mia? Kiel tio eblas? Ĉu nun de ŝnuro flugas ĝi  
al ŝnuro? Ĉu trairi la mondon ĝi volas? Ĉu gustumi la  
aspron de pluraj ŝnuroj, elmeti sin al aliaj manoj, por ke  
ili ĝin pluku kaj traceu al ĝi aliajn itinerojn?

Apenaŭ eblis tion kredi, sed ĝia sido sur tiu ŝnuro, sen  
la societo de aliaj vestoj, kaj ĝia senbrida flirto, kvazaŭ  
neniu pinĉilo ĝin katenus — ĉio igis min regajni la espe-  
ron. Se temis pri mia kalsoneto, ĝi certe estis nepinĉita,  
kaj ĉar la vento ŝajne blovis senhalte, mi nepre rekiros  
ĝin — dum palpebruma daŭro. Dirite, farite. Apenaŭ mi  
finis la cerbumon, ĝi forlasis la rifuĝejon kaj spiralis ĝis  
la pavimo de l' skvaro. Mi impetis suben laŭ la ŝtuparo  
— aŭ lifte, mi jam ne memoras tiun ĉi vanan detalon —  
kaj ĝin revenigis, kontenta pro la bela fino de l' aŭdaco  
de vesto kiu ludas en la historio de l' regnoj seriozan kaj  
decidan rolon.

Efektive, inter la realaj risortoj de l' historio troviĝas la am-aferoj kaj konkubecoj de l' moŝtuloj kaj regantoj. Arogas al si ludi rolon la manko de kuraĝo aŭ la troo da skrupuloj por komenci aŭ fini tiajn aventurojn, aŭ la frustruoj kaj rimorsoj venantaj de tio, ke oni ilin plenumas aŭ ne povas plenumi. Kaj kiu atestas la am-aferojn kaj konkubecojn? Kiu antaŭsentas ties varmojn kaj humidojn? Kiu sorbas la likojn kaj pufiĝas pro la prologoj kaj sekvoj de ĉiaj pasioj? Kiu? Tiu ĉi intima vesteto, unua konfidenculo de l' pudoraj mastoj kaj orificioj. Ĉion ĝi scias, kaj nenion oni povas kaŝi de ĝi. Kiam iu moderna Champollion sukcesos deĉifri la hieroglifojn de l' kalsonetoj, penetri ties lingvaĵon kaj esplori ties misterojn — tiam ni skribos la historion returne, kaj la legio de l' sanktuloj lavange reduktos sian etaton.

Hodiaŭ mi finas, sen malicaj demandoj — eĉ ne pensoj — pri la sekretoj de via kalsoneta tir-kesto.



ANTONIO VALÉN

## NOVELISTAJ TRAJTOJ DE LIVEN DEK EN "MARTA KAJ MARIA"

*Ne bela estas kara, sed kara estas bela*

### La aŭtoro

**M**ono mondon regas” diras konata esperanta pro-verbo el la ĉiam ŝatinda kaj ŝatata *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof. Ĉu vere mono mondon regas? Eble ne tute kaj eble ne ĉie: ĝi certe ne regas la mondon de la hodiaŭ preparolata verkisto: Liven Dek. Leginte liajn novelojn, ni povus dedukti, ke ne mono sed amo mondon regas, almenaŭ la mondon de Liven Dek.

Liven Dek — en Esperantujo eĉ la eternaj komencantoj scias, ke Liven Dek estas pseŭdonimo de Miguel Gutiérrez Adúriz — iniciatis la publikigon de sciencfikcio en Esperantujo. Li la unua havis la ideon regule aperigi sciencfikciaĵojn en la serio *Sferoj*, eldonita de Grupo Nifo. Kaj strikte inter ni, eble mi rajtas nun malkovri ”publikan sekreton”: Grupo Nifo estas nur plia pseŭdonimo de Miguel Gutiérrez Adúriz, ĉi-foje kiel eldonisto.

Liven Dek ne nur eldonis sed ankaŭ aŭtoris proksimume dudekon da noveloj. Aperis po du aŭ tri en ĉiu originala volumo de *Sferoj* (inter 1984 kaj 2000), ok en *Ekstretoj* (1997) kaj unu en *Mondoj* (2001).

## Marta kaj Maria

Mi elektis la novelon *Marta kaj Maria* (el la novelaro *Ekstretoj*) ĉar en ĝi klare konturiĝas ne nur la universo de la aŭtoro, en kiu amo gravegas, sed ankaŭ lia maniero rakonti, liaj metiismaj artifiko kaj liaj ŝiboletoj, nome liaj personaj stil-trajtoj. Leganto de kelkaj aliaj noveloj de Liven Dek kaj ioma konanto de ties krea universo, kiu hazarde legus fotokopion de *Marta kaj Maria*, kredeble povus facile diveni la aŭtor-nomon.

Se ni komparas kun aliaj noveloj de la sama verkisto, nur unu afero mankas en *Marta kaj Maria*: malbonuloj. Kutime malbonuloj — kiuj cetere estas evidentege malbonaj — aperas en la noveloj de Liven Dek, kaj ili ja ricevas oportunan punadon sed nur fine de la novelo: fakte leganto povus ektimi, ke la aĉaj, malnoblaj, fiaj kaj senkoraj malbonuloj ne ricevos fine justan vergo-baton, tamen tio simple ne eblus en novelo de Liven Dek — almenaŭ ĝis nun. Ĉiel ajn, la aŭtoro ŝatas ludi kun la leganto lerte sugestante, ke la malbonuloj venkos. Ankaŭ ekzemple en *Marta kaj Maria*, ĉar la tutan tempon ni

legas — kaj ne tro bone komprenas — pri "plano" kaj pri "konspiro", du vortoj kun timiga konotacio: ĉu la afero malbone finiĝos? Ne. Certe ne. Certe ne en edifa novelo de Liven Dek.

Tia nepra feliĉa fino eble rilatas al homa psika bezono, ke la mondo bonu, almenaŭ ĉirkaŭ ni. Kaj se ĝi evidente ne bonas, ni do tuj bonigu ĝin. Foje mi demandis la aŭtoron: "En viaj noveloj, malbonuloj ĉiam ricevas justan punon, ĉu ne?", kaj la reago de Miguel estis tuja, eĉ ne unu sekundon li pripensis la respondon: "Jes!", li diris senhezite. Kaj tuj aldonis iom longan klarigon pri amo kaj estetiko, pri justeco kaj harmonio, pri feblaj fortuloj kaj fortaj febluloj, kvazaŭ lia sinteno bezonus apogon.

Sed en *Marta kaj Maria* malbonuloj simple ne estas, ili komplete malaperis, eble ĉar temas pri novelo antonomazie ama.

## Metiismo

Same kiel en preskaŭ ĉiuj noveloj de la sama aŭtoro, ni scias nur parton de la tuto, t.e. ni scias malpli ol ni kredas scii. Nur fine de la novelo ni klare komprenas la intrigon, ĉar la mistero ne solviĝas ĝis la lasta frazo. Tio foje igas nin relegi kelkajn partojn, nun sub la nova lumo de la elnodiĝo, por plena kompreno; ekzemple en

*Marta kaj Maria*, kie la unua paragrafo akiras novan signifon dank' al la fina frazo. Tio montras la fajnan metiismon de Liven Dek, lian lertan manipuladon kaj dozadon de la elementoj, kiuj konsistigas la novelon. Evidente li tre bone scias, ke novelo ne permesas al verkisto tro multe da spaco por disvolvadi temojn, rolulojn kaj etosojn, malkiel romano. Li devas koncentriĝi sur aferoj esencaj, sen detalaj priskriboj kaj longaj rezonadoj, samtempe liverante la intrigon nur iom post iom, ĉiam laŭ la ĝusta takto, nek tro rapide nek tro malrapide. "Ŝajno trompas" skribas la aŭtoro: ankaŭ por ni, legantoj, ŝajno trompas ĝis preskaŭ la lasta linio de la novelo.

## Tensoj

En *Marta kaj Maria* ni ĉeestas transiron de is- al as-tenso oportune, elegante kaj ritme. Nia verkisto enkondukas la intrigon prezence, poste retrorigardas per paseo, kaj subite la novela tempo ree prezencas, tamen per tute nova prezenco ne rilata al la antaŭa (kiu fakte efektiviĝos nur fine de la novelo, tiel fermante cirklon). Eble novelo ronde perfekta spegulas amon ronde perfektan. Ni vidu kiel la aŭtoro lerte ŝanĝas tensojn kiam lia historio ekruliĝas, kompreneble nur rakontinte ĉion necesan pri la antaŭa vivo de la du fratinoj:

*”Tiam Marta kaj Maria jam aĝis kvardek, kaj la kruda enrompo de la soleco serioze minacis renversi ilian etan universon. Solaj, terure solaj, unu fronte al la alia, sen devoj, sen celoj, sen revoj . . .*

*Subite ajnan tagon, preteksto frapas je la pordo. Maria malfermas. Diketa viro, iom malalta kaj duonkalva, timide ridetas al ŝi. El lia obtuza litanio, Maria apenaŭ kapablas kapti lian nomon: Arnoldo. Atente ŝi aŭskultas la densan monologon de la viro. Liaj vortoj ofertas sekurecon: li estas asekuristo.”*

## Virinoj

En *Marta kaj Maria* fakte nur virinoj rolas. La figuro de Arnoldo, la edzo de Maria, ne estas subjekto sed objekto de la ago: vere agas nur la du fratinoj, dum la edza figuro konsistigas simplan necesajon de la scenaro por ebligi la interagadon inter la du virinoj.

Virinoj grave rolas en preskaŭ ĉiuj noveloj de Liven Dek: certe virino povus pli bone ol mi klarige verki pri tiu karakterizaĵo de nia aŭtoro. Mi riskus hipotezi, ke en la mondo de Liven Dek virinoj ĝenerale fortas kaj viroj ĝenerale feblas. Viroj papilie malkonstantas, sed virinoj eltenemas kaj brave elportas ajnan suferadon. En *Marta kaj Maria* same la patrino kiel la filinoj abnegacias:

*”’Rol’ de virino — bona mastrino’ lakone sentencis Kapitano Valdés, kiam kruela malsano kondamnis lian edzinon al longa konvalesko, kaj li decidis, ke Marta kaj Maria devas forlasi la lernejon kaj okupiĝi pri la hejmo. La du knabinoj akceptis sian destinon kun facila rezignacio. Dum jaroj ili efike plenumis eĉ la plej sensignifajn mastrumajn laborojn, kaj ilia diligento iĝis fere delikata pacienco, kiam post sia terure longa prostracio, la patrino, definitive alforĝita al la lito, falis en demencon.”*

## Kudrado

Grava ero de la intrigo estas kudrado. Nehazarde, la du ĉefrolulinoj vivtenas sin per kudrado kaj teksado: ja simbolo ili konscie aŭ nekonscie teksas kaj kunkudras ankaŭ sian destinon. Tial en la komenco la aŭtoro parolas pri *”iu turmentita Penelopa”*. Ni memoru, ke Penelopa malteksis nokte kion ŝi teksis tage por plu povi atendi sian amaton.

*”Iras kaj revenas la kudriloj. Marta aŭskultas ensorĉite la amor-spertojn de Maria kaj Arnoldo. Iras kaj revenas la kudriloj. De tempo al tempo la scivolo pelas ŝin fari asprajn demandojn, tamen kun subtila takto. Kaj tiel, ade, grade, dum iras kaj revenas la kudriloj, la seksa vivo de la paro nete konturiĝas”.*

Ritmo ira kaj reira, tre laŭa al la ŝajnaj flusoj kaj re-flusoj de la intrigo, al la paŝoj antaŭen kaj malantaŭen de la protagonistinoj, al la hezitoj kaj ŝanceliĝoj malantaŭ la deziro, malantaŭ la firma volo fari bonon, malantaŭ la firmeco de granda amo.

*”Kaj venas nova vespero, ornamita per pasamento el bunta kaj ekscita temo. Fadenoj bluaj, fadenoj flavaj, fadenoj ruĝaj, fadenoj malvaj. Babilo.”*

## Proverbemo kaj parolturnemo

Plia fadeno aperas en ŝlosila frazo de *Marta kaj Maria*, kiu resumas la tutan novelon: *”Fadeno iras kien kudrilo ĝin tiras”*. Nemirinde, ke proverbo kernas ĉe Liven Dek, ĉar proverbemo kaj parolturnemo estas unu el la plej karakterizaj trajtoj de nia aŭtoro, eble pro pedagogiaj kialoj. Esperantistoj kutime ne uzas proverbojn, parolturnojn kaj kliŝiĝintajn esprimojn pro simpla nesciado: niaj samlingvanoj ĝenerale eĉ ne konas la *Proverbaron*, kaj eble unu el la multaj taskoj de niaj verkistoj estu la diskonigado de tia trezoro. Permesu al mi montri kelkajn ekzemplojn, ne nur por pravigi mian eldiron, sed ankaŭ por iom gustumi la stilon de nia aŭtoro: *”Ĉio estus ronde perfekta, se ne ekzistus iu febla flanko”*; *”Estas tempo por viroj. Por viroj kun medolo en la ostoj.”*

Kaj ni ĉerpu ankaŭ el aliaj noveloj, kial ne. Jen disaj ekzemploj el la verkaro de Liven Dek:

*"Mia lasta 'predo', Laŭra, estis skulptinda brunulino naskiĝinta sur Tero; kaj jen mi, la ora fraŭlo, estis ŝafe kondukita antaŭ la geedziĝa ekzekutisto"; "nur pro tio, Laŭra sekvis lin kiel fidela hundino, dancante ĉe la tintado de liaj moneroj, do kun amo flamanta al sako sonanta" (Laŭra); "Ĉesu litanii"; "Neniu, krom la personoj hodiaŭ kunvenintaj en ĉi ĉambro, konas la ekziston de la planedo, kaj tio povas signifi ason en nia maniko"; "ekzistas la danĝero, ke iam la registaro ŝovos la nazon en nian vazon"; "regis tomba silento"; "postuli pli decan partoprenon en la suka negoco"; "mi faris mian eblon, ludis miajn kartojn kaj fine konvinkis lin"; "Kiu malhelpos? Ĉu vi, putra porko?" (Or); "Neatendite, en la daŭro de palpebrumo, ŝi fulme ĵetas la dekstran manon al la kalendaro kaj kaptas la kablojn konektitajn al la pilo" (La bleko de l' ŝargú); "Fi al vi, sterka putino!"; "La kompatinda moviĝis, turniĝis kaj skuis sin spasme, blekante kvazaŭ diablo aspergita per benita akvo"; "La ĵeto estis farita!"; "ŝi obĵetis miel-tone, klopodante konduki la akvon al sia muelilo" (Liza); "dum ŝi, male, devis alfronti la edzon kaj engluti la maldolĉan pilolon" (Rendevuo); "Onidire silento estas konsento"; "Tamen, rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, persisto kaj korpa maturiĝo komplice naskis la sopiratan rezulton"; "Subite Gunilla elpuŝis teruran krion kaj, ĵetante min kontraŭ la muron, ŝi ekkuris kiel venenita*



*muso*”; *”Certe ĉi nekutima sinteno de la ruza knabino povus alitempe fandi mian molaĉan koron, sed ĉi-okaze ĝi tuŝis min kiel akvo anseron”* (Ĉe la altaro de Onan); *”Helga, muta kiel fiŝo, dronis en maro da konfuzo”* (Rompita koro).

Fine, la novelo *Peĉa tago* preskaŭ konsistigas ekzercon pri popol-diroj kaj proverboj, kvazaŭ la aŭtoro vetus, ke li kapablas kohere surpaperigi po unu parolturno en ĉiu dua linio. Cetere, same kiel *Marta kaj Maria*, temas pri novelo, kiu orbitas ĉirkaŭ amo, kaj kies lasta vorto estas *”ame”*:

*”En la oficejo, la tutan tagon mi ŝvitis kaj mishumoris, ĉar la aferoj tute ne volis iri glate. Verdire, jam de pluraj tagoj mi sidis en laboro ĝis super la oreloj. Tamen hieraŭ, mi ne scias kial, ĉio staris sur la kapo kaj mi devis barakti kiel fiŝo ekster la akvo por finredakti unu el tiuj gravaj, seriozaj kaj konsiderindaj raportoj, kiujn fakte neniu legas. Jes, sendube, ĉio misis. Eĉ mia kara direktoro, pedanto pli teda ol kulo, decidis fordoni sin per korpo kaj animo al la praktikado de sia plej ŝatata sporto, tio estas inciti al mi la galon.*

*—Eminenta kaĉo, sinjoro Braun —li ĉikanis, foliumante la raporton.*

*—Ĉu tubero? —mi demandis pikite.*

*La ceteron de la konversacio mi indulge ŝparas al vi. Tamen notu bone, ke, aŭdinte mian argumentadon, li subtile montris al mi, kiu kondukas la dancojn.”*

## Dueco

Jam la unua frazo en *Marta kaj Maria* estas klare dueca — preskaŭ ŝoke kontraŭdira —, kaj tia dueco pluos laŭlonge de la tuta novelo: ”*Dum la varma lito de Arnoldo avidas akceptas la voluptan nudon de Marta, Maria, fratino de Marta kaj edzino de Arnoldo, mortas silente en apuda ĉambro.*”

La novel-konstrua dueco utilas por montri, ke du fratinoj, du karakteroj, du voloĵoj, du malsamaj perceptoj de la realo, tamen fine kunflue unuiĝos dank’ al la nebridebla forto de amo. En la verko aperas multaj ekzemploj de tia dueco:

”*En la tagoj, li infanas kaj ŝi patrinas. En la noktoj, li voluptas kaj ŝi pasias.*”

”—*Kion vi volas diri? Ĉu se temus pri Arnoldo...?*

*Frido. La pulso de Maria stagnas, dum Marta, alabastre pala, sentas sian koron flama. Subite Maria diras:*

—*Uzu lin.*

*La frido iĝas frosto. La flamo iĝas hanto.*”

”*Mardon post mardo, viziton post vizito, venas kaj foriras la monatoj. Marta imponas. Ŝi aspektas ĉiam pli bela, pli vigla, pli freŝa, dum, male, Maria ĉiutage montriĝas pli trista, morna, senforta . . .*”

Eĉ en la titolo de la novelo ”*Marta kaj Maria*” videblas tia dueco nur ŝajna: ja finfine la nomoj Marta kaj Maria malsamas je apenaŭ unu litero. Kaj ni bone notu, ke la

du fratinoj estas ĝemelinoj: ”al la kazerno venis la novaĵo pri la naskiĝo de liaj du ĝemelaj filinoj.”

## Amo

Ni vidis, ke la tuta *Marta kaj Maria* rondiras ĉirkaŭ amo: unue filina amo, poste fratina amo, fine seksa amo. Same kiel en multaj aliaj noveloj, amo sub ĉiuj vizaĝoj montriĝas la ĉefa trajto de Liven Dek kiel verkisto. Jen el *Marta kaj Maria*: ”La postaj vesperoj fariĝas inside longaj, aspraj, terure malfacilaj. Sed, feliĉe, la du fratinoj trabatas al si renkontan vojon. La amo venkas.” Facilas trovi similaĵojn en la verkaro de Liven Dek. Laŭ mia kompreno, la jenaj fragmentoj el tri aliaj noveloj rivelas la plej profundajn konvinkojn de Miguel Gutiérrez Adúriz:

”Nur la vivo, nur la senbrida potenco de la vivo kapablas venki la morton. Dum kelkaj sekundoj, la virino restas senmova meze de silento preskaŭ religia, kvazaŭ ŝtoniĝinta, kvazaŭ trafita de mistera sorĉo, simile al krizalido kiu, kovrita per sia protekta ŝelo, sin nutrus per ĉiuj siaj plej amataj rememoroj, asimilante ilin kun terura avido, por kreski. Jes, por kreski. Por kreski kaj transformiĝi en papilion” (La bleko de l’ ŝargú); ”Ĝuste tiu sama rakonto konsistigas la lastan parton de ĉi historio, kiun mi liveras nun al la papero, kun la sola celo, ke la amo transcendu min” (Pli bone malfrue . . .); ”Malfacilas esti homo. Neniam permesu ke mal-

*amo sidu en via koro. Ju pli vi perfidos vian humanecon, des pli febla vi fariĝos. Eskapu el tiu magia rondo, kie malforto kaj hato sin nutras reciproke.”* (La letero)

Eble nun indus kompari la amon en la verkoj de Liven Dek kun la amo ĉe aliaj el niaj verkistoj, ekzemple Julio Baghy, Marjorie Boulton, Miguel Fernández . . . sed tio transirus la celon de la nuna eseo. Mi preferas fini re-skribante la frazon *”Ju pli vi perfidos vian humanecon, des pli febla vi fariĝos.”* La forto de la roluloj en la livendekaj noveloj ne fontas el sencerbaj muskoloj aŭ el singraviga trudemo, sed el io pli intima, pli homeca kaj ĝuste pli humana, t.e. *”posedanta la plej noblajn ecojn de la homo, kompatemon, bonfaremon, helpemon”*. Jen la roluloj de Liven Dek. Jen Liven Dek. Jen Miguel Gutiérrez Adúriz.

J O R G E C A M A C H O

## ”MIGUEL GUTIÉRREZ ADÚRIZ, PINTE KAJ PONTE”

**L**a nova Plena Ilustrita Vortaro, majstroverko de Michel Duc Goninaz, aŭ la jam kompletigita kaj aperinta Granda Vortaro Hispana- Esperanto de Fernando de Diego, estas, se uzi arĥitekturan metaforon, katedraloj. Sed nia lingvo, ties parolantaro kaj ĉi ties historio bezonas ne nur katedralojn, sed ankaŭ pontojn, kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, konata ankaŭ kiel Liven Dek, Adúriz aŭ Migueluco, estas bona ekzemplo de tio.

Kiam ni konatiĝis, en la Internacia Simpozio pri Sporto en la Moderna Socio, en Madrido, 1982, mi estis preskaŭ 15-jara junulo, kaj li aĝis kelkajn jarojn malpli ol



tiom, kiom mi aĝas nun. En la ibera provinco de Esperantujo, kaj ne nur je la monteto, amuzparko aŭ puto konata kiel Ibera Skolo, mi konas nun nepokajn homojn ĉirkaŭ tridekjarajn simpatiajn, spritajn kaj talentajn. Sed tiutempe, en la iamo longe for, Miguel Gutiérrez kun siaj tridek unu jaroj staris preskaŭ sola inter, unuflanke, la malnova HEF-generacio kaj, aliflanke, la tro nova rondo de HEJS-aktivuloj. Laŭ mia tiama vidpunkto, de junulo bola kaj petola, apenaŭ povintus interesi min la agado de la HEF-veteranoj. Sed jen aperis Miguel kiel homo sufiĉe normala kaj normal-aspekta (io ne tro kutima en niaj renkontiĝoj), kiu prezentis al la ĉeestantoj esperanto-libron same normal-aspektan kaj normalan (io simile malkutima).

Temis pri la unua volumo de la serio Sferoj, kun kolora kovrilo. Kaj jen la mirakla aŭ miraĝa koktelo, la kaptilo. Verdire, preskaŭ la sola bildo el tiu madrida semajnfino, kiu restas plu viva en mia memoro post tiom da jaroj: la entuziasma lipharulo kiu, per flugiloj de bunta sciencfikcia rakontaro, plonĝigis min en la akvon de esperantumado kaj de verkado en esperanto.

Ĉar, kiel poste mi povis kompreni, li pontis inter homoj kiel Francisco Javier Moleón kaj mi, kaj la grandaj reprezentantoj de Esperantujo en Hispanlingvujo, aŭ inverse: Juan Régulo Pérez, nia plej profesia eldonisto, kaj Fernando de Diego, nia plej talenta kaj sukcesa tra-

dukisto. Sen tia homa kontakto, certe nenio posta estus okazinta kiel fakte okazis, kaj eble mi kabeintus plene kaj ilustrite antaŭ, ni diru, dek jaroj. Sed li viglis tie, kaj kaptis min por la afero.

Mi povus aldoni, ke li rolis samtempe kiel ponto kun eksterlandaj instancoj (ekzemple TEJO) kaj eldonistoj; aŭ kiel ponto inter fakoj: loka kaj asocia agadoj, beletro verka kaj traduka, eldonado, grafiko, redaktado de gazetoj, la Akademio, kompilado de vortaroj, se ne paroli pri lia ĉefhobio sciencfikcio kaj fantasto. Sed mi ne faros tion. Mi preferas fini per frazo de Ana Manero kiu perfekte portretas lian ĉiaman kaj porĉiaman entuziasmon, nome ke "li ne forgesas la ligojn kun la pasinteco dum ageme prikonstruas la futuron".

Al li kaj al ĉiuj, fortan brakumon!


T R E V O R S T E E L E

## BONŜANCO

**K**ompreneble la ruga surfaco de la aŭtovojo parte kulpis. Tuj post mia aĉeto de la aŭto, cinikulo diris al mi, ke la maŝino jam mortis sed ne komprenas, ke kadavro devas fali teren. Nu, mi daŭre zorgis, ke la benzinujo estu almenaŭ duonplena, mi regule plenigis la oleujon, mi zorgis, ke estu akvo en la radiatoro, kaj mi enmetis eĉ du rezervajn radojn. Kion alian homo povas fari? Jes kompreneble, de tempo al tempo mi aŭdis fajfojn kaj klakojn de la motoro, kaj ruĝa lampeto blinkanta sur la panelo dum kelkaj centoj da kilometroj ĝenis min, sed poste ĝi ne plu alarmis, do mi konkludis, ke la problemo jam ĉesis. Mi do rajtas kulpigi la hontindan staton de la aŭtovojo.

Dum la veturo mi foje demandis min, ĉu la decido uzi tiun ostoskuan internlandan aŭtovojon anstataŭ la bonan marbordan estis prudenta. Pravas, ke la granda interno de nia lando postlomas la evoluon de la cetero. Sed ja la interna vojo estas malpli longa, kaj mi volis vidi ion novan: verkisto daŭre bezonas stimuladon. La survojaj stimuloj ne estis tre fortaj, mi devas diri. Pri belaj pejzaĝoj ni tute ne parolu. Bestoj preskaŭ mankas en tiu





sovaĝejo, malabundas plantoj. Homojn mi apenaŭ vidis, nur sporade iun blankulon apud la aŭtovojo. Pro la krete blanka polvo tiuj mizeruloj estas apenaŭ videblaj, se ili ne portas la kutimajn malpurajn kaj malhelajn vestojn. Kion ili faras en tiuj preskaŭ senvivaj dezertoj? Unu el ili provis mansvinge haltigi min; kompreneble li volis, ke mi transportu lin ien (ili infanaĉe fieras, kiam ili rajtas sidi en niaj aŭtoj kaj montri sin al la mondo). Mi ne bremsis. Kompreneble mi ne estas rasisto, sed private mi permesas al mi kelkajn demandojn, kiujn mi ne surpa-perigus en miaj verkoj. Vidu, nu . . . kiel diri? Se la teorio de evolucio pravas, se ni fakte estas posteuloj de iu harkovrita simiosimila specio, ĉu ne konkludeblas, ke

tiuj blankuloj kun la absurde troa korpa hararo estas ankoraŭ pli proksimaj al la simioj ol ni? Kaj tiu primitiva vizaĝformo . . . Sed mi ripetas, kompreneble tio estas scienca konstato, ne rasismo.

Nu, mia aŭto ŝajne bone kondukis — malgraŭ spordaj metalaj ŝrikoj — ĝis kelka distanco antaŭ la vilaĝo, kie tiu ĉi eventaro okazis. Subite la maŝinaĉo simple haltis, staris silente, dum polvonubo ruliĝis de malantaŭe, forbaris vidon, kaj igis min tusi. Samtempe tusante, manovrante la ŝlosilon kaj atingante eĉ ne bleketan respondon de la motoro, kaj sakrante, mi konstatis, ke plua progreso dependos ne de la aŭto sed de mi. Kio? Mi devos marŝi kvazaŭ blankulaĉo laŭ tiu mizera pado sub brulanta suno? Melankolie mi sidadis, ĝis la lasta polvo-ro falis teren plene cent metrojn antaŭ mi. Mi sciis, ke ne havos sencon levi la kapoton: eĉ se la kaŭzo de la paneo estus tute evidenta al metiisto, mi intelektulo ne vidus ĝin.

Mi glutis iom da akvo el mia plasta botelo, ligis la botelon al mia talizono, kaj ekmarŝis. Mi ĝojintus vidi eĉ vilaĝaĉon en tiu polva mondo. Kaj ho beno! Antaŭ ol mi iris cent metrojn, mi vidis grize blankan polvospiralon kaj baldaŭ aŭdis zumadon de alproksimiĝanta aŭto. Mi restis meze de la vojo kaj svingis la brakojn, ke la homo ne povu ignori min, kaj marŝis malantaŭen direkte al mia strikanta maŝino. La kelkaj minutoj de lia veturo

ŝajnis jaroj. Fine la homo vidis min kaj iom post iom malrapidigis sian antaŭdiluvan kamioneton. Ni devis iom atendi, ke la polvo maldensiĝu.

”Vi elektis belan ripozlokon, kam’rado.”

”Mi ne komprenas aŭtojn. Ĉu vi bonvolus rigardi?”

Li elgrimpis, kaj mi metis mian fidon en liajn krude fortajn membrojn, dum li aliris mian paralizitan veturilon. Li levis la kapoton, rigardis tien kaj reen, kaj petis min provi starti. Tion mi faris. Kompreneble sekvis nenia vivosigno.

”Eĉ ne furzetas. Vi havas problemon, kam’rado.”

”Kiu povus ripari tion? Ĉu estas riparisto ie proksime?”

Li lakone skuis la kapon. ”Neniu en Ganla, kiun mi fidus. Sed eble . . .”

Lia hezito kondamni min al senespero donis flagreton de lumo. ”Eble kio?”

”Nu, estas Olda Tam ĉe ni. Ne havas diplomon, sed foje faras miraklojn en sia maniero.”

”Ŝajnas, ke mi bezonas miraklon. Sed kiel mi atingu . . . kio estas lia nomo?”

”Olda Tam. Vinagra vizaĝo, koleriĝema grizulo. Nu . . .” Mia kunulo okulbalais la malbelan horizonton. ”Mi trenos vin tien. Estas nur dek-dek du kiloj ĝis Ganla.”

”Mi scias, ke vi ĵus venis de tie. Kompreneble mi pagos al vi pro la komplezo.”

”Ŝovu vian monon en vian pugon, kam’rado.” Mi vidis, ke lia indigno estas aŭtenta. ”Ĉi tie oni ĉiam helpas kam’radon en krizo. Nu, helpu min ligi la ŝnuron.”

Kaj tiel mi atingis la vilaĝon Ganla: en nubo de polvo, trenate de la alia aŭto, kaj provante stiri mian paneintan maŝinon. Nun mi iom hontas, ke mi ne demandis la nomon de mia helpanto. Ĉiukaze li liveris min al primitivaspekta kabano, apud kiu kuŝis senorda amaso da aŭtoriparaj iloj. Malantaŭe estis aŭtokadavroj en ĉia etapo de disfalo.

Reage al la frapo de mia helpanto grizharulo ŝovis sian nazon tra la pordo. La aspekto de la maljunulo bone akordis kun la vortoj de la alia. Malgraŭ sia bela malhelco, la vizaĝo evidente juĝis afablecon esti masko de perfidulo. Mia helpanto diris kelkajn vortojn en la loka dialekto, kaj la sinjoro kun la nomo Olda Tam ĵetmalfermis mian kapoton. Li montris evidentan intereson pri la paneo, sed kiam mi provis klarigi, kio okazis, li buŝaĉis, ”Vi ne komprenas nenion. Ne interrompu min.”

Olda Tam ekkraĉis kelkajn vortojn al mia helpanto, kiu klarigis al mi: ”Li diris, ke eble li devos sendi radio-mesaĝon al la ĉefurbo por venigi novajn intestojn. Vi povus esti ĉi tie pli ol semajnon.”

Mi morne rigardis la kaban-kolekton de Ganla kaj pensis: unu semajnon en tiu ĉi nestaĉo! Evidente mia helpanto iom kompatis min. "Estas nur unu loko, kie vi povas tranokti. Tiu trinkejo kun la ruĝa ŝildo, tie." Apenaŭ necesis, ke li fingromontru: nur tiu plurĉambra domo eĉ provis aspekti iel, la aliaj kontentis esti anonimaj ŝirmejoj kontraŭ la polvo, la suno, kaj la nokta malvarmo. "Nu, bonŝancon, kam'rado," li diris, kaj malaperis el la kroniko de mia vivo.

Mi staris kaj rigardis Oldan Tam, kiu senvorte transprenis posedon de mia aŭto. "Ne staru tie," li grumblis. "Mi volas koncentriĝi. Venu al mi morgaŭ tagmeze, kaj mi diros, kiom da tempo mi bezonos. Kaj la koston"

Mi prenis el la aŭto mian vestosakon kaj, ekzilite en tiu sufoka lokaĉo de la sola objekto, al kiu mi iel rilatis, mi ekmarŝis al la trinkejo. Survoje mi rimarkis, ke pli ol duono de la loĝantoj estas blankuloj. Kompreneble ili estis grandparte ebriaj, brue elbuŝigis stultaĵojn en siaj orelŝiraj lingvoj, ridaĉis aŭ kverelis senkaŭze. Ŝajnas, ke pro iliaj genoj, kiuj iam hejmis en la kotmarĉoj de Eŭropo, ili ne kapablas rezisti alkoholon. Vidu ilin, mi pensis, faradas nenion, ĉiuj senlaboruloj, nur drinkas kaj diboĉas. Subevoluo, tute klare. Scienca konstato, ne rasismo, kompreneble.

Ĉar mi ne volis plu submeti min al tiu senkompata suno, mi eniris la trinkejon. Kaj gape miris.

La virino estis kvazaŭ bela miraĝo. Tian kontraston al la medio oni povus imagi, jes, sed ne vere atendi. Ŝi estis vere belega, ŝia haŭto tiel brilis, ke foje ĝi ŝajnis tute nigra, aliffoje ĝi respegulis ĉiun nuancon de bruno kaj flavo. Mi apenaŭ konsciis pri la tri-kvar blankuloj sin apogantaj ĉe la drinktablo, mi vidis nur tiun viziulinon.

”Bonvenon, fremdulo,” ŝi rave ridetis, ”kion mi povus fari por vi?”

Eĉ la voĉo havis sorĉan sonoron de bone edukita inteligentulino, kaj la pure marmoraj dentoj estis nerezisteblaj.

Fine mia lango ekmoviĝis. ”Hm, ĉu vi havas ĉambron liberan?”

La mallonga rido estis kvazaŭ kverado de kolombo. ”Ĉu mi konsultu nian registrolibron?” La vortelekto substrekis la absurdecon de mia demando. Ja kiu tranoktus en tia loko krom kaptita eksterulo? Subite venis al mi bildo de oazo en abomena dezerto: tiu virino estis mia oazo, volonte mi restus definitive en ŝia ombro.

Multon oni legas en literaturaj verkoj pri amo je la unua rigardo. Estante verkisto, mi ĉiam pensis, ke tio estas falsaĵo inventita de poetoj. Sed nun trafis min la vero. Jes, mi estis nedireble enamiĝinta al tiu senspiriga belulino nun alvenanta kaj vidiganta la perfekton de sia ŝpare kovrita korpo. ”Mia nomo estas Mata. Kaj via?”

La intonacio diris al mi, ke ŝi demandas ne pro deĵora devo, ne nur por diri ion ajn, sed pro tio, ke ŝi volas scii. Kaj kion fari, kiam ŝi staros tuj antaŭ mi? Ĉu kisi ŝin? Ĉu oni manpremas virinon en tiu regiono? Mi lasis fali mian vestosakon kaj langostumblis, "Mia Koŝ . . . mi estas Koŝalu."

Mata klinis sin kaj prenis la vestosakon. "Sekvu min, Koŝalu." En plezura sensobtuzo mi sekvis kaj provis ne tro evidente fiksiĝi pri la nudaj piedoj kaj kruroj kaj la ine balanciĝantaj gluteoj. "Jen via ĉambro." Nur poste mi rimarkos, ke la ĉambro estis inter la plej malpuraj, kiujn mi iam ajn vidis en gastejo. "Neniu reĝo ripozis tie . . ." ŝi ridetis. Metinte mian vestosakon sur la plankon apud la lito, ŝi ronrone aldonis, ". . . ĝis nun." La ludo de ŝiaj brilaj brunaj okuloj estis ja koketa, sed restis ĉiflanke de la limoj de vulgareco. Sen plua vorto ŝi foriris.

Robote mi senvestiĝis, provis forlavi la polvon per la akvo en la kruĉo — jen la sola provo, kiun tiu ĉambro faris por kontentigi la bezonojn de vojaĝanto, kaj la akvo mem estis iom malpura . . . mi surmetis pli freŝan ĉemizon . . . mi elsakigis mian kajeron kaj krajonon . . . mi eksidis sur la liton . . . mi trafoliumis la kajeron kaj ne komprenis la intrigon de la rakonto, kiun mi skribis antaŭ tri semajnoj . . . mi ekstaris, mi gratis la kapon, mi eksidis — kaj kompreneble la tutan tempon mi pensis nur pri Mata. Mi devis iel paroli kun ŝi. Mi volis ĝis-

funde sondi ŝian historion. Kion faras tia virino en tia abomeninda truaĉo? Devis esti ia klarigo, sendube tragedia. Ĉu ligo al invalida maljuna patro aŭ patrino tenadis ŝin en Ganla? Ĉu ŝi ne volas eskapi? Ĉu ŝi permesus al mi savi ŝin, doni al ŝi indan vivon en la ĉefurbo? Mi sentis, ke mi estas nobla kavaliro kun karitata misio. Mi devis paroli kun ŝi.

”Mata,” mi firme asertis posedon de ŝia nomo, ”ĉu vi povas rekomendi lokan trinkaĵon?”

”Aĥ, Koŝalu, vi estas amuzulo!” Ŝia rido premiis min milfoje pro neintencita ŝerco, kaj do mi mem senbride ridis. Jes, kompreneble mi sciis, ke nenio kreskas en tiu loko, el kiu oni povus fari trinkaĵon!

”Nu,” fine mi regis min, ”kion vi mem trinkas?” Dum sekundo mi esperis, ke ŝi virtuline diros, ke ŝi tute ne trinkas.

”Ĉi tion,” ŝi ridete fingromontris, kaj mi konstatis, ke temas pri tre forta alkoholaĵo.

”Mata, ŝi drinkas kiel soifa fiŝo, ha ha ha!”

Abrupte mi turnis min al la parolinto, ĉifone vestita blankulaĉo, kiu ĝis tiam restis nevidebla ie flanke de mi. Mi sentis indignon pro tiu insulto, kaj mi atendis: Mata devus nur indiki malplezuron pri liaj vortoj, kaj mi pugnodraŝus la aĉulon. Sed ho ve! Ŝi ridegis kaj kokete ŝajnis vangofrapi tiun subhoman blankan vizaĝon, kaj fine karesis ĝin. ”Na na karulo, vi nur ĵaluzas, ke mi po-



vas trinki pli ol vi!” Refoje rido eksplodis el ŝia buŝo, sed ĉi-foje ne estis pura birdotrilto, mi kredis aŭdi eĥon de ŝakala ululo.

”Eĥ . . .” mi gustumis iom amaran salivon en la buŝo, ”mi prenos la mildan vinon tie.” Ne, mi ne volis divorci ŝin, sed ŝi bone sciis, ke tia krudeco ne plaĉas al mi.

Mia distanciĝo ja efikis. Tute sobre ŝi verŝis al mi glason de la milda. Okulglutante la gracion de ŝiaj pojnmoviĝoj, mi pardonis la etan pekon. Nun mi volis demandi pri ŝia vivo, plonĝi en la abismon de ŝia sorto.

”Ĉu vi . . . e, naskiĝis ĉi tie?” Mi sorbetis la vinon.

”Ne . . .” Je mia granda ĉagreno grupo da bruaj blankuloj ĝuste en tiu momento ŝovis sin tra la pordo.

”Mata, dancu por ni!” ”Ek, bebo, montru al ni la pugon!” ”Vi eta tigrineto, ha ha!” La subhomoj vundis miajn timpanojn per sia senfunde naŭza ridadaĉo. Kiel Mata reagos al tio? Klare, ke ŝi sekundone rigardis min: en tiu tro transira momenteto mia espero pri ŝia saviĝo flagris. Sed fortuninte la okulojn ŝi kvitancis la bestaĉan konduton de la blankuloj per voluptoveka koksotordiĝo, laŭte ridis, kaj kriis, ”Ankoraŭ tro frue, knabetoj! Mi devas unue trinki!” Simiaj manoj transiris la drinktablon kaj frotaĉis la belajn brakojn. Neniel ofendite, ŝi permesis tion, ŝajne eĉ ĝuis, kaj kriis, ”Knabetoj, vi scias, kial oni pagas al mi — aĉetu vian bieron, ludoj venos poste, ha ha! Kiu aĉetos por mi nun, e?”

”Pardonu, mi ĵus memoris ion,” mi diris, prenis la vinglason, kaj reiris al mia ĉambro. Eble neniu aŭdis, kion mi diris. Miksaĵo de kolero kaj deprima seniluziigo devigis min ŝajniĝi, almenaŭ al mi mem, ke mi havas aferojn por fari. La verkisto enmanigis sian manuskripton, tiun mizeran kajeron, kaj eĉ malpli ol antaŭe komprenis la enhavon. Ĉu mia fremdiĝo de Mata estis definitiva? Ĉu ne eblis doni al ŝi ankoraŭ unu ŝancon, du ŝancojn?—ŝi ja estis unike dezirinda ulino! Mi devis esti komprenema viro de la mondo — sendube ia aĉa destino venigis ŝin al Ganla — mi estu larĝakora kaj komprenema kaj kompatema . . . Aliflanke, ke ŝi permesas al tiuj simioj tiom da intimeco — aĉege!

Mi uzis eble la plej drastan metodon por trankviligi min: mi enmanigis kaj fakte legis parton de la lasta romano de Vanli, tiu arlekeno, kiu pasintjare gajnis la premion laŭmerite mian. Mi senkompatate disŝiris lian vortelekon, lian rakontmanieron, liajn senfantaziajn priskribojn de homoj kaj pejzaĝoj. Konfesende, la bela korpo de Mata de tempo al tempo aperis sur la paĝoj, sed mia sekcedo de la ĉarlatano donis al mi sufiĉe da plezuro por distri min.

Kia surprizo! Frapo ĉe mia pordo, certe de eleganta ina mano. ”Koŝalu,” ŝi diris, ”mi povus kunĵeti ian vespermanĝon por vi, sed mi rekomendas nek mian kuirarton nek la ingrediencojn ĉi tie. Se vi volas manĝi, iru ĝis

la benzinejo, iru maldekstren, tria domo dekstre. Tie loĝas Stavropoulos. Li bone scias kuiru, kaj ne tre multekoste. Iru kun botelo da vino, dividu ĝin kun li, kaj via manĝo estos preskaŭ senkosta.”

”Mata, mi volas . . . e, kiun nomon vi diris? Stavrol . . . ?

”Stavropoulos. Jes, grekoj havas strangajn nomojn. Kaj ne timu, vi apenaŭ sciis, ke li estas eŭropano, li estas tiel bruna. Grekojn oni trovas ĉie, ili diras.”

”Mi elkore dankas vin, Mata. Ĉu vi ne plu servas viajn . . . hm, amikojn?”

”Nu, iam ili revenos.” Ŝiaj grandaj brunaj okuloj subite malkaŝis al mi, ke ŝi estas vundebla, protektinda virino.

”Mi ne komprenas, kial vi estas ĉi tie. Volas diri, la vilaĝo ne estas, hm, via naskiĝloko, kaj ŝajnas al mi, ke —”

Subite penetris la ĉambrom krio de ekstere. ”Hej Mata, venu vendi al ni, vi bela putino!”

”Ha, kiaj ĝentlemanoj!” ŝi kriis responde, sed ŝi tamen iris ridetante. Tiu rideto ŝovis ponardon en mian koron.

Mi iris al Stavropoulos, kune kun vinbotelo. Mata intuciis mian altan kulturnivelon, kiun blankulo maloftege atingas, kaj ŝi pravis ankaŭ pri tio, ke oni apenaŭ sciis, ke Stavropoulos naskiĝis blankulo; brunega li estas. Longe li rakontis pri sia vivo, kaj efektive mi intencas

iam ekspluati lin literature. La planko de la ĉambro estis kovrita de naŭzaĵoj, sed fine oni manĝas tion, kio estas sur la tablo. Li fine prezentis tute manĝindan ion, kies nomon el lia sovaĝa hejmlando mi ne memoras.

Iom timeme mi reiris al la trinkejo: kion faros nun Mata? Mi staris silente ekster la pordo kaj gvatis tra murfendeto. La nekohera babilado kaj ridaĉado estis preskaŭ tute nekomprenebla, sed subite ŝia voĉo, ne plu koketa, larme raŭkis:” La hundaŝo, li forlaŝis min kun pereanta bebo!”

Tiu frazo fulme klarigis al mi multon pri la mistera belulino. Jes ja, ŝia tragedio tuŝis mian koron, kaj ĉu ne estos mia rolo transplanti tiun rozon el la sterkostako kaj meti ĝin en belan, puran teron? Mi paŭzis momenton por alpreni la necesan kuraĝon.

Mi eniris la trinkejon, misiopreta. Sed intertempe la tragedia Mata transformiĝis en preskaŭ tute ebrian nuran kelnerinon en drinkejaĉo. Eĉ pli abomeninde, ŝi tute ne kontraŭis, ke du el la blankula bando, mem evidente ebriaj, plumpe karesas ŝin tie, kie mi permesintus nur al mi mem tuŝi ŝin.

”Hej, Koŝalu! Ŝu vi bone manĝiŝ?” Eble ŝi provetis dume forpuŝi la simiajn manojn, sed povas esti, ke mia severa mieno igis ŝin defie tute transdoni sin al diboĉado de la plej malalta speco. Ŝi ridaĉis, ebrie balanciĝis, glitigis manon laŭ la plej proksima simia vango, kaj di-

ris ŝtonkore-metie: "Hej, vi konŝtipito, ŝu vi volaŝ ion trinki?"

Mi pintigis la lipojn kaj diris riproĉe, "Mi trinkas nur modere. Kaj rekomendas tion al aliaj." Mi marŝis al tiu malpura ejo nomata mia dormoĉambro, sciante, ke mi nepre devos kiel eble plej morde ataki la verkaĉon de Vanli.

Eble unu horon mi luktis inter alternaj emocioj. Mi malamis ŝin pro tio, ke mi ŝin amis. Mi plonĝigis mian glavon fojon post fojo en la fetoran hepaton de Vanli kaj ĝojis pri la gutanta sango. Mi neniam pardonos Matan, eble tamen unu fojon . . . Kaj kio pri mia aŭto, tiu senu-tila stako da metalo kaj kaŭĉuko? Ĉu tiu acidlanga Olda Tam ion elpensos, aŭ ĉu mi devos resti dum netolereblaj tagoj en tiu vilaĝaĉo malbenita de ĉiuj dioj?

Sed ŝi estis tiel bela, mi lascivis pri ŝi, mi nepre devis doni al ŝi lastan ŝancon. Mi ĵetmalfermis la pordon kaj marŝis en la ĉambron, kie ŝi laboris. Nur ŝian dorson mi vidis, kaj la blankulaĉoj, kiuj povis vidi min, estis tro ebriaj por atenti min. Miaj oreloj kaptis nur kelkajn vortojn, sed la senco estis dolore klara: estis ia marĉandaĉo, kiu el la bierstinkaj naŭzuloj dormos kun ŝi.

"Fi!" mi kriegis, kaj almenaŭ tiom da kontentiĝo mi spertis, ke ĉiuj algapis min, dum mi brakogeste reiris al la dormoĉambro.

Bela nokto tio ne estis. Malmulte mi dormis. Eĉ kiam mi sukcesis gliti en dormon, mi vidis ŝian belan korpon en vomiga interplektiĝo kun iu harkovrita simio. Ĉu mi eĉ ploris? Mi ne volas memori tion.

Mi malmulte dormis, sed estis jam malfrue, kiam mi plene vekigis. Aj, kiel mi pasigu tiun tagon en Ganla? Kaj la postan? Kaj la postpostan? Kia infera semajno! Almenaŭ unu korpa sistemo bone funkciis: mi volis ion manĝi. Mi vestis min por iri al Stavropoulos kaj malfermis la pordon.

Kia transformiĝo! Jen Mata, tute sobra, freŝaspekta, bela, ege dezirinda, preskaŭ senvesta, diligente balaante la plankon de tiu mizera trinkejo. Mia koro moliĝis. Sed ne, mi decidis, mi ne lasos ŝin dikti al mi miajn emociojn, mi indiferent-miene preterpasos ŝin.

”Matenon, Koŝalu! Ĉu vi bone dormis? La lito ne estas tre luksa, mi scias. Ĉu vi iras al Stavropoulos?” Per nekonscia gesto ŝi glatigis la harojn, tiel reliefigante la dezirovekan mamaron.

”Matenon, sinjorino.” Mi restis ŝtonvizaĝa.

Mia rigideco tiel ridigis ŝin, ke malgraŭvole ankaŭ mi ridetis, kaj eĉ fortunante la kapon mi ne sukcesis kaŝi mian plezuron.

Ŝia voĉo iĝis afereca. ”Mi volas fari al vi komplezon.”

”Eĥ, kian komplezon?”

”Ĉi-vespere post la deĵorado mi venos fiki kun vi. Mi estas tre bona en la lito.”

Mi ne trovis vortojn. ”Vi iom timas min, ĉu ne?” ŝi ridetis tenere kaj kaptis mian manon. ”Ne timu, vi certe ne bedaŭros. Do, bonan apetiton.”

Ankoraŭ senvorte mi intencis eliri, sed ial hezitis.

”Aĥ cetere, se vi pripensos forbari min el via ĉambro, ne provu, vi ne povos. La pordo ne estas ŝlosebla.” Tion ŝi diris tute ofice, objektive. ”Simple kapitulacu kaj ĝuu. Ree, bonan apetiton.” Per tio ŝi instrukciis al mi foriri kaj iel plenigi la tempon, ĝis ŝi venos.

Stavropoulos estis same babilema, sed ĉi-foje mi ne povis atenti liajn rakontojn. Mi daŭre pensis pri ŝi. Ĉu ŝi restos sobra, aŭ ĉu ŝi venos naŭze ebria en mian liton? Sciante iom pri miaj estetikaj normoj, ĉu ŝi penos kontentigi ilin?

Damne, mi ne devas kapitulaci al ŝi! Ĉu mi estas sur la sama nivelo kiel la bando da blankulaĉoj, kun kiuj ŝi probable laŭvice fikas?

Aĥ, tiu virina korpo! Kiom da monatoj mi ne havis virinon en miaj brakoj? *Tiel* belan neniam!

Eskapinte el la ĉambro de la parolema brunhaŭta greko, mi eĉ iom promenis laŭ la polva aŭtovojo, kvankam unu parto de mia cerbo diris al mi, ke la pejzaĝo tute ne meritas promenon.

Aĥ, mi subite rigardis mian horloĝon. La dekdua kaj dek minutoj! Tam la kolerikulo ordonis al mi reveni tag-meze. Mi ne kuraĝis malobei. Rapide mi marŝis al lia kabano.

Li vidis min veni sed eĉ ne levis la kapon. "Kelkaj homoj estas pli bonŝancaj, ol ili meritas," li elkraĉis. "Donu al min kvindek, kaj forprenu vian ĉaraĉon." Li tamen aldonis frazon, kiu el lia buŝo estis certe senparalele afa-bla. "Vi vere estas bonŝanca, ke mi trovis precize la ĝustan pecon en alia vrako."

Mi transdonis la monon kaj enaŭtiĝis. Mirakle, la motoro tuj kaj senĝeme respondis al miaj manovroj. Mi devis nur veturigi al la trinkejo kaj preni mian vestosakon. Alia mirindaĵo: en tiu momento Mata ne estis en la domo. Mi lasis sur la drinktablo pli da mono, ol kostus tuta semajno en la ĉambro, saltis en la aŭton, kaj forveturis.

Jes, mi estis bonŝanca, mi supozas . . .



G O N Ç A L O N E V E S

## ESPERANTO KAJ SOCIA RESPONDECO

**K**ara amiko J.M., valora idisto,  
Dankon por via letero. Unue mi klarigu, kial la nunan leteron mi decidis redakti en Esperanto. Temas pri tio, ke Idon mi jam ne praktikas nek adeptas, kvankam mi ankoraŭ agnoskas ĝiajn bonajn ecojn, kaj ĉar manko de praktikado de iu lingvo ofte generas hezitojn kaj dubojn pri parolturnoj aŭ eĉ gramatikaj detaletoj, kaj ĉar al mi tute ne plaĉas verki aŭ eĉ redakti simplan tekston en lingvo, kiun mi ne regas komplete, aŭ pri kies ĝusta aplikado ĉiupaŝa mi ne ĉiam certas, tial mi decidis turni min al Esperanto, sciante ke vi, ekksesperantisto pro "politikaj kialoj", ankoraŭ iam-tiam aplikas tiun ĉi lingvon, eĉ se nur lege.

Mi memoras, ke en antaŭa letero adresita al vi, mi menciis mian interesiĝon pri *Interlingua*, kaj eĉ anoncis, ke mi decidis por kelka tempo ĝin studi, prove praktiki kaj apliki en mia korespondado kun alilandanoj. Efektive, mi tiam aljuĝis al mi mem unujaran periodon da senantaŭjuĝa provado kaj aplikado. Tamen kelkaj monatoj sufiĉis. *Interlingua* estis por mi granda elreviĝo.

Kvankam mi agnoskas, ke ĝi plenumas la ĉefan celon, kiun Gode atribuis al ĝi — senperan kompreniĝadon inter homoj, kiuj regas almenaŭ unu latinidan lingvon —, tamen pli ol tiun ĉi celon *Interlingua* tute ne plenumas nek povas plenumi, pro ĝia denaska kaj neriparebla manko de adaptiĝemo, fleksebleco kaj vivipovo. Ĉe ĉia nova esprimo, ĉe ĉia nova parolturno, ĉe ĉia nova koncepto, *Interlingua* devas ĉiam sin turni al la patrino latina aŭ al la kuzinoj latinidaj. Ĝi do estas esence lingvo imitema, almozpeta kaj dependa. Anstataŭ krei, ĝi kopias. Anstataŭ imagi, ĝi prenas. Anstataŭ vivi, ĝi vegetas. Tion pravas la mizera stato de ĝia literaturo. En poemoj kaj rakontoj ĝi ne fluas, ĝi ne sonas memstare, ĝi impresas iom stakate kaj singulte.

Alia grava problemo de *Interlingua* estas ĝia prononco. Ĉe mi kuŝas kasedo, kiun konsistigas pluraj rakontoj de Gode, voĉlegitaj de diverslandaj *interlingua*-istoj. Aŭskultante ĝin atente kaj senpartie, mi kun bedaŭro konstatis, ke unuflanke la tembro de ĝermanaj kaj madjaraj voĉkordoj ne laŭas la troan latinecon de *Interlingua* — ilia voĉlegado sonas ja kiel iaspeca latino raspe torturata de subkulturitaj barbaroj — kaj aliflanke, ke la neregula akcento de *Interlingua* kaŭzas oftajn deflankiĝojn de la atendata prononco. Ekzemple, laŭ unu el la multaj prononcreguloj de *Interlingua*, la vorto *caseo* (= fromaĝo) devas ricevi la akcenton sur la unua silabo, sed el tiu

kasedo mi povis aŭdi sen ombro da dubo, ke la redakoro de *Panorama* — tre sperta homo, plurjara praktikanto de la lingvo kaj ofta preleganto en la konferencoj ĉiun duan jaron organizataj de *Union Mundial pro Interlingua* — ke eĉ li dumlege plurfoje misprononcas tiun vorton, akcentante ĝin sur la dua silabo.

Kvankam ankaŭ mi konstatis, same kiel vi, ke la kultura nivelo de *interlingua*-istoj — malgraŭ la menciitaj prononcproblemoj — staras ege pli alte ol tiu de idistoj, tamen mi opinias, ke tiu supereco ne estas motivo sufiĉe forta, por ke oni transiru de Ido al *Interlingua*. La kelkmonata periodo da provado, kiun mi spertis, pruvis al mi tute klare, ke la naturalisma vojo estas stumblige plena de akutaj ŝtonoj, kaj ke nur la vojo skemisma montriĝas sufiĉe glata kaj ebena, por ke oni paŝu sur ĝi per memstaraj piedoj. Eks do pri *Interlingua*.

Kial do, flanken metinte la aferon *Interlingua*, mi ree turnis min al Esperanto, anstataŭ daŭrigi mian laboradon por Ido? En la tempo, kiam mi konceptis kaj surpaperigis mian verkon *Nia Justifiko*, mia opinio pri Ido staris tiel alte, kaj tiel malalte kuŝis mia opinio pri Esperanto, ke eble mia nuna reokupiĝo pri la lingvo Zamenhofa ŝajnas kaprica svingiĝo de ventkoko aŭ oportunistama kolorŝanĝo de kameleono. De tiu tempo, pluaj konsideroj, esploroj kaj spertoj vidigis al mi, ke la eventualaj avantaĝoj de Ido, kiujn mi tro partie elmetis en mia ver-

ko, estas nur epidermaj kaj sensignifaj. Kiam temas pri komuniĝado inter homoj kulture kaj lingve tiel disaj, kiel ekzemple japanoj kaj finnoj, tiam estas tute egale, ĉu oni diras *edzo* aŭ *spozo*, *knabo* aŭ *puero*, *vosto* aŭ *kaudo*, *kiuj* aŭ *qui*, kaj estas tute egale, ĉu verbon oni rajtas tiri de substantivo senpere aŭ nur pere de sufikso, kaj tiel ade plu. Tio estas nur detaletoj, kiuj la esencon mem de la lingvo tute ne tuŝas, kaj ĉe tiu konstato, tuj leviĝas la demando, ĉu ni rajtas nin delekti kaj nian tempon perdi super nuraj detaletoj, kiam staras antaŭ ni la grandioza tasko disvolvi kaj disvastigi la internacian lingvon ĝuste en tiu formo, kiu varbis pli grandan nombron da adeptoj, kiu generis pli vastan kaj riĉan literaturon, kiu enradikiĝis en ĉiuj sferoj de la homa socio, kiu sola trovis aplikon eĉ en la sino de ne malmultaj familioj, kaj entute la demando, ĉu ni rajtas formeti la socian respondecon, kiun vole-nevole ni prenis sur nin, kiam ni ekiris sur la vojo de la esperantismo, kaj eĉ pli grave, ĉu ni rajtas ĝin formeti, nur por filozofi super teoriaj nuancoj kaj ĵongli per gramatikaj subtilaĵoj, kiuj estas tute ne esencaj aŭ necesaj por la komuniĝado internacia, kaj ĉu ni rajtas, surbaze de tiu filozofado kaj ĵonglado, disipin nian tempon kaj niajn fortojn, dum ni ludas kun niaj amikoj ĉe la komputilo, revivigante en la ciberspaco lingveton, kiu, naskite en etoso de suspektemo, malfido

kaj rompo, kaj poste iom kreskinte kaj eĉ kreinte apartan movadeton, fine fariĝis stagna, marasma kaj vegeta. Kvankam mi konscias, ke la suprajn konsiderojn pri socia respondeco multaj mondlingvanoj renkontas kun ŝultrolevo kaj moka rideto sur la lipoj, tamen mi ne povas vindi al mi la okulojn, ignorante la evidentan fakton, ke, dum la mondlingvanoj restas dividitaj per siaj lingvaj kaj dialektaj ŝiboletoj, dum ili senĉese harfendas kaj bizancismas, ilia granda konkuranto, la angla, paŝas sepmejlbote, invadante pli kaj pli da bastionoj kaj redutoj. Dum la mondlingvanoj vaste diskutas pri la dezirindeco aŭ forĵetindeco de la akuzativo, la lingva situacio en la mondo fariĝas pli kaj pli maljusta, kaj la loĝantoj de Anglalingvujo, kies sola merito konsistas en tio, ke ili hazarde estas naskitaj sur tiu teritorio kaj edukitaj en tiu lingvo, ĝuas pli kaj pli da privilegioj sociaj, profesiaj kaj ekonomiaj. La unua renkontita tre malmulte lerninta bubo, se li nur naskiĝis en Anglalingvujo kaj la anglan lingvon akiris denaske, rajtas ĉie paroli en sia patra lingvo, ne farante eĉ la plej etan klopodon moderigi la rapidecon de sia parolo kaj la buntecon de sia vortprovizo, dum liaj aŭskultantoj, kiuj pene kaj elspezige studadis la anglan dum longaj jaroj, estas devigataj humiligi sin antaŭ li, akceptante liajn korektojn kaj konsciante ĉiupaŝe, ke lian lingvon ili ne plene regas, kaj ke, eĉ se iam, post grandegaj klopodoj kaj vastegaj investoj de

tempo kaj mono, ili kapablus ĝin plene regi gramatike kaj vortprovize, eĉ tiam ilia akĉento ilin denuncos kiel fremdulojn ĉe ĉiu frazo kaj ĉiu vorto.

Ĉe tiu konstanto, kaj ĉar mi forte sentas tiun socian respondecon, tial mi ne volas, ke miajn orelojn plu delogu sirenaj kantoj pri eventualaj plibonigoj, naskitaj de ŝveba teorumado kaj filozofia rigideco, aŭ sofismaj predikoj pri belvizaĝaj simpligoj de la latino, kies fina rezulto estas nenio alia, ol nura kreoligo de la beleco kaj majesteco de la anktikva floro de Latio. Esperanto estas la sola lingvo artefarita, kiu ĝis nun montris sin kapabla konkeri la terenon de la romano, de la novelo, de la romano, de la epopeo, de la eseo, de la traktato, de la teatro, de la komikso, de la erotiko, de la kabareto, de la scienco, de la filozofio, de la humuro, de la vivo geedza kaj familia. Ĝi estas **la** lingvo artefarita, jam pli ol cent jarojn uzata de homoj apartenantaj al ĉiaj tavoloj de la homa socio. Varba okupiĝado pri ĉia alia lingvo artefarita, ĉu naturalisma, ĉu skemisma, signifas nenion alian, ol provizi la anglan per plia kartoĉo, kaj la lingvan maljustecon per plia standardo. Mi preferas alte teni la standardon de Esperanto kaj batali por mondo lingve — kaj sekve ankaŭ ekonomie — pli justa kaj pli humana.

Akceptu miajn plej korajn bondezirojn.

Amike,

GIULIO CAPPA

## POST LA FINA VENKO

**E**ble li trenos tiun pekon ĝis la fina juĝo: se mi venis al la ideo skribi literaturaĵojn en esperanto, respondecas Liven Dek.

Li respondecas pro mia ununura esperanta rakonto, kiun li mendis kaj publikigis. Li ankaŭ kulpas pro la neplenumita klopodaĵo, kiu sekvas, pri kies ekzisto li eĉ ne suspektas. Tio pravas, ke ĵetita semo povas kaŭzi la plej neatenditajn konsekvencojn.

Li multon helpis kaj fakte kunaŭtoris la itallingvan libron "La lingua fantastica", kiu enhavas antologion de sciencfikciaj rakontoj originale verkitaj en esperanto (tri de li!) kaj lian ampleksan eseon pri la disvolviĝo de sciencfikcia literaturo en esperanto.

Iam Liven Dek tre sekrete flustris al mi, ke li ne vere interesiĝas pri sciencfikcio, ke li elektis tiun agadfakon ĉar li juĝis ĝin tre fruktodona por esperanto-varbado. Tia homo li estas, ke dum li iras al celo, li oras la rimedojn, florigas la vojon.

## 1.

**K**iam liaj okuloj al kutimiĝas al la suno, Goldeno Ĉi rusvajtis rimarkas, ke tuj ekster la pordo de la prizono staras kaj bruas malgranda homamaso. Li legas la grandajn literojn sur afiŝo: "ĈIRUS LIBERA". Aliaj rigardas lin tra mikrokameraoj, kiujn ili tenas al la okulo apogante la manon ĉe zigomo. Iu iniciatas aplaŭdon, kiu baldaŭ kreskas kaj riĉiĝas per krioj kaj vivoj. Fine, junulo alproksimiĝas al Goldeno kaj afable ekprenas lian valizon. Kvankam li ankoraŭ ne estas maljunulo, hodiaŭ Goldeno sentas sin tre aĝa. Jen komenciĝas nova ĉapitro de lia vivo. Ĝi certe pli malfacilos ol la ĵusa. Li sekvas la junulon kun la valizo direkte al aerkusena veturilo. Nun la ĉeestantoj dismetas sin ale laŭ la vojo, ĉar ĉiu deziras manpremi lin, aŭ almenaŭ tuŝi lian ŝultron. Dum momenteto li ekpanikas, perceptante antaŭ si longega vico da homaranoj kiuj foruzadas lin per siaj amo kaj aprobo. Sed tio baldaŭ finiĝas, kaj li eĉ trovas forton ekskizi rideton. Tiu evento ĉe lia vizaĝo kreskigas la entuziasmon de la homoj. Nun li sukcesas rigardi ilin: preskaŭ ĉiuj estas junuloj. De tempo al tempo alispeca rigardo, probable de policano. Fine Goldeno ankaŭ dis-



tingas la signifon de tiuj vivoj, kiam ili unuiĝas en skanda slogano: "Al — la — Pa-la-co, al — la — Pa-la-co!". Ne, li ne iros al la Palaco. Almenaŭ ne nun. Li iros al domo pretigita por li de lia eldonisto. Cetere, kie ŝi estas nun?

— Jen li alvenas — diras Anĝela Valen al la ŝoforo kaj malgrimpas la aerkusenan veturilon por renkonti Golde non Ĉirusvajtis, "la plej grava politik-filozofo de la nuna jarcento", tiel skribis la ekran-ĵurnalo ĉi-matene.

La veturilo ekmoviĝas inter pliaj aplaŭdoj kaj sloganoj.

— Ĉu jam laca? — Anĝela demandas.

— Ne. Ne vere. Nur, mi ne atendis tian akcepton. Ne tiom frue.

— Kvankam vi devus scii . . .

— Kvankam mi ja scias, ke miaj libroj tre popularas ĉe la junularo, malgraŭ siaj modestaj meritoj.

— Ne nur ĉe la junularo. — Anĝela ŝaltas ekraneton malantaŭ la dorsapogilo de la ŝoforo kaj rapidfingre aperigas la indekson de la ĵurnalo. — Jen, ĉeftitolo: "La reveno de Ĉirus".

— Mi ne estas Ĉirus. Ĉirus estis mia avo.

— Jes ja, sed vi ne rajtas pretendi, ke la homoj ĉiam literumu vian neeble longegan nomon!

— Neniu devigas ilin tion fari. — Goldeno ridetas kaj rigardas pli atente sian akompananton. La jaroj lasis

spurojn sur ŝia vizaĝo, precipe ĉirkaŭ la okuloj. Sed ŝia agmaniero konservas ĉarmon kaj allogon.

—Kiom vi aĝas nun? — li diras, kaj tuj aldonas: — Mi pardonpetas. Mi pensis laŭte. Senkulpigu, mi monaĥis dum dudek jaroj.

—Kvindek unu, kaj senkulpigita. La tempo pasas eĉ pli rapide ekster la karcero, ĉu?

Goldeno balbute klopodas respondi ion komplimentan.

La veturilo haltas antaŭ dometo en agrabla loĝkvartalo.

—Jen via sidejo — Anĝela diras. — Mi esperas, ke nenio mankos al vi. Memoru, je la kvina posttagmeze okazos via gazetara konferenco. Ĉio estas jam preta en via salono, vi vidos. Nun mi lasu vin, ĉu?

—Jes. Tro da emocioj en la lasta duonhoru.

Goldeno fermas post si la pordon kaj ekrigardas la novan ĉelon. Aŭ hejmon, li tuj korektas sian penson. Kuirejo dekstre. Ŝtupareto al la malsupro. Maldekstre salonego, certe tiu jam preta por la konferenco. Ŝtuparo al la supro. Li elektas la lastan. Inter la dormoĉambroj en la supra etaĝo plaĉas al li la plej malgranda, tre streta sed longa. Certe la arkitekto konceptis ĝin knaba ĉambro. Kvankam mallarĝa, minimume kvin paŝojn malproksimas la pordo de la fenestro: longa kaj streta, kvaŝaŭ vojeto. Li sidas sur la lito, apogas la kapon inter la

manoj. Similan ĉambron li havis, kiam ĉio ĉi komenciĝis. Kiam lia vivo ekveturis sur neatendita monorelo, kaj manpleno da tagoj forbalais ĉiujn planojn, dezirojn kaj antaŭvidojn.

## 2.

En 2196 Goldeno Ĉirusvajtis deĵoris ĉe la Kultura Ministerio. La juna viro partoprenis kun ioma deteniĝemo preskaŭ ĉiujn amaspreferojn de la epoko. Lia patrino, kiu sola edukis lin, sufiĉe frue instruis al li, ke en interpersonaj rilatoj plej gravas la formoj. Tial Ĉirus estis preskaŭ modele ĝentila, preskaŭ modele modera. Lian animon savis ĝuste tiuj preskaŭoj, ĉar la paŝetoj jam faritaj sur la vivovojo ne sukcesis vekti lian internan entuziasmon. Amikino li havis, spektaklojn li ĉeestis, precipe la ĉiomkinon, ĉar tiu samtempa invado de la kvin sensoj sukcesis agrable treni lin ekster la memo, kion ĝenerale li sopiris. Ĉio ĉi ne identigas feliĉan homon, sed Goldeno ankaŭ ne malfeliĉis: li faris kaj deziris ĉion kion samepokaj samurbaj samaĝuloj samtempe faris kaj deziris, nur ne plenkore konvikite. Tute nature post la studado de socisciencoj kaj monda juro malfermiĝis al li la pordegoj de ŝtata dungiteco. Li havis taŭgan preparon por ĉiuj fakoj, sed li aparte ĝojis, kiam li ricevis laborproponon de la Kultura Ministerio, ĉar temis ĝuste pri

la ŝtatero, kiu protektas kaj reguligas lian ŝatatan ĉiomkinarton.

Patron li neniam konis, kvankam dum longaj horoj, kiam infano, li rigardadis kelkajn hologramojn, kiujn panjo konservis en sekreta tirkesto. Tiuj montris simpatian ridetantan viron ne aparte similan al li, krom en la suba parto de la vizaĝo. Longe li ankaŭ provludis tiun rideton, ĝis li sukcesis kontentige imiti ĝin. Strangas la bildoj de neniam renkontitaj personoj: oni ne vere sukcesas kapti la veran eston; kvankam fiksitaj, ili pli nekapteble moviĝas ol vivaĵoj. Bildoj nur povas funkcii kiel memorigiloj: sed se nul memoron ili elvokas, tiam abstraktas kvazaŭ fantaziaj ilustraĵoj. Panjo ne amis paroli pri lia patro, kvazaŭ ŝi ne pardonis ties fruan morton. Ŝi tamen neniam klopodis konstrui novan familion, kaj plenkreska Goldeno komprenis, ke temis pri ofero al li. Fiere la patrino rakontis, ke ŝi mem elektis lian nomon, Goldeno, dum la familianoj male preferus tradician nomon: sed ŝi ĝuste celis rompi ĉian tradicion, kaj trovis tiun nomon en manlibro pri literaturo. "Kaj nacidialekte ĝi signifas ankaŭ oron, ĉar vi estas mia ora bebo", ŝi diris.

Post ŝia morto, jaron antaŭ sia finstudado, Goldeno transloĝiĝis al malgranda apartamento. Li vivis dum kelkaj monatoj kvazaŭ en anesteza stato, ebriligante sin per legado, ĉiomkino kaj altlernejaj taskoj. La nebulo en

lia kapo komencis maldensiĝi ĉe la enposteniĝo, kiam li ricevis komputilon en la sesa etaĝo de la ministeria konstruaĵo. Li okupis ĉambron kun iom pli aĝa kolego, Reno Gaŭdo, barbulo silentema kaj foje bruska, kiu entuziasmis nur pri sportaj eventoj. Malmulton Goldeno sukcesis lerni de sia samoficejano; bonŝance la oficejestro montris sin pli instruema. Jam komence la laboro aspektis stulte rutina: temis pri formularoj plenigotaj, leteroj respondotaj, kalkuloj kontrolotaj. Goldeno iom post iom ekmajstris ĉiujn fakojn.

En tiu tempo li konatiĝis kun Gaja. Ŝi amkunis unu alian eksan samlernejanon. Iun vesperon ili preskaŭ devigis lin kunmanĝi. Dum la vespero, kvankam li ĉeestis, ili kvereladis la tutan tempon. La postan tagon Gaja telefonis al Goldeno, ke ŝi jam liberas, kaj proponis promenadon. Goldeno pasive akceptis ŝian amindumon, kaj pli kaj pli al kutimiĝis al ŝi, kun la tipa hezitemo per kiu li alfrontis la viverojn ĝenerale konsideratajn pozitivaj, bonaj, nepraj.

Iun matenon la oficejestro vokis lin.

—La Komitato por la centsesdeka jubileo petis, ke ni sendu funkciulon por plenumi ĉiujn necesajn kontrolojn kaj eventuale de tempo al tempo certigi permesojn, aranĝi burokrataĵojn, ktp. Nu, ĉar vi ĉi tie en la oficejo jam konatiĝis kun la plej granda parto de nia laboro, mi venis al la ideo elekti vin por tiu tasko.

Goldeno ridete kapjesis kaj dankis. La oficejstro daŭrigis:

—Tiamaniere vi povos iom malŝimi ekster ĉi tiuj muroj.

—Ĉu la Jubilea Komitato havos centran sidejon?

—Nu, eble jes. Vidu, ĝuste nun ili arigas sian stabon, dungas portempajn laborantojn kaj ekprizorgas la ŝulditajn kontaktojn kun la ŝtato. Mi ne scias ĉu ĉion ĉi ili kunmetos en nur unu konstruaĵon aŭ sukcesos nur lui disajn oficejojn tra la urbo. Cetere, la centsesdeka jubileo de la fina venko ja gravas, kaj pri tio precipe konscias ni, funkciuloj pri kulturo. Sed ĝi ja devos esti io pli malgranda ol la centkvindeka, ĉu? Ne mi devus diri tion, sed mi rimarkas en la pli junaj generacioj ian maltrankviligan senzorgon al la fondaj valoroj de nia socio. Tiaj celebraĵoj ja povas tedeĝi, sed se la ŝtato ne organizus ilin, ĝi baldaŭ troviĝus sen fundamentoj. Tial mi esperas, ke venos solenaĵoj sobraj, ke oni ne superŝutu nin per retoriko, alvokoj al tradicio, kaj la cetera balasto.

Goldeno daŭre ridetis, kaj iam tiam kapjesis, sed ne malprudentis ion precizan aserti.

—Jen do mi lasas al vi la zorgojn pri la Zamenhofa Kampanjo, pri la Racia Arko, kaj pri diablo scias kion novan ili elpensos por revivigi la limfon interne de niaj lacaj lingvaj kaj kulturaj radikoj! Bonŝancon, junulo.

Tiam Goldeno jam aĝis tridek. En aliaj epokoj de la homaro tia aĝo jam sufiĉis por roli gvidanton, eĉ saĝulon. Sed ju pli longiĝis la meza homa vivodaŭro des pli prokrastiĝis la fino de studperiodo, geedziĝo, fakte ĉio, kio substrekas la plenan kaj respondecan eniron de individuo en plenkreskulan vivon. Kvankam liaj familiaj travivaĵoj jam komplete ĵetis lin senprotekte en la mondon, Goldeno eliris el la oficejstra ĉambro kun la sento de promesema bubo post la interparolo kun bonvolema onklo.

—Ha do — bonvenigis lin la kolego Reno Gaŭdo de la apuda skribotablo, — jen vi ekmigros for de ĉi tie. Gratulon.

Post hezito Goldeno tamen decidis diri tion, kion li pensas:

—Kial li ne donis tiun taskon al vi, pli sperta, pli aĝa?

—Ĝuste tial! Ĝi estas bagatela tasko. Vi perdos amason da tempo por malkovri, ke vere neniel gravas, ĉu vi bone aŭ malbone faras, ĉu vi ion faras entute. Tion mi spertis, kaj, ne dankon, jam sufiĉas.

Goldeno ne bone sukcesis distingi en la sinteno de la kolego mokon kaj ŝercemon disde eventuale vera amareco. Sed li bone sentis, ke liaj vortoj kaj pensoj ne precize kongruis.

## 3.

Atentu vian kapon! Ĉi tio ne estas promenejo — la inĝeniero aldone premis sian manon sur la ŝultron de Goldeno, por ke li trairu sendamaĝe la malaltan skafaldon.

—Jen, ĝuste ĉi tie. — Goldeno atente rigardis la montritan angulon, sed kapablis nur vidi serion da interkru-cantaj tuboj.

—La plej stranga el la strangaĵoj — daŭrigis la inĝeniero — hieraŭ finlabore ni kunmetis tiun parton, vi vidas, kaj mi bone memoras tion, ĉar mi kaj la muntisto ankaŭ iom kverelis. — Parolante li karesadis tubkonek-taĵon.

—Ĉu do iu, nokte . . . — interesiĝis Goldeno.

—Ne, ne, tio absolute ne eblas. Ni havas ne nur aŭto-matajn sed ankaŭ homajn gardistojn. Centprocente ne eblas, ke iu enŝteliĝis.

—Ĉu do vi suspektas iun el la stabo?

—Neniu ĉi tie kapablus fari tian laboron.

—Ĉu vi difinus tion saboto?

—Ne precize. Vidu, mi konscias, ke vi perfekte mal-kompetentas pri konstruado. Jen mi klopodos denove klarigi. Unue: tubaro por kunmeti, ĉu? Due: la metodo kunmeti ĝin. Trie kaj kvare, mia metodo, kaj tiu de la muntisto, tion fari. Ĉu klare, ĝis nun?

Goldeno hontete kapjesis. La inĝeniero daŭrigis:



—Kvine kaj fine: ĉi-matene la tuboj estas aranĝitaj en tute alia maniero.

—Nek la via, nek tiu . . .

—Ĝuste! En tria maniero tute ne antaŭvidita.

—Kaj ĉu mise aŭ danĝere?

—Ne! Tiu estas la punkto! Simple en alia maniero, pri komplika ol iu ajn ĉi tie kapablus.

Goldeno dankis la inĝenieron kaj meditis pri la ricevitaj informoj. En la konstruejo de la deka Racia Arko, la tradicia monumento, kiun la ĉefurbo kutimas starigi ĉiun dekjaran jubileon, okazadis neklasifeblaj organizaj misoj. Kvankam okupiĝi pri tio ne vere estas la tasko de kontakto-funkciulo de la kultura ministerio, Goldeno tamen decidis ŝovi tien sian nazon, ĉar la burokrata flanko de la laboro lasis al li sufiĉe da tempo por trankvile hejmiĝi en la vasta jubilea maŝino.

Unue, iun matenon antaŭ kelkaj semajnoj, evidentiĝis en la konstruejo, ke ĉiuj faklaboristoj bezonataj forestas, dum male nenifarante ĉeestas kaj grumblas la fakuloj pri tute aliaj laborpartoj. Post granda konfuzo, la konstruejestro sukcesis malkovri, ke la detale preparitajn laboristajn horarojn oni lastmomente ŝanĝis, alvokante do la malĝustajn homojn. Tio sumiĝis al preskaŭ tuta labortago perdita. Aliaj tagoj forvaperiĝis ĉar la tubfabriko ricevis falsan modifpeton pri la kvanto kaj kvalito de la tuboj provizotaj je difinitaj laborfazoj. Ne eblis identigi

la aŭtorojn de ambaŭ misoj, sed certis, ke la mesaĝoj venis de la konstrueja komputilo mem. Kaj nun, ne plu informadika, sed rekte materia manipulado, ĉe tiuj tuboj tra la skafaldo.

Goldenno cerbumis. Li bedaŭris, ke li uzis kun la inĝeniero la vorton saboto, ĉar efektive aliaj agoj, eventuale eĉ ne intencaj, povus klarigi la faktojn. Jam en la pasinteco, en periodoj de tro granda socia trankvilo, iuj decidis legi sub serio de tute normalaj, ĉiutagaj malglataĵoj la liniojn de mondodetrua komploto. Kvazaŭ la homoj ne kapablus tro longe vivi sen timo. Kvazaŭ la malraciaj fantomoj de la pasinteco, dioj kaj diabloj kaj koboldoj, per sia malapero lasus truon iel plenigotan. Tro ofte, tion li spertis dum studado kaj en la oficejo mem, neklarigeblajn aferojn eksplikas tre simplaj realaĵoj: nekapablo aŭ kulpa preteratento de la prizorgantoj. Kaj ĝenerale oni preferas paroli pri misteroj ol identigi la verajn kaŭzojn kaj puni ties respondeculojn. Se oni akceptas tiun racian eblon, pensfadene konkludis Goldenno, pluraj tiel nomataj misteroj reenirus la ordinaran fluejon de la realo kaj ne fariĝus paŝtejo por la homa bezono pensi sekretan grandan ordon malantaŭ la konstatebla mizera malordo kiu regas la mondon kaj ĉies vivojn.

”Ne veras, ke la konscio pri malordo nepre kondukas al pesimismo”, skribis Goldenno kelkajn jarojn poste, en

la karcero. ”Oni povas identigi kaŭzojn nur komencante de la kaŭzitaj faktoj. Se ne ekzistas plano aŭ projekto, tiam ankaŭ malbono hazardas. Do se ankaŭ malbono, same kiel bono, ne estas planita, kaj se nekredebla kaj neantaŭvidebla malbono povas realiĝi, kiel historio montradis, tiam ankaŭ nekredebla kaj neantaŭvidebla bono eblas. Ĉar ne ekzistas plano, ni mem devas agi. Nur homoj kapablas krei planojn.”

Sed tridekjara Goldeno, en la jaro 2196, ankoraŭ ne malkovris tiun serenan flankon de sia soleco. Li promenis interne de sia kapo la strangajn faktojn de la konstruejo kaj konkludis, ke ili konsistigas tuton vere tro malgrandan, por ke la ministerio petu polican enketon.

#### 4.

Sternite sur la fraŭleska lito en la mallarĝa ĉambro de sia nova domo, Goldeno la kvindekjara, la ĵusa eksmalliberulo, memoras, ke sur simila kuŝejo li kaj Helina amoris, kaj identan plafon-angulon li rigardis, kiam la kor-batoj malrapidiĝis kaj ŝia spirado iĝis pli konstanta kaj profunda. Helina signifis por li la revelacion, ke la spirito povas neniom ĉe la korpo, dum ĉia korpa sperto penetras en la animon kun senfina reeĥa efiko. Kvankam Helina devus reprezenti al li nur pasintaĵon eĉ iom amaran, ŝi definitive muldis ĉian lian senton pri virino aŭ pri

ĝuado. Ŝi fantomplenigis lian fantazion, kiam la korpo serĉis pretekstojn por malstreĉi voluptemon. Li neniam kapablis identigi la precizan momenton, kiam li samtempe malkovris, ke ŝi tute ne taŭgas por li, kaj ke li ŝin absolute bezonas.

Li ne povas forgesi vespermanĝon en luksa restoracio. Goldeno kutimis konsideri tiajn regalojn malŝparoj, sed tiun tagon li vere volis kontentigi Helinan, kiu pli kaj pli akiradis lokon kaj gravecon en lia vivo.

—Sed mi parolos unua, ĉar mi havas vere gravan anoncon — ŝi kokete diris post la foriro de rigida kaj parodie degna robot-kelnero. — Mi laboros! Ĝuste antaŭ unu horo mi ricevis la sciigon, ke mia prova interparolo donis pozitivan rezulton, kaj tial ili dungas min!

Ŝia entuziasmo estis kontaĝa. Goldeno partoprenis ŝian ĝojon.

—Kiu el la interparoloj?

—Ĝuste tiu por la publikaj rilatoj de la centsesdeka jubileo. Imagu, ni preskaŭ laboros kune, ĉu?

—Prave, foje eblos eĉ dumlabore renkontiĝi, sed — rimarkis Goldeno — se dungos vin la jubilea komisiono, tio daŭros nur kelkajn monatojn.

—Unu tutan jaron — asertis Helina — kaj post tio mi scios, ĉu mi ŝatas tian laboron aŭ ne.

—Jen avantaĝo — ironiis Goldeno. — Cetere, ĉu vi iam pripensis, kia terura stultaĵo estas tiu tuta datrevena afe-

ro. Kvazaŭ gravajoj nur memorindus laŭ hazardaj jarperiodoj.

—Ne hazardaj: naturaj. Jaro estas planeda revoluo ĉirkaŭ la suno. Ĉu vi memoras vian lernejon?

—Jes, kompreneble, sed ĝuste tial temas pri hazardaĵoj: naturaj ritmoj taŭgas por terkultivado, ne por la homa historio, kiu plantas siajn mejloŝtonojn kaprice kaj tute ne atentis la revenon de kvin- aŭ dek-obloj en la homa jarkalkulo.

—Tamen oni bezonas kriterion por fiksi tiujn . . . festaĵojn, ĉu?

—Precize, sed jen oni elektas laŭ hazardo, dum oni kredigas, ke tio ne estas hazardo sed ia efektiva reveno aŭ reokazado. Imagu, oni severmiene diras, "ĝuste antaŭ kvindek jaroj . . .", "ĝuste antaŭ cent sesdek jaroj . . ."

—Mi konsentas, ke cent sesdek ne estas tre harmonia cifero.

—Ĝi estas ridinda! Kial ĝuste nun, kial ne . . . ? — sed lia parolfluo stumblis al balbutado, ĉar li sentis ek-tuŝon ĉe la maldekstra suro, kaj kiam li konsciis, ke la senŝua piedo de Helina subtable supreniras lian kruron, li ĉesis lamenti la mallogikaĵojn de la socia vivo kaj kovris per la mano ŝian manon sur la tablo, dum malsupre li premkaptis inter la femuroj ŝian piedon lante moviĝantan.

—Ĉesu, jen la antaŭmanĝoj — li flustris, sed ŝi ne ĉesis. Post pli ol dudek jaroj la memoro de ŝia tiama senhonteco ankoraŭ kapablis veki lian deziron.

Kaj la lito, tiun liton. Ne nur la momentojn de gea senbrideco li memoris, sed ankaŭ la postajn ripozajn paŭzojn. La streta kuŝejo devigis ilin al tre ekonomia pozicio: dum ŝi zo-litere flanken buliĝis, li algluis sin malantaŭe, buŝo ĉe ŝia nuko, manoj sur ŝia brusto, ventro ĉe ŝia postaĵo, genuoj kontraŭ ŝiaj poplitoj, interkrucitaj piedoj, por venki la malvarmon kaj profiti la spacon. Rigardante de supre, iam ŝi ŝercis, la anĝeloj eble vidus ilin kvazaŭ geforkojn aŭ gekulerojn en manĝilar-tirkesto. Tiel kunmetitaj ili foje endormiĝis, foje babiladis ĝis venos la horo disiĝi aŭ renovigi la plezuron.

Fakte Goldeno ne kapablas elvoki ŝiajn okulojn, kiam ŝi rakontis pri la nekutimaj okazaĵoj en ŝia oficejo: sed li preskaŭ perfekte memoras la vibradon de ŝia korpo kaj la resaltojn de ŝia rido kontraŭ sia ventro.

—Kaj ĉu vi scias, kie mi trovis la tempon teksti al vi la kravaton? — Ŝi ne vere deziris, ke li divenu, tial li silentis kaj ŝi daŭrigis:

—En la oficejo mem, kaj tute malkaŝe! Imagu, kiel unuan aferon en la mateno la estro malkovris, ke ne plu troveblas kelkaj literoj en la komputilo. Provu pensi kiamaniere ni skribu sen la karaj malnovaj ĉoj, ŝoj, ĝoj kaj tiel plu.

Goldeno ekatentis: — Ĉu vi celas, ke oni sabotis la komputilon ĉe la publikaj rilatoj de la jubilea kampanjo?

—Nu, pli ol saboto aspektis vere ŝerco. Imagu, ke anstataŭ niaj literoj oni enŝteligis certajn muŝfekaĵojn. Iu diris al mi, ke ili apartenas al pratempa mediteranea alfabeto, kiun oni ankaŭ uzis ĉe fizikaj formuloj antaŭ la scienca reformo. Ĝia nomo iom similas la mian.

—La greka. La helena.

—Jes, ĝuste. Kaj imagu tiujn helinajn muŝfekaĵojn disetra oficialaj dokumentoj kaj leteroj!

—Ĉu oni malkovris la kaŭzon de la miso?

—Ne ĝis nun, laŭ mia scio. La oficeja informadikisto unue laboregis dum kelkaj horoj. La kompatindulo eĉ redeseignis ĉiujn mankantajn literojn kaj reenmetis ilin en la centran sistemon. Vana klopodo: la sistemo akceptis la enmeton sed tuj revomis la parazitajn karakterojn. Posttagmeze la ĉefo vokis informadikan policon. Kiam mi finis mian horaron, kaj ankaŭ vian kravaton, ili ankoraŭ senrezulte umadis tie ĉe la komputilo.

La silka kravato premiĝis tiam inter lia brusto kaj ŝia dorso. Ŝi pretendis, ke Goldeno surmetu ĝin tuj, des pli bone se sen aliaj vestaĵoj. Helina fabrikis ĝin per la tiujare plej furora porvirina ludilo: unu el tiuj porteblaj maŝinoj por programita teksado. Helina bonege elturniĝis ĉe tiuj aparatetoj. La kravato havis tre belajn kolorojn.

## 5.

Pro la nigriĝo de la okulvitroj, la vizaĝo de Zamenhof, vere aspektis kiel tiu de blindulo. Maljuna gardisto montris al Goldeno la tutan stokon en deponejo de la subtera fervojo.

—Vidu kion ili fifaris al sankta Zamenhofo. Kaj imagu, la tutan afiŝaron! Unu lenson post la alia ili krajone nigrigis, tiuj puguloj.

Post atenta rigardo de la afiŝoj, Goldeno male opiniis, ke oni faris tion per speco de antaŭpreparita stampilo. Sed li nenion diris, por ne haltigi la buntan elverŝon de la maljunulo.

—Tiuj ĉiesulinidoj! Kaj kiamaniere mi algluu tiajn fuŝaĵojn? Tiuj fikabeistoj, tiuj fekmanĝantoj!

Efektive, la malsanktigo perfekte efikis: forviŝi la okulojn de klarvida tuthomara bonfaranto, signifis malagnoski tion, kion li faris. La brila desegnaĵo de Itoma Kukujo, pro sia perfekteco eĉ oficiale anstataŭinta la plej konatajn fotojn de Zamenhof, akiris per tiu tre simpla retuŝo tute malajn nuancojn: la kompatinda Ludoviko vere ŝajnis almozulo, la tute novaj sunvitroj kaŝis ĉian akrecon de lia longvida rigardo, la homama rideto iĝis stulteta kaj senpova. Kaj, kio pleje gravis, la modifita bildo naskis ĉe la spektanto ne indignon, sed male sen-



bridan ridon. Goldeno ĉiam respektis tiun mondan heroon, sed neniam supozis, ke lin oni tiel facile kaj rapide povas transformi al moka duoblaĵo. Kvankam lia tasko ne precize antaŭvidis tion, li decidis, ke tiuj afiŝoj malaperu. Oni ne ridindigas simbolojn.

—Jes, forĵetu ilin, aŭ pli bone bruligu — diris Goldeno. — Kaj . . . pardonu min, vi diris vorton kiun mi ne kaptis, kvankam la urban nacidialekton mi ja komprenas. Ĉu "fikaperistoj"?

—Fikabeistoj. Mi diris "fikabeistoj" — la majunulo respondis. — Tio estas tre malnova insulto, el mia epoko, vi scias. Ĉu vere vi neniam aŭdis ĝin?

—Ne, vere ne. Ĉu ĝi havas ian signifon?

—Kompreneble. Tiuj kabeistoj estis la malamikoj de la homaro, antaŭ kelkaj jardekoj. Ili volis detrui ĉiun bonaĵon de nia organizita vivo, ili mortigis virinojn kaj infanojn, ĝenis la laboron, kaŭzis senokupitecon . . .

—Nu, nu, sed tio estis filmo, romano, aŭ kio?

—Ĉu filmo, junulo mia? Mi vidis per miaj okuloj, kiam la polico forportis ilin! Ili volis puŝi la homaron malantaŭen! Espereble tiu de la blinda zamenhofo estu nur amuzula ŝerco . . . Ĝi certe estas: la veraj kabeistoj bonŝance jam delonge putras en la tombo.

Goldeno lastfoje rigardis la difektitajn zamenhofajn afiŝojn.

—Tute detruu, ke neniu ilin vidu. — Kaj preskaŭ aŭtomate la frazo jene kompletiĝis en lia menso: ”same kiel tiu povra blinda Zamenhof vidas nenion”. Tiom gravas la vida senso en la homa vivo, li pripensis. Ĉio bona, komprena, konstrua esprimiĝas per vida metaforo. Oni neniam dirus ”tiu ideo bonodoras”, sed ĝi ja povas brilegi. Lumo signifas scion, kaj mallumo ne nur malscion sed ankaŭ malbonon.

Goldeno rekonsideris la sinsekvon de malgrandaj akcidentoj okazintaj ĉirkaŭ la jubilea programo. Kvankam li tutfirme repuŝis ĉian tenton hipotezi universalan komploton, tiuj faktoj ŝajne fontis el sama difinita sento, kiun li provis skizi jene: la nuna stato de nia socio eble ne tro plaĉas al la aŭtoroj de tiuj perturboj, sed inter ties facetoj ili precipe celas aspekton flankan, kulturan, kia estas lingvo. Baldaŭ, kaj bone li tion sciis, finiĝos la centesdeka jaro depost la oficiala alpreno de esperanto kiel universala lingvo fare de Tutmonda Asembleo. Do komuna lingvo naskiĝis eĉ pli frue ol monda registaro. Kaj kvankam tre baldaŭ evidentiĝis, ke komuna lingvo ne sufiĉis por tute forigi militojn kaj eĉ interpopolajn kverelojn, tamen de tiu mozaikero la lertaj patroj de la monda registaro sukcesis malrapide plekti sian politikan reton. Tiel ke en la unua kunsido de la universala parlamento oni tute ne bezonis pritrakti la lingvan problemon, oficiale jam solvitan. Kompreneble pasis kelkaj

generacioj antaŭ la ĝenerala enkonduko de la universala lingvo eĉ en la plej periferiajn terajn regionojn. Tamen tion oni atingis, kaj parto de la supereco sentata de la 21a jarcento kompare kun la pasinteco fontis el la solvo de tiu malnova, ĉiama homa problemo. Sed ĝuste tiun solvon la malgrandaj sabotoj ŝajne celis: la jubileon de la fina venko, preskaŭ nur kultura okazaĵo pri malnova memkomprenebla konkero jam ne plu aparte aktuala. La bildon de monda heroo, kiun li neniam aŭdis, eĉ ne lerneje, priironii. La konstruadon de la Racia Arko, provizora monumento destinita al sesmonata daŭro. Li ne sukcesis kapti la centran fadenon de tiu arane-reto, se reto ĝi estas. Goldeno konkludis, ke oni ne povas kunligi tiujn malgrandajn okazaĵojn en sencohava eksplik-modelo. Tial, li deduktis, araneo ne ekzistas.

## 6.

—Kie diable li estas! — Abrupta malfermo de la pordo.

— Aĥ, jen, ĉi tie. Pardonu min, ĉu vi ripozis?

La policisto videble sincere bedaŭras, ke li ĝenis la faman Goldenon Ĉirusvajtis, eble baldaŭan prezidenton.

— Ni estas el via eskorto. Dum momento ni freneziĝis, nenie povis trovi vin!

—Ĉu mi bezonas eskorton?

—Evidente jes, kompreneble.

—Ĉu do mi ankoraŭ estas speco de prizonulo?

—Ho ne, ne! Precize la malo.

Goldeno ridete provas mense bildigi la koncepton de malprizono.

—Ni kontrolas pri via sekureco — daŭrigas la policano

— ĉar post duona horo komenciĝos la gazetara konferenco, ĉu vi memoras?

—Jes, kvankam ne mi decidis tion.

Tiu policisto afablas kaj servopretas.

La unua sperto de Goldeno pri policanoj, antaŭ pli ol dudek jaroj, havis tute aliajn ecojn. Ĉefe, nur ili rajtis demandi.

—Kion vi scias pri la kabeistoj?

—Apenaŭ iom, mi parolis hieraŭ kun maljunulo . . .

—Lia nomo?

—Mi eĉ ne scias. Vidu, mi estas oficisto ĉe la Kultura Ministerio, kaj nuntempe okupiĝas pri kunordigado kun la jubilea komitato.

—Tion ni bone scias. Ŝlosila posteno. Tre taŭga por atencoj.

—Atencoj? Vi ne havas ideon pri la plateco de burokratio!

—Ĉu ok mortintoj laŭ vi estas plataĵo, idioto? — la unua policano minacis lin per pugno, la alia diris: — Ne frapu lin nun!

—Mi tute ne komprenas kion vi celas — diris Golde-  
no.

—Jen li ludas naivulon, nescianton! Ĉu vi intencas kre-  
digi nin, ke vi nenion scias pri la atenco en la informe-  
jo de la jubilea kampanjo.

—Ĉu estis atenco? Diable, tie laboras mia fianĉino,  
Helina Ahena: ĉu io malbona okazis al ŝi?

—Notu la nomon — diris la unua policano al la dua —  
povas temi pri komplico.

—Nun mi ege maltrankvilas. Ĉu vi bonvolas respon-  
di min?

—Vi ne bone kaptis la situacion. Demandas ni, re-  
spondas vi.

Efektive ili ne frapis lin. Sed la pridemandado en tiu  
oficeja kamero daŭris pli ol horon. Ili volis koni absolute  
ĉiun detalon pri liaj movoj kaj interparoloj en la lastaj tri  
semajnoj, sed videble ne aparte interesiĝis pri lia rakon-  
to, kvazaŭ ili jam ĉion bone sciis kaj nur atendus lian  
eraron aŭ kontraŭdiron. Dum la longa interparolo Gol-  
deno sukcesis konstrui al si eblan klarigon por tiu neku-  
tima okazaĵo. La saman matenon li faris buŝan raporton  
al la oficejestro pri la vizitoj faritaj en la antaŭaj tagoj,  
kaj ankaŭ iom resume pri la strangaj indicoj malkovri-  
taj. Li rimarkis leviĝon de la oficejstra maldekstra bro-  
vo, kiam li menciis la jubilean informan fakon kaj kiam  
li pave enĵetis la vorton "kabeistoj" por elmontri la ko-

non de tiu eksmoda interesaĵo. Post ne pli ol kvaronhoro la du policistoj eniris lian oficejon kaj invitis lin al tiu deponeja kamero.

Fine sola, li rapidis al sia ĉambro. Ĉiuj jam estis for, evidente pasis la laborfina horo. Li malsupreniris al la strato kaj haltis antaŭ publika holovidilo. Oni montris la bildon de ĉambrego ĉie sangoŝprucita. La komentario parolis pri "la terura atenco en la informa oficejo de la komitato por la 160a jubileo". Do la policanoj aludis ion realan. Goldenoj ŝanceliĝis aŭdante la vortojn "ok junaj vivoj forhakitaj de la bomba eksplodo". Ok! Tie laboras trideko da homoj: tre altas la probabloj, ke Helina . . . mortis. Li apogis sin per mano kontraŭ la holovidila vitro kaj rifuzis la suferigan hipotezon. Sed ĝi revenis al lia kapo pli kaj pli reala, konturita, kun koloroj, reliefe. — Tiaj aferoj ne povas okazi — li balbutis al si mem. Rerigardante la aparaton, li travidis fone de malhela bildo spegulaĵon de si mem: hirtaj haroj, elkavaj okuloj, kravato loza kaj malorda. La kravato kun multenombraj bluaj kaj violaj ondetoj.

## 7.

—Vi tre belas kun tiu bandaĝo sur la frunto. Bedaŭrinde ĝi nur blankas: se ĝi buntus kiel la kravatoj kiujn vi teksas por mi, vi aspektus kiel la reĝino de pracivilizacio.

Vere la vizaĝo de Helina eĉ pli palis ol medikamenta gazo. Sed Goldeno, retrovinte tiun, kiun li kredis morta, transfiguris ŝin per la forto de neatendita ĝojo. Ŝi tuse-tis, samkiel la rozo de la Eta Princo. Poste, feble parolis:

—Jen mi havis grandan aventuron. Imagu ke Gŭadjo, la oficisto tuj apud mia skribotablo, ricevis bombspliton en la kapon kaj mortis tuj. Kia teruro: sango estis ĉie, kaj bruo, kaj polvo, krioj! Sciu, mi ne svenis. Kvankam mi sentis sangon ĉe la kapo, kaj ne tro emis leviĝi. Ili forportis min per brankardo. Ekstere ululis sirenoj kaj mi vidis nekredeblan homamason. Ĝis ili fermis la ambulancan pordon. Mi ne fartas malbone nun. Ĉe la kapo estas nur skrapvundo. Mi eble lamos iomete dum semajno, simple pro la abrupta elseĝigo. Sed diable, mi ne volas, ke vi vidu min tia — ŝi ridetis, forte premante lian manon — foriru tuj!

Kvin vunditoj krom la ok mortintoj, jen la efiko de la bombo. Nun la holoĵurnaloj disripetis la hastajn kaj eble hazardajn deklarojn de la enketantoj: "Tre profesia laboro", "Nin ne frontas amatoroj", "Malmulte da indicoj . . . Ne, ni ne scias kiuj ili estas, kion ili volas".

—Sciu — daŭrigis Helina — mi rimarkis flugfoliojn surtere, kiam oni flegis min, kaj du homojn, verŝajne policistojn, kiuj kaŭris kaj legis klopodante ne tuŝi. La malbenitoj eĉ aŭdacis subskribi la fifaron! — ŝia voĉo ekrompiĝis plorsingulte, sed ŝi tuj reĝustigis ĝin, kaj daŭri-

gis pli mallaŭte: — Tiele ni baldaŭ scios, al kiu ni ŝuldas ĉion ĉi.

Goldeno komence ne intencis informi ŝin, ke la polico ŝajnis plenan nescion pri la kialoj de la atenco, ke oni tute ne parolis pri flugfolioj aŭ subskriboj, eĉ ne pri indicoj. Li tamen sindevigis atentigi ŝin pri iuj malagrablaj sekvoj:

—Mi konsilas, ne parolu pri tiuj flugfolioj. Unue, eble vi imagis ilin, post tioma ŝoko . . .

—Mi perfekte lucidis. Kaj eĉ rimarkis strangan skribon sur ili, nekompreneblan lingvon: dum momento mi eĉ pensis pri eksterteraj invadantoj. Tio certe ne troviĝis sur la planko kvin minutojn antaŭe, ĉar mi ĵus residiĝis post ioma babilpromeno tra la ĉambrego.

—Mi tamen konsilas al vi ne paroli pri tio. Se la polico ne menciis flugfoliojn al la ĵurnalistoj, eble tio signifas, ke ili ankoraŭ priekzamenas tiujn. Do, pli bone vi ne malkaŝu iliajn movojn. Komprenite?

— Mi komprenas nur, ke tio ne estas ĉio. Kial vi maltrankvilas?

—Polico pridemandis min — respondis Goldeno, — tiel mi eksciis pri la akcidento. Ili suspektas min mi ne scias pri kio. Imagu, kiam mi konsciis, ke la bombo eksplodis ĝuste en via oficejo, mi ege ĉagreniĝis, kaj nun eble ankaŭ vin ili suspektas, ĉar mi konas vin, kaj mi es-



tas konfuzita, nur ĉi tie en la hospitalo fine mi eksciis, ke vi vivas, kaj mi apenaŭ sukcesas kredi tion.

—Nu, nu — patrinis Helina — vi scias, ke tiuj ne kapblas agi afable kaj elegante. Vi troigas fantomojn! Kiel ajn mi komplicus, se jen mi kuŝas en hospitalo kaj . . .

—Sed vi vivas! Vi postvivis la eksplodon. Iu povus kredi, ĉar vi atendis ĝin!

—Mi konstatas nur, ke vi ricevis pli grandan ŝokon ol mi. Kompatinda Goldeno! Kial ajn eblus suspekti vin pri io malbona!

Goldeno konsciis, ke ŝi certe ne bezonas nun aldonan maltrankvilon, kaj apogis la kapon sur la liton, kaj lasis ke ŝi karesu ĝin. Ŝi pravas, kompreneble, li pensis, sed la insisto de tiuj policanoj aspektis tute nerutina.

Li decidis hejmenreveni piede. Tiu nekutima ekzerco povis, li opiniis, faciligi mediton pri tuta serio da vivgrava aferoj. Eble li nur frontis tiam ian aĝŝanĝiĝan psikologian limpunkton. Sed vere ĉiuj liaj kutimoj, projektoj kaj opinioj lastatempe ricevis decidan draŝadon. Dum li pripensis sian fruan adoleskon, la paŝoj, unu post la alia, kvazaŭ rekondukis lin al la tempo, li memoris difinitan momenton, kiam li decidis rezigni pri io, kio apartenis al li: depost tiam li gajnis pacon, aprobon de la patrino, perspektivojn. Ĉion ĉi tamen li aliris kun rideta deteniĝemo, ne plenkore: plena koro restis kun tiu alia memo, la prirezignita. Goldeno rapidigis paŝadon esperante

pliprofundigi sian memoraĵon, ĝisatingi la forlasitajn sensacojn. Sed vane: ŝvebis sur ĉio la rideto de lia patri-no, malantaŭ kiu li tamen ankoraŭ sukcesis videti ĵusan timindan maskon de kolero. Li fermis la okulojn kaj preskaŭ stumblis: ne eblis forigi ŝin, eventuala sekreto lia kaŝiĝis malantaŭ ŝia gardo. Direkte al pli fora pasin-teco li devos do iri ĉirkaŭvojon. Hejme lin atendis nean-taŭviditaj direktiloj.

## 8.

—Mi havas la plezuron finfine prezenti al vi Goldenon Ĉirusvajtis, pri kies verkoj kompreneble vi ĉiuj jam sci-as. — Dirante tiujn vortojn, Anĝela Valen turniĝas al li kaj ridetas. Ili du sidas ĉe malgranda tablo kun verd-tuka supro, evidente celita al kartludado. Antaŭ ili sidas, staras, kaŭras trideko da geĵurnalistoj, el kiuj pli ol du-ono havas ĉe la okulo holovidan mikrokameraon. — Nun mi lasas lin al viaj demandoj — ŝi daŭrigas — sed ne forgesu, ke la homo nur antaŭ kelkaj horoj eliris el prizono post dudekjara restado.

Pluraj manoj tuj leviĝas, Anĝela kontrolas la vicon kaj donas la parolon.

—Mi estas David Fjedan, el TMO. Oni parolas pri vi kiel pri nova federacia prezidento. Ĉu vi pretas akcepti tiun taskon?

Aŭdiĝas susurado ĉe la ĵurnalistaro: tiun demandon ĉiuj havas en la kapon, sed oni ne atendis tian abruptan komencon.

—Kvankam multaj ne estas informitaj pri tio — respondas ridete Goldeno, — ne vere ĉio eblas ene de prizono, kio eblas ekstere. Antaŭ ol diri al vi mian penson, mi deziras bone informiĝi pri kelkaj detaloj de la situacio, kiujn mi ne bone sukcesis profundigi ĝis nun.

—Viktorja Lakovis, Postpoŝta Inforeto. Tamen vi ja konscias, ke vi efektive estras la plej gravan opinimovadon de post jardekoj.

—Bruoj pri tio atingis min. Tamen, vidu, mi ne planas fuĝi antaŭ taskoj, kiujn oni volas doni al mi. Sed mi ankaŭ ne aparte sopiras ilin. Ĉiel, mi devas antaŭ ĉio kompreni, kiu, kaj nome de kio aŭ kiuj, intencas doni al mi tiujn taskojn.

La ĵurnalistoj malkvietas. Al ili ne plaĉas tiu prudento. Ili bezonas sekajn frazojn, difinitajn decidojn, preskaŭ sloganojn, ĉar en tio konsistas ilia laboro: redukti eventojn, homojn kaj parolojn al rapida io facile komprenebla.

—Kiom vi ŝuldas al la Kabeistoj? — demandas alia voĉo.

—La samon kiel al la registaro: dudek jarojn da prizono. — La ŝajna spritaĵo de Goldeno finfine ekvarmigas la etoson: la ĵurnalistoj havos ion por raporti.

—Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, oni opiniis, ke vi ricevis justan kondamnon pro via aniĝo al la Kabeistoj, sed post longa meditado vi forlasis tiun movadon. Kompreneble, oni nun scias, ke vi neniam partoprenis ilian agadon. Sed ĉu vere ili eĉ ne influis vian politikan penson? Via avo . . .

—Lasu mian avon! De mia naskiĝo mi portas sur la ŝultroj la pezon de lia ombro. Vi eble legis en miaj libroj, ke mi ankoraŭ ne vere sciis pri li kiam mi estis arestita.

—Sed ĉar via penso aspektas kiel sintezo inter la oficiala registara vidpunkto kaj la opozicia, la influo de la Kabeistoj . . .

—Aŭskultu. La Kabeistoj, inkluzive mian avon, estis nur teroristoj. Movitaj eble de grandiozaj ideoj, sed ĉefe de individua kaj grupa nekapablo prijuĝi faktojn kaj perspektivojn. Oni neniam volis paroli pri ili, ĝis antaŭ kelkaj jaroj eĉ tute ne eblis tion fari publike, ĉar ilia sola ekzisto ŝajnis makulo en mondo feliĉigita de la fina venko. Sed oni devas scii ke ankaŭ en politiko ĉiu ago produktas reagon. Post la eventoj de 2037, la antaŭaj esperantistoj ekdividis sin en du grupojn: la entuziasmuloj, kiuj sincere ĝojis pro la efektiviĝo de la granda sonĝo de l' homaro sed ankaŭ tuj ekprofitis de la grandaj novaj eblecoj, kiujn la enkonduko de esperanto favoris je labora kaj perlabora niveloj; kaj la dubemaj, kiuj asertis ke, ĉar esperanto estas ne nur lingvo sed ankaŭ pensmanie-

ro, oni ne rajtas trudi ĝin al ĉiuj homoj sen antaŭe konvinki ilin. Pluraj esperantistoj ĉesis tiam aktivi pri la lingvo; unue ĉar kreskanta nombro da junaj talentoj pliakrigis la konkurencon ĉe ĉiuj taskoj postulantaj lingvokonon, sed ja ankaŭ ĉar tiu speco de idealistoj ekmalŝatis esperanton tuj kiam ĝi ekvenkis. Antaŭ kvin jaroj aperis verko de la psikoantropologo Taso Karavaro ĝuste pri "Ĉesismo kaj la fina venko". Tie la aŭtoro skizas analizon pri la psiko de tiuj, kiuj ĉesis labori por kaj pri esperanto ekde ĝia oficiala akcepto; ili apartenas, laŭ Karavaro, al la karaktertipo de la nekontentigeblaj, subtipo masoĥisma, nuanco defet-ama; la danĝera speco de tiu grupo estis ĝuste la Kabeistoj, kiuj forte kontraŭbatalis la enkondukon de la universala lingvo demagogie subtenante la pigrecon de la malkleruloj kaj eĉ organizante bomb-atencojn kaj la kidnapon de la fama tonkina profesoro Han Fri; ĝuste kiam ili atingis tiajn ekscesojn, la registaroj, pli kaj pli emaj agnoski ĝeneralan plan-aŭtoritaton al Tutmonda Asembleo, decidis elradikigi la misherbon. Datiĝas de tiu periodo la unuaj oficialaj klopodoj malpermesi, en certaj cirkonstancoj de la socia kaj labora vivo, la uzadon de la naciaj lingvoj; tio komence estis ruzaĵo por malkovri la ribelulojn, kiuj, pro sia infaneca sinteno antaŭ la vivo, ankaŭ ne kapablis sekvi rigran strategion de sekreteco, naive sin montradis kaj tiel praktike memdenuncis. Mi varme rekomendas al vi ĉiuj

la legadon de la eseo de Karavaro. Ĝi troveblas en ĉiuj infoduktoj.

—Graŭlo Malŝjo, gazeto "Kiel Kaj Kial". Ĉiuj scias la plej lastan historion de la Kabeistoj, sed ne ĉiu bone konas ties originon.

Leviĝas grumbloj el la ĵurnalistaro, kaj Anĝela intervenas.

—Kial ne, kial ne tiu demando? La kontribuo de Goldeno Ĉirusvajtis forte baziĝas sur tute nova relego de historio. Kial do oni ne dezirus aŭdi de li unu el tiuj rekreatoj, aŭ rerakontoj?

—Ankaŭ mi ne atendis prelegi ĉi tie pri historio, sed, se vi volas, mi promesas koncizecon kaj tamen respondos la lastan demandon.

Neniu protestas, tial Goldeno daŭrigas:

—La Kabeistoj prenis sian nomon de prapioniro de esperanto, la polo Kazimierz Bein, kiu kutimis subskribi artikolojn kaj tradukojn per la mallongigo KB, kion li kontraŭfundamente prononcis ka-be; en la antaŭvenka esperanto-movado, li estis fama ekzemplo de "samideano", kiu decidis tute ne plu okupiĝi pri la lingvo; la elpaŝo de Kabe estis aparte suferiga kaj malesperiga por la tiama movado, ĉar li estis eble la plej eminenta vortaristo kaj tradukisto en la epoko. Por la postvenkaj esperanto-rifuzantoj, Kabe iĝis speciala heroo, pramontrin-

to de kontraŭracia vojo, en kiu ili trovis ian profundan nepravigeblan justecon.

Goldenopaŭzas, trinkas akvon el glaso, kaj daŭrigas:  
—En 2037, 150 jarojn post la naskiĝo de esperanto, Tutmonda Asembleo, naskita sur la cindroj de Unuiĝintaj Nacioj, decidis enkonduki esperanton kiel internacian helplingvon. En la postaj jaroj, ĉu pli ĉu malpli rapide, la diversaj ŝtatoj aldonis al la temoj de baza instruado ankaŭ esperanton, pere de komputilaj programoj. Post dek jaroj, malgraŭ fortaj rezistoj fare de instruistoj en pluraj landoj, la efektiva facileco de la lingvo komencis pli kaj pli evidentiĝi, unue ĉe la klerularo, poste ĝenerale ĉe la popolo. En 2057 jam ĉiuj junuloj de la mondo konis la lingvon sufiĉe por legado de bazaj dokumentoj kaj por elementa komunikado. En 2067 en pluraj labormedioj oni ekmalpermesis naciajn lingvojn. En tiu periodo fortiĝis la reaga movado, kiun oni nomis kabeista. Ties anoj rifuzis esperanton kaj celis reveni al la naciaj lingvoj, pli kaj pli neglektataj. Post la rigoraj sekvoj de la Kanaria milito, oni eksterleĝigis la Kabeistojn, ĉar "danĝeraj kontraŭraciaj penskrimuloj". Dum tiu tempo floreĝis la esperanta literaturo, kaj pluraj naciaj lingvoj preskaŭ estingiĝis. En 2097 universala lingvo jam estis memkomprenebla realaĵo; malgraŭ tio, plu restis internaciaj problemoj, kaj eĉ detempaltempaj lokaj militoj. Milito mem jam parolis en esperanto, informadiko ple-

ne esperantiĝis, video-arto jam ĝenerale adoptis la lingvon en ĉiuj siaj produktaĵoj, kiuj tiel fariĝis senpere surmerkatigeblaj en ĉiuj partoj de la mondo. La kabeista movado, post nelonga klopodo kaŝe agi, fakte malaperis, postlasante nur publikaĵojn alvokantajn al la lukto kontraŭ "tiu terura uniformiga monstraĵo kreita de misgvidata racio". Unu el la kialoj de la fiasko de la Kabeistoj devenis de tio, ke ili strikte malpermesis al si paroli esperanton, tial ĉiuj iliaj komunikaĵoj devis esti tradukitaj en plurajn naciajn lingvojn kun plurobligado de la kostoj, tempoperdo kaj aliaj malfacilaĵoj. La registara kulturpolitiko ĝis antaŭ nelonge klopodis kiel eble plej komplete silentigi la pasintecon: ĝi emis prezenti la nunon kiel la rezulton de aplikita racieco, kaj malfavoris la memoron de la mallumaj tempoj antaŭ la glora epoko. Ĝis la lasta kaj sanga eksplodo de la nov-kabeista agado ne lasis eblecojn: tiuj fantomoj venis el la pasinteco, kaj por venki ilin, necesis koni ties devenon.

Venas aliaj demandoj, pluraj pri la libroj verkitaj de Goldeno Ĉirusvajtis en prizono, do pri la perspektivoj de Tutmonda Asembleo laŭ lia nova vidpunkto. Iuj ĵurnalistoj denove provas elbuŝigi al li asertojn pri liaj estontaj politikaj movoj, sed fiaskas kiel la antaŭaj. Fine de la posttagmezo Goldeno vere lacas.



—Kial vi elektis la plej malgrandan ĉambron? — demandas Anĝela starante ĉe lia lito. Goldeno kuŝante respondas:

—Vi scias: necesas al kutimiĝi al novaĵoj, sed malrapide.

Post apenaŭ perceptebla hezito, Anĝela salutas lin kaj fermas la pordon.

## 9.

Se li intencas indiki al si mem la ĝustan momenton, kiam lia vivo ŝanĝiĝis, Goldeno elvokas la senton de katastrofo skuanta lian tutan ekziston, kian li spertis reveninte al sia apartamento post la hospitala vizito al Helina. La tago jam estis sufiĉe peza, sed jen, ĝi ankoraŭ ne finiĝis. Goldeno ne posedis multajn aĵojn, kiel kutimis ĉe la okcidentaj popoloj fine de la dudeka jarcento. Lia vivmodelo pli similis al la postmilita de la dudekunua, kiam oni al kutimiĝis ne nepre posedi aĵojn de tempo al tempo bezonatajn, sed ilin grupe, aŭ klube, aŭ eĉ kvartale akiri por laŭvica dispono. Tial Goldeno havis nur necesajojn, esencaĵojn: des pli ŝoke prezentiĝis antaŭ liaj okuloj la spektaklo de renversitaj tabloj kaj seĝoj, malremburita fotelo, alterigita malgranda libraro, dismetitaj lito kaj baneja ŝranko, ie tie eĉ deprenita gumplasta kovraĵo de la muroj. La apenaŭa enmeto de la ŝlosilo en

la truo sufiĉis por malfermi la pordon. "Ĉu mi ne ŝlosis ĝin?", la penso daŭris fulmrapidan momenton, antaŭ ol nova, pli kompleksa klarigo evidentiĝis. Ĉe la plej larĝa vando disponebla, imponis ŝprucfarbita subskribo: du grandaj nigraj leteroj — KB. Goldeno sentis sin kvazaŭ en koŝmaro. Li ricevis damaĝon kaj ne povis kompreni kial kaj de kiu. Li sidis tere, sur duonvolvita tapiŝo: ankaŭ sub ĝi ili esploris. Li krucis la krurojn, antaŭenklinis la dorson, liaj polmoj fermiĝis ĉe la nuko. En tia ŝirmi-ta pozicio, li klopodis alfronti la neelteneblon. Lian tutan ekziston li konstruis klopodante rezigni pri superfluaĵoj, grade reduktante siajn bezonojn, serĉante helpon en si mem anstataŭ en io ekstera, kaj jen atako al lia tre eta io lasis lin senspira, forte skuita. Ĉu do tio ne sufiĉis? La strategio, per kiu li akceptis, ke li ne havas patron, kaj superis, ke patrino frue mortis, ĉu tiu delikata konstruaĵo falus antaŭ la dismeto surplanken de kelkaj aĵoj? Temis pri simbola detruo: la konstato, ke eĉ ne pri tio li rajtas sekuri, ke ĉiuj oferoj kaj etiĝoj ne ŝirmas lin kontraŭ malbono kaj perforto. Nur post tiu konstato li re-levis la kapon kaj rigardis la misteran skribaĵon: ko-bo, kio diable estas tio? Venis al lia menso tiuj strangaj mallongigoj, kiujn oni spertas en informadiko, aŭ en vinproduktado. En kiu ajn specifa agadkampo, fakte. Kaj kiu estas lia agadkampo? Ministerio, kulturo, plej lastatempe la jubileo. Pluraj nekutimaĵoj okazis depost kiam li

ricevis tiun taskon. Inkluzive la terura pridemandado de policianoj. Ĉu ili denove? Ili ne bezonus tion fari kaŝe. Ĉu do la aliaj? Jes ja, ĉar ekzistas aliaj, tiuj kiuj preskaŭ mortigis Helinan kaj nigrigis la okulvitrojn de Zamenhof. Li apenaŭ kapablis formuli la penson: ĉu la teroristoj? Goldeno denove buliĝis sur la tapiŝo kaj konfuzite recerbumadis pri la ebla signifo de la lastaj eventoj, ĝis laceco pli fortis ol maltrankvilo kaj li cedis al dormo .

## 10.

Goldeno ekkomprenis kioman pezon la ĉiutaga laboro havas en lia fuĝa kaj rifuĝa vivsistemo, kiam li finfine trovis malstreĉiĝon, la postan matenon, nur antaŭ la ekrano de lia oficeja komputilo. Li ektajpis, sed post kelkaj frazoj rimarkis, ke de tempo al tempo tajpita litero ne aperas. Li rapide vidis, ke temas pri ĉiam la sama litero: ĉo, la komenco de lia familia nomo. Li puŝis butonon ĉe la komunikilo, por voki la riparan servon, sed tre malgranda strangaĵo altiris lian atenton. El komisuro de lia tajpilo elstaris papereto, ĝuste ĉe la flanko de la ĉo-klavo. Li provis eltiri ĝin, sed liaj fingroj estis tro grandaj por tiu faro. Tial li eliris el la oficejo kaj per lifto atingis la riparan laboratorion. Kiel kutime neniu videblis tie. Sur labortablo li rimarkis plurajn ilojn. Li rapide prenis pinĉilon kaj reiris al sia ĉambro. Per la tre fajna

ilo li sukcesis elpreni la paperan enmetaĵon. Li denove provis tajpi, kaj jen tuta serio da belegaj ĉo-literoj. Ĵeton-te la papereton al la cindrigilo, li ankoraŭfoje haltis pri-pense kaj decidis ekzameni ĝin. Li rulpremis ĝin tien reen inter la palpkusenetoj de la dika kaj montra fingroj, kaj ĝi disvolviĝis kvazaŭ mikroskopa papiruso. Jen la skribaĵo kiun li mirigite legis sur ĝi:

Pardon, φιλόζ, wir mistook hombre.

La unua vorto aspektis kiel la normala "pardonu", la dua verŝajne estis matematika formulo, la tria enhavis ne plu uzatan praliteron, el la kvara rekoneblis nur la sufikso mis-, la kvina ŝajnis kruciĝon inter "homo" kaj "ombre". La tuton Goldeno supozis skriba formo de nacidialekto, la arkaika lingvaĵo foje ankoraŭ aŭdata en foraj montaraj regionoj aŭ periferiaj pacifikaj insuletoj. Li ne sciis, ke tiun parolaĵon oni ankaŭ povas skribi. Kio pri la signifo? Komence li pensis pri amiko, kiu profesoras pri esperantistiko en la ĉefurba universitato; poste, li tamen decidis, ke ne valoras la penon perdi tiom da tempo por tiu bileto, kiu eble hazarde enŝteliĝis en lian klavaron. Li tamen ne povis preteratenti tion, ke aĵoj malofte memstare enŝteliĝas ien. Lia sekva penso do rilatis la demandon, kiu metis ĝin tien. Ĉu lia apudulo, la kolego Reno Gaŭdo? Ne eblas: tiu idioto interesiĝas nur

pri radglitado kaj aliaj sportoj, nur laŭ la spekta vidpunkto, kompreneble. Ĉu la oficejestro?

En tiu tempo Goldeno tre malfacile kapablis distingi la homojn de iliaj taskoj. Li ĉiam supozis apriorie, ke, ekzemple, instruisto kapablas instrui, ke estro kapablas gvidi, kaj ke ĝenerale ĉiu aparta reprezentanto de kategorio enkorpiĝas je la plej alta nivelo la kompletan ecaron de tiu kategorio. Stranga mispercepto, kiun tute malkonfesis la simpla ekzisto de la koncepto "profesieco". Laboron aŭ taskon oni povas plenumi pli aŭ malpli profesie; kio ne egalas al pli aŭ malpli bone; tio signifas, ke ĉie en la socio troviĝas homoj, kiuj proponas sin por laboroj kaj taskoj, pri kiuj ili havas nenian ideon nek inklinon. Tiam Goldeno ankoraŭ ne kaptis tiun subtilaĵon: li fidis policanon, obeis oficejestron, aŭskultis instruiston, kaj necesis longdaŭra konstato de maltaŭĝeco, por ke li komencu ekdubi pri ies kapabloj. Sed tiam li apenaŭ sukcesis bremsi siajn spiton kaj malestimon. Mallonge, li eble pretendis de ĉiuj iom tro, kaj eble ne ĉiuj tute kulpis, se iliaj kapabloj ne ĝisatingis la atendojn de Goldeno.

*Verkita ĉ. 1995, reviziita en 2003.*

*Kia omaĝo estas nefinitaĵo? Mi povus respondi per la dediĉaj versoj de Ludovico Ariosto:*

*né che poco io vi dia da imputar sono,  
che quanto io posso dar, tutto vi dono*

*kvankam donacon etan mi proponas,  
kion mi havas, al vi ĉion donas.*

*Sed mi ankaŭ aldonos, ke ankoraŭfoje, ĉu rekte ĉu malrekte, Liven Dek sukcesis rekonduki min al esperanto, lingvo kaj movado, por ke mi konstatu kiom ĝi influis min, kian grandan lokon ĝi okupas en mia vivo, kiom ĝi ligiĝas al ĉiuj miaj spertoj kaj atingoj, ankaŭ al tiuj, kiuj unuavide neniel rilatas al ĝi.*

*Ĉu vere la rakonto ne estas finita? Mankas eble priskribo de la enkarcerigo de Goldeno Ĉirusvajtis kaj iom pli detala trarigardo de lia politika filozofio. Sed premis al mi precipe fantazii la konsekvencojn de eventuala fina venko.*

*Por plendoj turniĝu al la vera respondeculo, Liven Dek: eĉ la tiparon kaj programon per kiuj mi nun tajpas provizis li.*

I S T V Á N E R T L

## KAFO PRETA

La Ĝenerala Direktoro etendis pigran manon al grata skroto, kaj pensis jam pri kompleza amplekso de sia movo, kiam, inter du paperstakoj de la troŝarĝita labortablo, la brokante aĉetita, griza telefonaparato denove (. . .) elruktis sian agresan blekon.

—Halo! Centra Oficejo.

(.)

—Kio? La vortojn de Joseph Goebbels? Nu, ne precize.

(.)

—Hm. Ke ajna atento estas bona, ĉu negativa aŭ pozitiva? Eble. Sed, verdire, en la nuna tempo mi sincere preferus kompletan mankon de atento al nia Oficejo.

(.)

—Morgaŭ je la dekunua kaj dek? Dankon. Mi iros preni Vin.

La Direktoro remetis la aŭskultilon kaj dum sekundo pensis pri koralrifoj super kristalklara maro. Liaj fizikaj okuloj dume ne perceptis la transfenestran realon antipode prozan: nek la hotelon La Tivornya, kies gastoj neniam restadis pli ol horon, nek la rapidmanĝejon



Broodje Aap, kies fritoj haladzis rancan oleon, nek eĉ la paron da pimpaj moldavaj putinoj, preterpasantaj la drogkafejon Senpensi. Nur la grinca alveno de tramo 44 al la fronta haltejo ĉe Verkeerdekeelgatschietsbaanlaan vekis lin el la sonĝa torporo.

Retropuŝante sian restemige remburlitan brakseĝon, li rektigis sin kaj dum momento reciprokis la ratecan rigardon subvitran de la portreto Majstra, kaj poste turnis la kapon liven, de kie la Profeto mienis konkurence kaj deloge, tenante eternan cigaredon. Sorbinte el tiuj eksrigardoj sian dozon da historia responsosento, la Direktoro paŝis al la pordo, kaj kap-elŝove kriis tra la domo:



—Kafo preta!

Ne nur ke tio ankoraŭ ne estis vero, sed krome neniu el la oficistoj atendis la rutinan vokon je tiu malortodoksa horo. Tamen, tra ĉiuj etaĝoj Pavlove ekfunkciis salivaj glandoj, rapidiĝis mesaĝtajpaj fingroj, frapiĝis necesaj pordoj, kaj dum tempero en ĉambro Klaŭstralio eĉ la mura fendego, kovrita per kalendaro de Mona Turismo por 2003, forgesis plilarĝiĝi. De la libroservo ĝis la niĉo de TUJO, de la eksa fotorivelejo ĝis la nuna monricelejo, ĉio pleniĝis de fekundaj antaŭsentoj kafeinaj. Ene de sep minutoj kaj dek sekundoj la tempo de kafopretiĝo la sepdek du ŝtupoj de la Oficejo liveris sescent tridek tri kilogramojn da oficistoj al la kafoĉambro Marwin Brug. (Normale devus esti sepcent dudek du, sed Erwin Tastl estis malhelpata veni.) Komprenante la gravon de la aktualo, eĉ pensi-obĵetanto Ŝimo Fumojeviĉ rezignis sian iamajn cigaredon por alŝoviĝi al la aliaj.

Ektroninte sur sia hontinde skeletiĝinta seĝo, la Ĝenerala Direktoro portis rigardon panoraman al la ĉeestantaro, kafon al siaj lipoj, kaj malbonan novaĵon al ĉiuj.

—Karaj kolegoj, estu preparitaj al neeviteblaĵo. Morgaŭ alvenos Raneto Krozeti kaj Miela Liphari.

G I A N C A R L O F I G H I E R A

## SUPERHEROOJ KAJ HEROOJ EN LA "NIBELUNGA KANTO"

### La kastelo de la sagaoj

**E**n Bavario (suda Germanio) elstaras la romantika Kastelo Neuschwanstein, rezidejo de Ludoviko II, la reĝo (19-a jc), kiu konsideris kulturon pli grava ol politikon. Antaŭ li, aliaj ŝtatestroj superŝatis poezion kaj muzikon — ili eĉ estis de arto fascinitaj —, kiel Nerono, Laŭrenco la Mirinda el Florenco, Frederiko II el Sicilio kaj Frederiko la Granda el Prusio, sed neniu el ili endanĝerigis sian tronon pro tia hobia aŭ viv-intereso.

Ludoviko II el Bavario protektis Wagner, la komponiston de operoj dediĉitaj al la ĉefa ĝermana sagao, tiu koncernanta la Nibelungojn; la sama sagao estas pentrita sur ĉiuj vandoj de la Kastelo Neuschwanstein, kiu ŝajnas naskita el revo kaj arkitekture similas al kastelo de Blankneĝulino en la filmo de Walt Disney.

Parolante pri sagaoj, tuj altrudiĝas komparo inter la menciita "Nibelunga Kanto" (12a jc) kaj la antaŭaj epopeoj de la okcident-eŭropa literaturo, ĉefe la antikvaj Homeraj verkoj, la mezepokaj kavaliraj cikloj — breto-

na (reĝo Arturo), karlo-reĝa ("Chanson de gestes") — kaj la posta priheroa poezio de Ariosto ("Orlando furioza") kaj Tasso ("Liberigita Jerusalemo"). Multnombraj herooj rolas en tiuj ĉi verkoj, sed nur en la pragermana lingvo de la Nibelunga Kanto rimarkeblas rampanta distingo inter preskaŭ du kategorioj de herooj: la simplaj "herooj" ("Held") kaj la "kavaliraj superherooj" ("Recke"). Pri ili temos la subaj linioj.

## **Kavaliraj superherooj kaj simplaj herooj**

La enhavo de la Nibelunga Kanto estas samtempe legenda kaj historia.

Fakte, la unua parto de la verko priskribas la legendajn heroojn de Sigfrido, dum la dua vualas la historian neniigon de la Burgunda Regno fare de la Hunoj; al ĉio tio romaneske miksiĝas la venĝo de Krimhildo, pri kio ni parolos poste. Rimarkindas, ke ĉiuj historiaj nomoj aperas ŝanĝitaj, ekz. Atilo nomiĝas Etzel, la reĝo Teodoriko el Verono fariĝas Dietrich el Berno.

Revenante al la distingo inter superherooj kaj simplaj herooj, ni diru ke, same kiel en la klasikaj epopeoj, la kavaliraj superherooj aŭtomate identiĝas kun la nobelaj militistoj, kiuj batalas por superaj noblaj celoj: Uliso (Odiseado) por sia fina hejm-reveno, Hektoro (Iliado)

por la devo defendi sian patrolando, Eneo (Eneado) por la neevitebla destino fondi estontan mond-imperion, Romo.

Krome, la mezepokaj bretonaj kavaliroj de la Reĝo Arturo serĉadis la sanktan Gralon (Percevalo) kaj dume mortigadis drakojn, liberigadis princinojn kaj neniigis la malbonon. La karlo-reĝaj paladinoj (Orlando) defendis la kristanan mondon kontraŭ la miskredantoj kaj volis (tiel imagis Tasso) liberigi la tombejon de Kristo. La kavaliroj ĉiam rajdis ĉevalon, simbolon de nobelularo, tre ofte moviĝis en sorĉita medio kaj vivis sub konstanta minaco de nevidebla magiaĵo (fama estas la sorĉisto Merlino). Ne mankis en tiuj-ĉi epopeoj bildigo de supera, abstrakta amo, kantata de migrantaj menestrejoj, nome la korteza amo (Lanceloto), kiu fariĝos poezia institucio en la provenca literaturo, por idealigita damo plej ofte eĉ edziniĝinta (Ginevro).

Ĉu ĉio tia troviĝas en la Nibelunga Kanto? Por respondi al la demando, ni analizu la enhavon de la verko kaj la sintenon de ĝiaj ĉefludantoj: Sigfrido, Hagen, la tri fratoj, Brunildo, Etzel kaj Krimhildo.

## La enhavo

Nur en la 12a jarcento diskoniĝis la Nibelunga Kanto, poemo en versoj konsistanta el du partoj. En la unua

parto (ĉ. 25% de la tuto) estas rakontataj la heroaĵoj de Sigfrido, lia edziĝo kun la mirinde bela Krimhildo kaj lia fia murdo. La dua parto estas plene dediĉita al la sekva venĝo fare de Krimhildo.

Malgraŭ tio, ke la Kanto entenas elementojn de ĝermanaj popol-legendoj, ne troveblas en ĝi spuroj de la praĝermana panteono.

La eventoj okazas en la Burgunda Regno kaj ŝajnas al ni modernuloj iom sovaĝa; eble tial Wagner iom modifis la rakonton en siaj operoj.

## La ĉef-ludantoj

### Sigfrido

Li estas la sola kaj vera Superheroo de la Kanto. Laŭ mi, la aliaj kavaliroj povas esti konsiderataj nur simplaj herooj. Nur ĉe Sigfrido renkontiĝas la subaj cirkonstancoj de tradicia epopea verko.

**Aventura migrado.** La princo Sigfrido forlasas sian reĝan kastelon kaj migradas tra la mondo. Li unue laboras ĉe forĝisto, poste venkas drakon kaj submetas la subteran gnom-popolon nomatan Nibelungoj, kies reĝo li fariĝas.

**Sorĉita glavo.** Same kiel Aĥilo (Iliado), ankaŭ Sigfrido estas nevundebla, krom ĉe unu sola korpo-parto. Al

tio aldoniĝas, ke li posedas sorĉitan glavon, Balmung, (komparu kun "Excalibur" de la reĝo Arturo, "Durlindana" de Orlando ktp); krome, li povas surmeti sorĉmantelon, danke al kiu li fariĝas nevidebla.

**Korteza amo.** La amo inter Sigfrido kaj Krimhildo apartenas al la supera poezia kategorio de ĝentila "korteza amo" (germane "Minne", france "amour courtois" ktp) prikantata dum la mezepoko de bardoj ("Minnesinger") veturantaj de kastelo al kastelo.

**Fideleco.** Al siaj perfidemaj bofratoj nia superheroo dediĉas senliman fidelecon: li helpas ilin defendi ilian reĝo-landon kaj ebligas al la reĝo Gunter akiri Brunhildon kiel edzinon.

**Superhomeco.** Ne nur liaj forto kaj kuraĝo, sed ankaŭ lia karaktera grand-animeco havas supernaturajn dimensiojn.

Unuvorte dirite, Sigfrido estas la pura kavaliro sen timo kaj sen makulo.

## Hagen

Post Sigfrido, Hagen ludas la duan plej gravan rolon en la Kanto. Fiera, orgojla, senkompata kaj kruela estas la feŭdulo Hagen, ĝismorte blinde lojala al sia reĝo. Pli ol homo, li ŝajnas ofte batal-maŝino!

Ĝuste pro sia false komprenita koncepto pri fideleco, kulpas li pro har-hirtigaj krimoj, kiuj malindaj estas por

vera heroo. Temas inter alie pri lia superruzo kontraŭ Krimhildo, cele al perfida murdo de ŝia edzo Sigfrido; la mortigo de ŝia sepjara fileto ce la kortego de la patro, la reĝo Etzel, kaj la forrabo de la Nibelunga trezoro, kiun Krimhildo rajtus heredi post la morto de la edzo Sigfrido.

Kaj ĉiujn tiujn fiaĵojn faras Hagen kun la profunda konvinko defendi sian reĝon kaj agi por la supera bono de Burgundio.

Kiel okazas la murdo de Sigfrido? Pro tio, ke Hagen certas, ke Sigfrido strebas al la burgunda trono, ekkomplotas Hagen kun la fratoj de Krimhildo (bofratoj de Sigfrido) por sekrete murdi la superheroon. Per ruzo Hagen eltiras de la naiva Krimhildo la sekreton, kie troviĝas la mistera sola korpo-parto, kie Sigfrido estas vundebla.

La superheroo estas perfide dorse traonardita en arbaro dum li sen kiraso trankvile trinkas ĉe fonto. Poste, Hagen forrabas, kiel supre menciite, la Sigfridan trezoron ricevitan de la Nibelungoj kaj kaŝas ĝin en sekreta loko profunde en Rejno, kie ĝi — laŭ la legendo — ankoraŭ nun troviĝas.

Spite de ĉio tio, Hagen estas brava batalanto (ĉefine li preferas morti ol malhonore kapitulaci). Li obeas al du moraloj: unuflanke li kondukas kiel malestiminda murdisto kaj trompisto, aliflanke li aŭdace kaj senespere preskaŭ sola batalas kontraŭ Huna armeo. Valoras sub-

streki, ke la lasta batalo meze de flamoj, fumo, falantaj muroj en la manĝo-pavilono estas ĉefverko de la kavallira literaturo de ĉiuj tempoj.

Hagen ne posedas la moralajn ecojn de superheroo, sed ni rajtas klasifiki lin kiel simplan heroon.

## La tri fratoj

Tute maldecidemaj ŝajnas la tri fratoj de Krimhildo, inter kiuj Gunter, la reĝo de Burgundio. Ili alternas de, unuflanke, amo al la fratino kaj dankemo al Sigfrido, la savanto de la trono kontraŭ invado de la danoj ĝis, aliflanke, supozita ŝtatpostulo, kiun ilia feŭdulo Hagen kaj la venĝo-soifanta Brunhildo, edzino de Gunter, obsede al ili bildigas.

La tri fratoj nur duon-kore aliĝas al la konspiro, kiu el la fratino faros vidvinon. Nur la plej juna frato Giselher montras iajn homecajn sentojn kompare kun la aliaj fratoj. Li eĉ travivas dolĉan amon al princino, sed tio nur estas paŭzo en la eventoj.

Konklude: escepte de ilia kuraĝa sinteno en bataloj, nenio alia nobla rimarkeblas ĉe la fratoj. Ni hezitas nomi ilin eĉ simplaj herooj: maksimume ili estas bravuloj.

## Brunhildo

Origine kruela princino same forta kiel 12 viroj, ŝi mortigas siajn svatiĝantojn, se ili ne kapablas venki ŝin en



konkuro. Brunhildo fine estas venkita de la nevidebla Sigfrido, kiu kaŝe intervenas helpe al la bofrato Gunter, oficiala svatiĝanto.

Kiel jam dirite, Brunhildo enkorpigas la kruelecon kaj la fiecon mem. Ŝi estas la plej malaminda figuro en la Nibelunga Kanto.

## **Etzel**

Historie, la jam menciita Etzel — reĝo de la Hunoj kaj dua edzo de Krimhildo — nomiĝas Atilo.

Tre surprize estas, ke hodiaŭ Atilo estas kromnomata "Vipo de dio" (al li estas dediĉita en Budapeŝto giganta monumento), sed en la Nibelunga Kanto li (sub la nomo Etzel) ne aspektas kiel timiga vipo, sed kiel senpova senila maljunulo, plene submetita al la edzina volo. Li observas tremante terurite la sangajn eventojn kaj la finan batalon ĉirkaŭ si.

## **Krimhildo**

Malgraŭ sia centra rolo en la Kanto, Krimhildo ricevas en la nunaj linioj la lastan lokon, pro tio, ke per sia morto ŝi fermas la epopeon kaj la nekalkuleblan nombron de venĝoj kaj kontraŭvenĝoj.

Tamen, kian diferencon ni rimarkas inter la komenca superbela virgulino Krimhildo kaj la posta vidvino Krimhildo! Preskaŭ du diversaj estaĵoj!

Pro la morto de la edzo Sigfrido, Krimhildo fariĝis amara, acida megero, kiu al ĉio pretas, por atingi la finan venĝon. Ŝiaj metodoj nun fariĝis sanktaj, senatente al ties malmoralecon kaj kruelecon. Kaj eĉ se tio viktimigas ŝiajn proprajn fratojn! Ekzemple, ŝi ne hezitas reedziniĝi al malproksima nekonato (Etsel/Atilo) kaj lin patriĝi, nur por manipuli lin cele al propra venĝo.

**Unua akto.** Krimhildo invitas siajn fratojn kaj Hagen, la murdiston de Sigfrido, al la kortego de sia nova edzo Etsel. La invititoj timas ruzaĵon kaj alvenas en akompano de armeo.

**Dua akto.** Rompinte la tradician sakralan leĝon de gastigo, ŝi ĵetas la hunajn soldatojn kontraŭ siaj burgundaj sampopolanoj.

**Tria akto.** Okazas la lasta batalo meze de brulanta pavilono dum gasta festeno, en kiu la Burgundoj partoprenas en kirasoĵ. Fine, Krimhildo senkapigas la jam mortantan kaj katenigitan Hagen, antaŭ ol ŝi mem estas murdita de alia batalanto. La nokto falas super la Burgundoj kaj la Burgunda regno, en kiu lumis nur unu superheroo, iĝas mondo de herooj kaj duonherooj.

*Torino, aprilo 2003*

GERRIT BERVELING

## AL LIVEN DEK

Amik' Hispana, mi bedaŭras  
Ĉe laŭdo via ne ĉeesti:  
Beletron nian kune festi  
Hodiaŭ vin honore laŭras.

Ĉar kiu verkas, tiu daŭras:  
Vin daŭra volas mi atesti.  
Amik' Hispana, mi bedaŭras  
Ĉe laŭdo via ne ĉeesti.

Se Hispanujo ne plu Maŭras  
Subtere tamen sen modesti  
El Mezepok' ĉi povas resti  
Kulturo-sprono, kiu daŭras.

Amik' Hispana, mi bedaŭras.

G O N Ç A L O N E V E S

## LA NIGRA KATO

**K**ara amikino,  
La peza aŭgusto jam transvadis sian duonon. De fore nin algestas la aŭtuno paraŝut-folia. Ĉi tie la ĉielo plue serenas kaj sufokas, rikane pri la ŝtormoj kiuj plagas Eŭropon norde kaj centre. Aŭstrio, Ĉeĥio kaj Hungario dronas diluve. Miloĵoj da homoj senhejmaj, kaj materiaj damaĝoj preterkalkule. Ĉi tie jam videblas svagaj primicoj aŭtunaj, por la okuloj kiuj scias rigardi. Hieraŭ mi rimarkis flavaj iom da platan-folioj en ĉi kvartalo dormeja. Multaj jam fleksas la petiolon sub la pezo de l' sezono malfrua, sin liberigas de la patrino trunko, kaj ilin ne anstataŭas novaj kompanoj. Ĉiu sezono kaŝas la memoron de l' antaŭa kaj kovas la deziron de l' posta. Jen la eterna ciklo nin memorigas ke nenio eternas, krom la memoro kaj la deziro — ĝermoj kaj fermentoj de la Supra Sezono kiun ni nomas Amo.

Hieraŭ mi iris al la strataj rubujoj de l' placo kie mi loĝas. Eble vi memoras ke tie ĉiam staras kvaropo da verd-plastaj paralelepipedaj ujoj arŝino-altaj, kien la najbaroj ĵetas siajn noditajn sakojn da restaĵoj kuirejaj kaj ali-speca fatraso hejma. Mi volis ekzili mian balaaĵon,



stringitan en sako jam fetora — loĝi sola generas ja malpli da fatraso, kiu akumuliĝas dum tagoj kaj tagoj ĝis plenigo de povra sako, kaj dume ĝi konspire fermentas, varbante odorojn ne tro plaĉajn. La grandon de l' sako mi jam reduktis, sed ankoraŭ ne atingis kontentigan nivelon de parfuma salubro.

Kiam mi apudiĝis al la rubujoj, mi sensis figuron kiu de ili deiĝas per salto subita kaj lerta. Mi fiksas la rigardon sur la celo de l' salto kaj tie okulis nigran katon.

Enorma — neniam antaŭe mi vidis ĉi-grandan! — vil-abunda, kun tufa vosto kaj disapertaj okuloj bril-blauaj. Ĝi fikse rigardis min en felisa pozo, senmove fuĝ-preta, por la okazo, se ĝi sentus eĉ apenaŭan danĝeron de la flanko de ĉi fremda ĝenulo. Ni kungluis la rigardojn, en dialogo de divenoj. Ĝi lekis la lipojn, kaj nur tiam mi kaptis la mesaĝon kiun antaŭe mi ne legis en la okuloj. Draŝita de malsato, la besto volis min ekster la rubuja tereno, por plue festeni la fatrason de l' homoj. Mi deiris, lante, regrese ĝis la pordo de mia konstruaĵo. De tie mi ankoraŭ rimarkis ke la kato singarde apudiĝas al la rubuoj, tenante sur mi flaman rigardon. Mi eniris kaj liftis supren, trafite de brila ideo.

Ĉu vi memoras ke mi parolis al vi pri agaca toŭfuo, satutira per fremdaj saporoj budenaj, aĉetita en la supermarkto *El Corte Inglés*? Jen tiam venis al mi en la memoron restaĵo kiun mi gardis en la gela komforto de l' fridujo. Ĉu la felison delectus tiaj frandaĵoj modernaj? Nur sperti por certi. De supre — vi ja scias ke mi loĝas sur la sesa etaĝo — mi observis la nigrulon preta salti rubujen. Ĝi sentis sin libera kaj senminaca. Mi prenis pecon da toŭfuo, envolvis ĝin en ĵurnalan ĉifonon kiu ĉe mi restis — plur-utila montriĝas nia gazetaro — kaj tuj liftis suben. Kiam mi ree atingis la ruban regnon, la kato jam descendis, kaj sin regalis ĉe unu el la ujoj, ion kraigante en la buŝo. Vera festeno sen ĝeno, kaj tiel ĝin

absorbis la dent-laboro, ke ĝi ne rimarkis miajn alpaŝojn. Ĝi jam troviĝis je man-trafa distanco, se mi volus ĝin predi, kiam la vento alblovis hom-odoron, kaj tiam ĝi sagis al la plej proksima rifuĝejo, la ombro de parkita aŭto. De tie ĝi kroĉis sur mi paron da vaĉaj okuloj, ekzamenante ĉiun el miaj gestoj.

Mi elpakis la pecon kaj ĝin ĵetis sur la mezon de l' vojo inter mi kaj la kato. La besto regresis iom pli kaj haltis, rimarkinte ke mi ne avancas. Mi deiĝis regrese, observante la disvolviĝon de l' invito. La miaŭulo alpaŝis la nutraĵon, ĝin sensis lip-hare, flaris, transturnis, lekis — kaj deiris. Nenio helpis. Hodiaŭ mi eble aĉetos por ĝi paketon da lakto, por la okazo, se ĝi denove trafos sur mian vojon. Kaj mi ŝatus ĝin revidi, mi konfesas. Ne nur pro la societo, sed eĉ tial, ke ĉi besto estas la kato malplej dorlota kiun mi konas. Ĝi duone linkas, duone tigras. Kruda, impresa, sovaĝa, kun rigardo fiero kaj feroca. Neniam mi ĝin forgesos. Mi tute ne koleras ke ĝi ne manĝis la toŭfuon. La scienco ankoraŭ ne retortis vegetarajn katojn. Sed ni atendu kaj paciencu. Dume mia nigra amiko plu bankedos nian skorion.

A B E L M O N T A G U T

## LA DEK SES FUNDAMENTAJ MALREGULOJ

O ni ofte aŭdas kaj legas la aserton ke nia lingvo estas sensescepta, absolute regula. Ekzemple: "La gramatiko de esperanto estas tre logika, multe pli logika ol iu ajn gramatiko de la naciaj lingvoj, kaj ĉefe: ĝi ne havas esceptojn", "la simpleco de la gramatiko, kiu enhavas neniun escepton", "koncerne la sensesceptan gramatikon, ne necesas emfazi, ke tio estas ekskluziva avantaĝo de la lingvo de Zamenhof". Similaj asertoj vaste spureblas tra nia tuta propagandomondo. Jen kelkaj el ili (kun fontindiko), nur el la du lastaj jardekoj:

"La REGULECO, kiu toleris neniun escepton al la reguloj . . . Ĉiu lingva funkcio estas ĉiam esprimita per la sama elemento kaj tiu ĉi elemento esprimas ĉiam la saman funkcion." Pol Denoel, *L'Esperanto dans l'enseignement, "Sonorilo", Wilrijk, 1982, p. 9.*

"La gramatiko enhavas 16 sensesceptajn regulojn . . ." *Edward Symoens, Al nova internacia lingvopolitiko. La propedeŭtika valoro de Esperanto, Esperanto-dokumento, Rotterdam, 1992, p. 15:*



”[Oni zorgos] ke esceptoj al la reguloj gramatikaj kaj vortfaradaj ne akceptatu.” Macel Leereveld en *L’esperanto*, revuo de itala Esperanto-Federacio, aprile 1998, p. 14.

”Ĝia gramatiko, plej simpla, enhavas nur senesceptajn regulojn” en informa faldfolio de Kataluna Esperanto-Asocio (1990); ”Ĝi estas logika lingvo, absolute regula kaj sen esceptoj” en informa faldfolio de Barcelona Esperanto-Centro (1996); ”[La gramatiko] konsistas el nuraj 16 reguloj, sen esceptoj aŭ malregulaĵoj” en la 80-paĝa informa broŝuro *Pro Esperanto* (1997) de Hispana Esperanto-Federacio, p. 35.

La listo estus facile pliampleksigebla. Sed ĉu tio respondas al la realo? Ni analizu ĉiun unuopan regulon de la Fundamenta Gramatiko. Mi citos laŭ la teksto aperanta en la verko de Kalocsay kaj Waringhien, *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto [PAG]*, UEA, Rotterdam, 1980, 3a eldono, rearanĝinte la regulojn laŭ la originala ordo.

**1** *Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj. Rim. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.*

Jen unu el la malplej klaraj reguloj. Unuavice ĉar "la aliaj lingvoj" tute ne havas unuecan uzadon de la artikolo. Ekz. en pluraj latinidaj lingvoj kiel en la kataluna, se mi rajtas baziĝi sur mia lingvo, kion la unua fundamenta regulo ŝajne permesas, oni diras: "Posa't el barret" (Surmetu la ĉapelon), sed en la angla "Put on your hat" (Surmetu vian ĉapelon). En la angla oni senartikole diras: "Cats are stupid" (Katoj estas stultaj), sed ne en la franca: "Les chats sont stupides". Ne en ĉiuj artikolhavaj lingvoj oni diras: Ludoviko la dekkvara, k.s. En la kataluna ĝenerale oni uzas difinan artikolon antaŭ personaj nomoj: la Maria, l'Enric . . . kio ne retroveblas en aliaj lingvoj. Aliflanke la propre esperantaj subreguloj estas konfuzaj aŭ tre komplikaj. Vidu en PAG, paĝoj 95-100: la *Odiseado*, sed *Hamleto*; festonomoj senartikolas: Epi-fanio, Pasko, Kristnasko . . . "Sed oni trovas esceptojn: la Pasko (Z); la Pentekosto (Z)". Krome: la Unua de Majo, la Kristokorpo, la Palmaĵoj . . .; ĉe geografiaj nomoj: la Ruĝa Maro, sed Ĝeneva Lago; sezonoj kaj aliaj tempodividoj "ĝenerale ne toleras artikolon": "fariĝis somero", "de mateno ĝis vespero". Sed: "venis la vintro" (p. 98).

Plie oni povas resendi al la fundamenta (mal)regulo n-ro 16 kiu tekstas: *La fina vokalo [ . . . ] de la artikolo povas esti forlasata . . .* Ĉi tiu kontraŭregulo mem estas escepta, kiel konstatablas pro la duboj de la poetoj ĉe la elizi-

ado. Ĉu licas: "sur l' ĉielo", "kaj l' ludanto", "antaŭ l' kosma solo", kaj similaj?

Mi ne komentos la nedifinan uzon de la vorto "unu" en la zamenhofaj: "En unu vilaĝo loĝis du viroj . . ." "Unu vesperon, kiam li sidis hejme, ekstere fariĝis terura malbonvetero . . .", "Antaŭ multaj jaroj vivis unu reĝo, kiu tiel amis belajn novajn vestojn . . ." (Fabeloj de H.C. Andersen, p. 13, 55, 107). Tio kontraŭdirus la aserton: "Artikolo nedifinita ne ekzistas".

Resume, la unua fundamenta regulo havas gravajn esceptojn kiuj ne facile regeblas.

**2** *La substantivoj havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo [ . . . ]*

Eklearnanto de la lingvo sur la unua paĝo malkovras ke pluraj inaj substantivoj "(mal)regule" finiĝas per a: Maria, Elizabeta . . . *Ili kaptis Elzan, Liza kaj Paŭlo, Gerda malaperis.* Multaj propraj nomoj kiuj ja estas substantivoj havas neniun finiĝon: Zamenhof, Kalocsay, Baghy, Auld, Boulton; aŭ iun ajn: "La patrino de Tambu vidas la bildon . . ." "La patro de Aka kaj Lute havas kvardek jarojn" "En ĉiu monato Aka skribas leteron al Karu." (*Esperanto aŭtodidakte*, 1989, p. 46, 100, 101), "Al Maria, Karina kaj Hajnal pro respektive refoja pacienco, babi-

lemo kaj ĉarmo” (dediĉo en *Tendaraj Tagoj*, kajero unu, de Stefan MacGill, 1993). Ĉi-kajere sur paĝo 6 tekstas: ”Natalio estas svisino, Tuzla estas jugoslavino . . .” Krome oni povus citi multajn bibliajn kaj klasikajn proprajn nomojn: Lucifer, Miĥael, Levjatan, Vojski . . .

Kaj kion diri pri la vortoj hodiaŭ, morgaŭ kaj hieraŭ? Krom adverboj ili estas ankaŭ substantivoj, kiel konstatablas laŭ la PIV-aj difinoj kaj zamenhofaj ekzemploj: ”Inter la hieraŭ kaj hodiaŭ staris tiu prova mateno”; ”ĉiu morgaŭ havas sian zorgon”; ”morgaŭ estas la amata tago de mallaboruloj”.

Finbate oni devas rememori la jam cititan 16-an kontraŭregulon: *La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo*. Do, la substantivoj povas finiĝi je iu ajn litero. Ĉi tiu malreguleco plej multe rimarkindas dum parolado aŭ laŭlegado, kie ”apostrofo” forestas. Precipe substantivaj unusilaboj neniel distingeblas disde la ceteraj.

Laŭ la sama regulo ekzistas nur du kazoj, sed en la praktiko troveblas almenaŭ unu plia: la e-kazo: ”tio gravas vilaĝe, ŝi forestas ĝardene, tombe ĵuri venĝon, tempeste forlasis la ŝipo havenon, barelringe vasta ĉapelo” (esprimoj de Grabowski en *Sinjoro Tadeo*, 1918, cititaj de K. Kalocsay en *Lingvo, stilo, formo*, p. 57-58); ”Ana, pluas / sama tultiptapiŝo surĝardene, / samaj veneroj staras / kolone ĉe la vaskoj, / kariatidas laŭbe kaj balustre . . .”

(Miguel Fernández en *El la sonoraj soloj*, 1996, p. 77). Sed ankaŭ Zamenhof ĝin uzis samvalore: "unu vesperon, kiam li sidis hejme; mi restos hodiaŭ dome." (PIV-a ekzemploj).

Supozeble la dua fundamenta regulo ne implicas ke oni povas ĝin returni, t.e., ke ĉiuj o-finiĝantaj vortoj estas substantivoj, ĉar tiam oni kontraŭmetus: maltro, retro, kotopo . . . Sed sufiĉas pri ĉi punkto.

**3** *La adjektivo finiĝas per a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. [ . . . ]*

Kio alia ol adjektivoj estas (laŭ la tradicia gramatiko, surbaze de kiu Zamenhof formulis tiun sian) jenaj korelativaj formoj: "Kiu viro alvenis? Neniu viro, sed virino. Kies ĉapelo ĝi estas? Mia ĉapelo ĝi estas. Tiu ĉi domo ne estas ĉies domo, sed mia, la gepatra domo".

Se oni emus konsideri ke "tiu", "ĉies" kaj la parencaj formoj ne adjektivas, tiam ankaŭ ne "mia" aŭ "gepatra", do, ĉi tiuj vortoj ne devus finiĝi per a . . . Aliflanke, kio estas la vortoj ĉi kaj *nul* en esprimoj kiaj "ĉi libroj", "nul homoj"? Ĉu ĉi-lasta ne ekivalentas al neniuj aŭ neniusecaj homoj? Do: tradicia adjektivo eksterregula. Plie, kelkaj plus aliaj similspecaj kvantaj adjektivoj, nun klasataj kiel determinativoj, escepte estas uzataj senfinaĝe en poezio almenaŭ ekde Antoni Grabowski. "Nur an-

koraŭ kelk-steloj lumas el profundo” (*Sinjoro Tadeo*, p. 281).

Ni jam menciis la oftan a-finaĵon ĉe inaj propraj nomoj. Konklude, ne ĉiam adjektivoj finiĝas per a nek ĉiuj a-finaĵaj vortoj estas adjektivoj.

**4** *La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin [ . . . ]*

Tamen, oni deklinacias la unuan: ”unuoj idealoj por la tuta homaro”; ”la regado de unuoj gentoj super aliaj”; ”unuoj objektoj venis en unujn manojn, aliaj en aliajn manojn”; ”unun el viaj fratoj lasu ĉe mi” (ekzemploj ĉerpitaj el PIV, la du unuaj de Zamenhof). Aŭ ĉu kelkfoje ”unu” ne estas numeralo, sed nedifinita artikolo? Tiam bonvolu legi la unuan fundamentan (mal)regulon laŭ kiu ĝi ne ekzistas.

Aliflanke troveblas la varianto ”un” por ”unu”. Ekzemple: ”Un! Du! Tri!” en la lernolibro *Assimil* aŭ en la traduko de *Tirano Banderas*, HEF, Madrid, 1993, p. 25.

**5** *Pronomoj personaj: mi, vi, li, ŝi, ĝi (pri objekto aŭ besto), si, ni, vi, ili, oni; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.*

Pri la pronomo "ĝi" estas dirate ke ĝi rilatas al objekto aŭ besto, sed: "la infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi" (el-PIV-a zamenhofa frazo). Cetere, mankas en la listo la pronomo "ci". Kaj kion diri pri la uzado de la refleksiva "si"? Ĝi estas unu el la plej gravaj falpuŝiloj de la esperant-lingvanoj. Preskaŭ neniu plene trafas la ĝustan uzadon. Ĉi-kaze la teoriaj reguleco kaj senescepteco estas nur miraĝaj. Iom simile al la uzo de la akuzativo, kiun ni preterglitis en la dua punkto, sed longaj libroj skribeblas ĉi-rilate: "Mi pentras la arbon ruĝa" kaj "Mi parolas esperanton bela". Kiu facile regas la regulojn kaj subregulojn? Kaj kion diri pri la novaj pronomoj iŝi, ŝili, ŝi/li kaj similaj?

**6** *La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon -as; la tempo estinta -is; la tempo estonta -os [ . . . ] Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo esti kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas de.*

La tempo estinta alprenas la finaĵon -is. Sed: "ŝi plendis ke pluvas". Ĉu "pluvas" ne rilatas al tempo estinta? Oni devas aparte lerni la uzon de la tempoj en la subjunkciaj propozicioj, kiel montras la 58 densaj paĝoj en PAG (p. 302-360). Formoj de la pasivo: laŭ la regulo ili formiĝas

ĉiam pere de la verbo esti. Sed en la praktiko ni renkontas: ili vidatas, troveblas, troviĝas, manĝindas, evitendas, legindas, laŭdatu . . . La prepozicio ĉe la pasivo laŭregule estas de. Sed oni uzas interalie: *fare de, far* . . . La fundamentaj participoj ne akceptas, laŭ la plena teksto de la sesa regulo, la formojn -unta kaj -uta, sed ĉi lastaj aperadas kaj parole kaj skribe: "eĉ perfiduntan ŝin mi volas mia, la ofendutoj pardonu" (PIV-a ekzemplo). Menciendus la -ata / -ita polemiko, sed ne sufiĉus ĉiuj paĝoj de ĉi libro. La imperativo kelkfoje formiĝas per la simpla radiko: "Halt!", "Marŝ!" Fine, ekzistas neverbaj vortoj kiuj finiĝas verbosimile, ekz.: oni, ili . . .

## 7 *La adverboj finiĝas per e; gradoj de komparado kiel ĉe la adjektivoj.*

Sed kio krom adverboj estas la vortoj: tiam, ĉiel, nenial, iom, ajn, pli, plu, jam, nun, tuj, jen . . . ? Kaj kio estas la aŭ-finaĵaj vortoj: baldaŭ, ankoraŭ, apenaŭ, preskaŭ, ankaŭ, morgaŭ, kaj similaj, en la esprimoj: "ili venos morgaŭ", "hieraŭ neĝis plu kaj plu", "mi restos hodiaŭ dome"?

Krome, la pseŭdofinaĵo "aŭ" estas kelkfoje ellasebla, laŭ propono de Zamenhof en 1892. Jen kelkaj ekzemploj el *Sentempa Simfonio* (1987), poem-antologio en traduko de Fernando de Diego: "Signif' ilia kuŝas / arkane,



malantaŭe. / Kaj ank' ilia nomo." p. 121; ". . . Kaj tia estas la terura / la stulta forto sen pupiloj / ancor' pelanta ĉi virinon / iri kaj iri sur la trotuaro . . .", p. 135. Por oponiantoj ke nur Fernando de Diego enkondukis similajn novaĵojn, necesas memori ke jam Grabowski avangardis almenaŭ per apostrofado de presk' (adverbo), anstat' (prepozicio) kaj apen' (adverbo). Vidu en *Lingvo, stilo, formo*, p. 60.

Aliflanke, la tradicia kaŭzesprimo "dank' al", logike konsistas el "danke al".

Por plia komplikeco, la finaĵo -e estas uzata ankaŭ por la predikativo, kiu en pluraj aliaj lingvoj estas en tiuj kazoj akjektiva: "resti kun leono estas danĝere . . ."

## 8 Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon.

"Ekmarŝi kontraŭ iun"; "ŝi levas la bastonon kontraŭ lin"; "Kaino leviĝis kontraŭ sian fraton kaj mortigis lin": jen zamenhofaj frazoj kiuj apudiĝas al aliaj kun la sama prepozicio sen akuzativo: "la komitato nenion havas kontraŭ Svisujo"; "ŝi eltiras siajn blankajn manojn kontraŭ la ŝipo"; "kontraŭ neniu oni devas esti maljusta".

Ĉe aliaj prepozicioj, komparu: "Lot eliris al ili antaŭ la sojlon"; "ĵeti perlojn antaŭ la porkojn"; sed: "oni metis antaŭ mi manĝilaron"; "li montris rekten antaŭ si". Pli

konataj estas la ekzemploj kun prepozicioj kiaj sub, super kaj similaj: "la muso kuris sub la tablon", "la aŭto veturis trans la riveron"; sed: "pensoj iras trans limo sen pago kaj timo". "Traflugis anĝelo preter orelo"; "vi pasis preter via sklavo"; sed, kun la sama senco: "ne pasu preter vian sklavon!" (la tri lastaj, PIV-aj ekzemploj estas de Zamenhof kaj de la Biblio). Do, ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon, *krom* kelkaj en multaj eventualoj, precipe kiam temas pri almovo, sed la subreguloj estas malsimplaj kaj esceptaj.

## 9 *Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.*

"Posttagmeze la tankoj transsaltos la barilon": ĉu efektive vi legis post-tagmeze, trans-saltos, kun du apartaj toj kaj s-oj? Ĉu oni ĉiam unuforme prononcas jenajn vortojn: scias, kvar, kvin, absurda, ekscelenco, eksciti, konscienco, matĉo, Finnlando? "Laŭ la teoria vidpunkto [. . .] ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli "pan-jo", "san-go", "mi-a". Sed Zamenhof mem allasas: "Batali kontraŭ tia natura emo en la elparolado ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona . . ." (Respondo 56, *Oficiala Gazeto*, IV, 1911, p. 222). Kion vi pensus, se dum kongreso vi aŭdus anoncanton elparoli: "PosT-tagmeze

ni rendezuos ĉi tie je la tria”? Oni trovas tion afekta. Do, esceptoj allasatas kaj eĉ kelkaj enormiĝis. Ĉu la transiro de teĥnika al teknika, de arĥitekto al arkitekto, de arĥeologio al arkeologio, por ne paroli pri Hhinujo, ne estis siatempe aŭ estas nun pliaj esceptoj je la normo?

Eblus interpreti ĉi tiun naŭan regulon kvazaŭ ĝi inkluzivus la aserton ke ĉiu fonemo respondas al unu litero kaj inverse. Tion subtenas la diroj de Zamenhof: ”la uzado de unu litero por unu sono estas multe pli logika ol la uzado de du literoj” kaj ”la fina leĝo por nia ortografio estos: ”por unu sono unu litero” (*Lingvaj respondoj*, n-ro 58, *La Esperantisto*, 1891). Sed ĉi-rilate la *Fundamento* mem, post la listo de la literoj, nuligas la absolutan regulecon: ”Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.” Krome tekstas ke oni ”povas” uzi ĉi tiujn anstataŭojn. En la praktiko oni renkontas plurajn aliajn, precipe: cx, gx, hx, jx, sx, ux, ktp.

## 10 *La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.*

Krom en kelkaj unusilaboj. Evidenta, sed reala escepto. Kaj ne ĉiam la unusilaboj akcentatas sed nur laŭpozicie. Cetere: en apostrofitaj vortoj la akcento tute ne sidas sur la antaŭlasta silabo: ”Rajdant’! La hejmo jam ruin’! Raj-

dant'! Revokas vin patrin'! Rajdant'! Postploras vin infan'!" (K. Kalocsay, "La nigra rajdanto", *Ora Duopo*, p. 114). Kaj kion diri pri esprimoj kiaj "vi 'stas bela", aŭ pri oftaj personaj nomoj kiaj *Zamenhof*, *Waringhien*, *Kalocsay*? Nur konantoj de la subreguloj (esceptoj) povas ilin ĝuste elparoli laŭ la akcento.

**11** *Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.*

Jen regulo plena de kontraŭdiroj, t.e. de esceptoj. Ĉar la gramatikaj indikiloj logike ne estas la ĉefa elemento de vorto se oni prikonsideras la signifon. Do, oni devus diri: o-ĉeval, a-san, is-kant. Tamen, la gramatikaj indikiloj estas devige finaĵoj. Cetere, -n kaj -j ne estas memstaraj krom escepte.

Jen aliaj kazoj, kie la ĉefa signifo-elemento ne staras en la fino: *maneto*, *viraĉo* (komparu kun *fiviro*), *arbarego*, *kolumo* . . . Vd. en PAG, p. 435: "Ĉe radiko-sufiksaj kunmetoj [kun *et*, *eg*, *aĉ*, *um*] staras ĉiam la sufikso en la fino, eĉ se ĝi ne estas la ĉefa vorto." Kaj jen aliaj specialaj kunmetaĵoj: *mia sinfido*, *via sinmortigo* (ne: *si-mortigo* aŭ *vi(n)-mortigo*), ĉiovida (sed ne: *ĉionvida*, kvankam temas pri "simpla kunigo de la vortoj"), *vivipova*, *pagideva*, *mul-*

*tebranĉa, multalingvulo, kelkafoje, plenmano, panjo, Vilĉjo, onjo, Petruĉjo . . .*

Vaste konatas la nefinitaj (kaj nefineblaj) diskutoj pri la transitiveco de la verboj aŭ pri vortkategorioj kaj radikkarakteroj: *gladilo, ŝlosilo, fosilo, sed broso, martelo, pi-oĉo; kudristino, okulisto, sed tajloro, oftalmologo . . .* Ĉe vortoj kiaj *japano, koreo, portugalo, vjetnamo, egipto . . .* ĉu ni simple kunigu la "vortojn": *japan-an-o, portugal-an-o, kore-an-o, vjetnam-an-o, egipt-an-o*, ktp? Ege komplika kampo de la lingvo, kun multnombraj esceptoj kaj embuskoj, kiuj mem po iom ĥameleone ŝanĝiĝas.

## 12 *Ĉe alia nea vorto la vorto "ne" estas forlasata.*

Oni ne povas nei ke esperanto estas malfacila. En ĉi tiu frazo kunestas nea vorto kia sendube estas "nei", do oni devus forlasi la vorton "ne": "Oni povas nei ke esperanto estas malfacila". Sed la signifo tute aliiĝas. Tial do, necesas klarigoj pri la regulo, kiuj inkluzivas ke ĉi adverbo devas stari senpere antaŭ la koncernata vorto, escepte de kelkaj esprimoj kiel la zamenhofaj: "blindulo kartojn ludi ne devas", "la ŝuldoj ne estos pagataj de mi", "ni ne devas malplaĉi al li". Aliflanke, PIV atentigas: "Respondante al nea demando, kies neadon oni volas konfirmi, kelkaj popoloj, precipe okcident-eŭropaj, uzas ne, dum

aliaj, precipe orientaj, uzas *jes*”. Do, se atakas vin la duboj post la demando de kisinda knab(in)o: ”Ĉu vi ne venos?”, kion vi laŭregule respondu? Nepre ”Jes!”. ĉar ”ĉe alia nea vorto la vorto ”ne” estas forlasata. Pri detaloj kaj esceptoj vidu en PAG, p. 126-128: ”Ŝi ne povis ne vidi . . .” (Z) ”tio ne kostis neniom” . . .

# 13

*Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.*

”Mi vojaĝis al Barcelono kaj veturis ĝis la parko”. Kie troviĝas la akuzativa finiĝo? Denove necesas klarigoj pri la regulo, ĉe kiu aperas abunde da specialaj kazoj. Ni jam prikonsideris plurajn rilatajn al ”antaŭ”, ”kontraŭ”, ”trans”, ”preter”. Kion vi dirus: ”La ŝoseo al Barcelono, la ŝoseo Barcelonon, Barcelonen, de Barcelono”? La praktiko malsimplas. En PAG, p. 260 tekstas: ”La akuzativo estas uzebla nur, kiam oni atingas la internon de la celo: iri Parizon, lernejon, preĝejon. Do oni ne povas diri: ”iri sian amikon, kuri arbon, [ . . . ] standardon fiksitan meze de kampo”. Sed oni uzas ĝin tiamaniere, kiam la verbo havas prepozicion prefiksoide: aliri sian amikon, alkuri arbon . . .” Ĉu tio estas esceptoj aŭ kontraŭesceptoj de la fundamenta regulo? Ambaŭ.

# 14 [a]. Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon . . .

Ekzemple, la prepozicio *de* laŭ PIV signifas: 1. La punkton de la spaco, kie komenciĝas movo, la malproksimigon, la deiron, k metafore la malsimilecon, la devenon. 2. La punkton de la tempo, kie komenciĝas ago. 3. La metaforan originon, la kaŭzon. 4. La aganton de la ago esprimata per pasiva aŭ pasivsenca verbo. 5. La apartenecon. 6. La posedanton. 7. La posedatan econ. 8. La rilaton inter du subst-oj, el kiuj la dua estas mezuro de la unua. 9. Difinitan limigitan apartaĵon de priparolata aŭ jam priparolita aĵo. 10. La aganton de la ago, kiun esprimas subst. derivita el verbo. 11. La objekton de la ago, kiun esprimas subst. derivita el verbo. 12. Simple la gramatikan dependecon kun iom malpreciza senco. RIM 4 Pro la multisenceco de "de" estas ofte konsilinde anstataŭigi ĝin, se eble, per pli preciza prep. (en, el, pri, pro, super, kontraŭ, antaŭ kc).

Resume, ĝi havas nek difinitan nek konstantan signifon. Sed ĉu la ceteraj prepozicioj havas? Laŭ la sama vortaro, en havas 7 signifojn; *el*, 6; *pri*, 3; *pro*, 3; *super*, 4; *kontraŭ*, 8; *antaŭ*, 4 . . .

**14** [b] . . . *sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.*

La prepozicio "je" deinterne detruas la regulon, ĉar ĝi havas nek difinitan nek konstantan signifon. Fakte, laŭ PIV ĝi havas 6 signifojn, do, ne plie ol la prepozicioj de, kontraŭ, en, el. Kaj la lasta parto de la "regulo" tute ne estas ĝenerale aplikebla. Komparu: graveda je filo — graveda \*filon; libera je tiuj mankoj — libera \*tiujn mankojn; havi rajton je io — havi rajton \*ion; konduki iun je la nazo — konduki iun \*la nazon; ŝi eltiris je la kornaro nordan cervon — ŝi eltiris \*la kornaron nordan cervon; ŝi retiriĝis je kelke da paŝoj — ŝi retiriĝis \*kelken da paŝoj. Tamen, jes ĉe kelkaj esprimoj kiaj: "mi estas je unu jaro pli juna"; "la reĝo vetis kun li je ses berberaj ĉevaloj". Do, subreguloj kaj esceptoj abundas.

**15** *La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e., tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli*



*bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.*

Observatorio, observejo, redakcio, redaktejo, redaktoro, redaktisto, direkcio, direktejo, direktoro, direktisto, fragmento, fragila, frakasi, frakcio, frakturo, komputoro, komputero, komputilo, ekzistencialismo, ekzistadismo, ekzotika, ekzota, intui, intuicii, sponta, spontana, spontanea . . . Ĉu tio estas senescepta reguleco? Senkomen-  
te.

**16** *La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo.*

Evidente temas ne pri regulo sed pri kontraŭregulo. Krome, ankaŭ la dekseca allasas esceptojn, ĉar ne ĉiam klaras kiam oni povas apostrofi (fenestr' panorama; vintr' glacia, vd. supre) kaj eblas interpreti ke la apostrofo *povas* esti anstataŭigata kaj do tute forlasata, kiel oni vidas en kelkaj poemoj:

### **Acapulco**

Acapulco estas ridet kaj vundo.  
Belulinoj perfektas je la koks  
kaj estas dolĉo en la maro.

Fluadas festotag grandioza,  
noktoj sen ajna kompar.

Peter Browne, en *Fonto*, n-ro 261 (sept. 2002), p. 13.

## Demandite

[ . . . ]

Tegoloj falos, putros homa karno  
inter ruinoj kaj — post fum abrupta  
en multaj lokoj — restos vundobruiloj  
de geviroj ŝiritaj pli profunden  
ol pens aŭ sento. Tiam mavo plia:  
la lantaj abomenoj de malsato  
kaj konscienco. Ie stumblos aŭ kuŝos  
ankaŭ mi kaj la miaj, aŭ ni kaŭros  
post murkolapso inter frakasitaj  
mebloj sub pluv apokalipsa, malemaj  
forlasi por vagado tra vakuoj  
ĉi korangulon de la kunfeliĉo.  
Sentegmentigon certe atendadas  
komuna peko kaj senkulp komuna . . .

Edwin de Kock, en *Horizonto*, n-ro 6 (nov.-dec. 1976),  
p. 131.

Konklude, malĝustas la aserto ke la esperantlingva gramatiko konsistas el 16 simplaj reguloj sen esceptoj. Pli adekvatas formuloj kiaj: "Esperanto, lingvo preskaŭ sen esceptoj, kun nur dekunu gramatikaj morfemoj . . ." (Fernando de Diego, *Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas*, Heroldo de Esperanto, Pisa, 1992, p. 13). Esence nia lingvo estas nenia matematika kodo, sed multfaceta kompleksa strukturo vivanta, kiel ĉiu lingvo; pli simpla-regula laŭ kelkaj aspektoj, precipe laŭ tiuj plej surfacaj, sed multregula kaj implika laŭ aliaj. Verdire ni ĉiuj konsentas ke ĝi estas entute pli simpla ol tiuj naciaj, sed ne je tioma grado ke ĝi lerneblus surbaze de dek ses reguloj senesceptaj.

A N T O N I O   M A R C O   B O T E L L A

## LA POPOLSTILO EN LA POEZIO DE LORCA

**O**ni ne bezonas tro esplori por komenti certajn karakterizojn pri la poezio kaj teatro de Federico García Lorca, ja en la kerno de lia verkaro ĉiam vibras substrekindaj aspektoj, kiuj ebligas ne nur simplajn komentojn, sed ankaŭ profundajn studojn. Hodiaŭ mi emfazos tiujn elstarindajn nuancojn de la populareco, de lia popolstilo, kiujn li ofte uzas sen perdo de lirika nivelo kaj eĉ donante al tiuj esprimoj muzikajn resonojn. Federico posedis certan magion, kiu ebligis al li transformi la plej simplan kaj modestan vorton en muzikan sonon, kaj tio estas sendube privilegio de elektitoj de la genio.

García Lorca estas unu el la plej grandaj figuroj de la liriko de sia epoko; li estis krom poeto, ankaŭ grava teatroverkisto, muzikisto kaj sorĉa prelegisto. Li ricevis lecionojn pri muziko de la fama Manuel de Falla, kiu aŭguris al li brilan estonton kiel muzikisto, sed Lorca, kvankam lertege ludis gitaron kaj pianon, ne sekvis la konsilon de la majstro daŭrigi siajn studojn en Parizo. Li estis ja en tiu momento unu el tiuj eksterordinaraj ho-

moj, kapabla krei belecon, veki entuziasmon kaj mirinde charme transformi ĉion, kion li tuŝis . . .

En 1919, Lorca translokiĝis de Granado al Madrido por ekstudi en la Madrida Universitato. Profunde sentanta la allogon de la poezio, li sin dediĉis plene al ĝi, kaj en 1921 li publikigis sian unuan verkon *Poemlibro*, ricevita kun disaj opinioj de la tiamaj recenzistoj. En tiu tempo, Lorca jam verkis siajn poemojn per oksilabaj versoj, laŭ la modelo de la antikvaj romancoj: la poezion de la antikva hispana popolo oni esprimis dum la 16a kaj 17a jarcentoj, ne nur per la dokta esprimo de poetoj senkomparaj kiel Garcilaso, Gongoro, San Juan de la Cruz, Lope de Vega, Calderón, Quevedo k.a. sed ankaŭ kaj precipe per la popola poezio de la Romancaro kaj Kanzonaro devenanta el la profundo de la mezepoko: riĉa trezoro de koploj kaj kanzonoj tre popularaj, el kies esencoj suĉis tiuj grandaj poetoj. Lorca ne nur uzis la romancon por vesti sian poezion, sed admiris la spontanajn kaj popularajn antikvajn koplojn. Jen tio, kion li pensis kaj skribis pri tiu versoformo:

*”De la jaro 1919, en la periodo de miaj unuaj paŝoj en la poezio, mi studadis pri la formo de la mezepoka romanco kiel la plej taŭga kaj adekvata por esprimi miajn sentojn. La tradicia romanco estis ĉiam rakonta, kaj tio donis popolan karakteron kaj popularecon al la poezio. Mia celo estis kun-*

*fandi la romancon rakontan kun la lirika, kaj por atingi tiun karakteron mi multe strebis”.*

La plej gravaj kritikistoj koincidis en la opinio, ke García Lorca efektive sukcesis atingi la indikitan celon per tiuj du elementoj: tradicio kaj avangardismo.

En 1927, kelkaj el la plej bonaj hispanaj poetoj, Vicente Aleixandre, Alberti, Gerardo Diego, Dámaso Alonso, Pedro Salinas, Jorge Guillén, Cernuda, Altolaguirre, García Lorca k.a. decidis omaĝi la tricentjaran datrevenon de la forpaso de la granda poeto de la 17a jarcento Luis de Góngora y Argote (Gongoro). Tiu grupo ricevas la nomon ”generacio de 27”, ĉar tiam montriĝas ilia maturiĝo en poezio, kies plej alta celo estis krei puran belecon per imagopovo, bildoj kaj metaforoj, uzante la tradician metron popolan aŭ kultan. Tiuj poetoj kontribuis al tiu atingo per sian respektivaj verkoj. Lorca atingis altan pinton per sia verko *Romancero Gitano* (t.e. *Cigana Romancaro*, 1928), kiu, kun liaj teatro-verkoj, donis al li tutmondan famon kaj grandan popularecon, tiom da, ke eĉ la plej malklera homo de la sudhispana socio de la jaroj dudekaj (precipe de la andaluza), en oftaj kazoj, eĉ analfabetoj, fieris reciti parkere kelkajn el tiuj poemoj.

Mi ne povas forgesi anekdoton, kiun mi mem vivis en Granado, kiam mi loĝis en tiu bela urbo ankoraŭ sub la diktatora reĝimo de Franco, dum tiuj tristaj tagoj, kiam

mizero ŝvebis en ĉiuj anguloj de nia socio. Nu, certa tago, mi vizitis kvartalon Albaycín, kaj en unu el tiuj dometoj, kie oni kantis kaj dancis andaluzan folkloron por la tiamaj malabundaj turistoj, modesta homo kun mizera aspekto, recitis poemojn de Federico. Speciale impresis min jena romano, kiun mi jam de antaŭ longe konis, sed neniam aŭskultis tiel muzike kaj pasie recitata. Temas pri la poemo:

### **La malfidela edzino.**

Ĉar mi kredis ŝin fraŭlino  
al river' mi kun ŝi iris,  
sed ŝi estis jam edzino.  
Estis en Jakoba nokto  
kaj pro kvazaŭkompromiso.  
La lanternoj estingiĝis  
kaj ekĉirpis arde griloj.

Ŝiajn mamojn mem dormintajn  
palpis mi ĉe stratofino  
kaj subite ili floris  
kvazaŭ hiacinta spiko.

La subjupo amelita  
sonis kiel pec' da silko,  
same kiel sonas ŝtofo,  
kiun ŝirus dek tranĉiloj.

Sen arĝentolumaj ludoj  
arboj kreskis en fikcio  
kaj hund-horizonto bojis  
ĉe la transrivera nigro.

Preter la rubusoj, junkoj,  
dormoplantoj kaj vepr-pikoj  
faris mi sub ŝiaj haroj  
etan foson sur la ŝlimo.

Mi demetis la kravaton,  
ŝi la bluzon de virino,  
mi la revolvero-zonon,  
ŝi gainojn el pur-silko.

Ne troveblas fajna haŭto,  
nek konketoj, nek lilioj,  
nek kristaloj kun lunlumo  
helas kun pli granda brilo:

Ŝiaj kruroj el mi fuĝis  
kiel fiŝo je surprizo,  
la duono ŝajne brulis  
plena la duon' de frido . . .

Mi trakuris tiunokte  
per brilperla ĉevalino  
la plej belan el la vojoj



sen la selo kaj sen bridoj.

Mi, ĉar viro, ne konfesos  
kiaj estis ŝiaj diroj,  
lum' el saĝ' kaj diskretemo  
diktas al mi prudentiĝon.

Ni forlasis la riveron,  
ŝin makulis sabl' kaj kisoj,  
ja batalis kontraŭ l' vento  
blankaj glavoj de l' iridoj.

Mi kondukis laŭ mi estas:  
kiel vera ciganido,  
silkan kudrilujon flavan  
donis mi al ŝi kun digno.

Kaj ne volis mi ŝin ami,  
ĉar estante jam edzino  
ŝi survoje al rivero  
sin deklaris tuj fraŭlino.

Sed mi tuj diru, ke tiu ne estis escepta kazo, dum mia plurjara restado en Andaluzio mi povis konstati, ke la adoron de andaluzoj al la persono kaj poezio de Federico ne nur oni sentis en Granado sed ankaŭ en la tuta sudo de Hispanio. Ne nur unu fojon mi vizitis kafejojn en pluraj gravaj andaluzaj urboj, kie sur modesta estra-

do oni prezentis je tiu horo de la postmanĝo kaj post la vespermanĝo mallongajn teatraĵojn, tipajn dancojn kaj kantojn aŭ deklamon de poemoj, el kiuj la plej aplaŭdataj estis tiuj de García Lorca.

Federico uzas tre ofte ordinarajn vortojn kutime uzataj nur de la popolo, kiuj tuŝitaj de lia magia plumo transformiĝas en ĉarmajn esprimojn. Ekzemple, kiam en la ĵus recitita poemo li povus uzi la vorton "soltera" t.e. fraŭlino, li elektas "mozuela", kaj en la sekvanta verso anstataŭ "esposo" t.e. edzo, li uzas "marío", kies prononco flugas en la aero kun muzikaj resonoj, nuanco tute ne stranga: ja li ankaŭ krom poeto estis bona muzikisto.

La poezio de Lorca, aperta al ĉiuj postuloj de la modernismaj fluoj, venas tamen tra la vojo de la klasikismo kaj de la kultismo: aperas ĉiam en liaj versoj certaj resonoj de la klasikismo de Lope kaj la kultismo de Gongoro. Oni povus citi multenombrajn ekzemplojn de okulfrapaj metaforoj, kiel tiuj versoj ĵus recititaj:

Mi trakuris tiunokte  
per brilperla ĉevalino  
la plej belan el la vojoj  
sen la selo kaj sen bridoj . . .

aŭ tiuj aliaj kun lirikaj akcentoj, kiuj kantas:

Sen arĝentolumaj ludoj  
arboj kreskis en fikcio  
kaj hund-horizonto bojis  
ĉe la transrivera nigro.

Kvankam se ni bone analizas la poemon, ĝi estas plena de tiuj mirindaj metaforoj, tiel trafaj, ke ili en neniu momento lacigas la aŭskultanton.

Vero estas, ke *Cigana Romancaro* estas riĉa trezoro konsistanta el interesaj popolaj rakontoj, en kiuj ne mankas tiuj, kiuj pli emfazas la lirikan detalon ol la emocion de la rakonta priskribo. Unu el tiuj estas sendube tiu poemo titolita

### **La monaĥino-ciganino.**

Silento el kalk' kaj mirto.  
Inter herboj fajnaj malvoj.  
Monaĥin' sur ŝtofo flava  
brodas bele keirantojn.

La sep birdoj de la prismo  
flugas el la kandelabro.  
La preĝejo diste grumblas  
kiel urs' sur dorso-staro.

Kiel bele ŝi ja brodas!  
Kiom lindas la brokaĵoj!

Volas ŝi sur ŝtofo flava  
brodi florojn el la ravo,  
kiujn ŝia fantazio  
revas per la flor-ornamoj.

Kiaj fajnaj sunofloroj,  
magnolioj kun bunt-strasoj!  
Kiaj lunoj por mes-tukoj!  
Kiom belaj la safranoj!  
Kvin citronoj suker-dolĉiĝas  
tie, en kuirej-parto.

La kvin vundoj de Jesuo  
el la Almeria kampo.  
En la monaĥin-okuloj  
galopadas du rajdantoj,  
kaj rumoro lasta surda  
levas de ŝi la korsaĵo.

Ŝi rigardas krutajn montojn,  
horizonton kaj nubaron,  
ekrompiĝas ŝia koro  
el suker' kaj herb-balzamo.  
El la dudek-suna revo  
kiel vidas ŝi la valon!  
Kiom staraj la riveroj  
belaj kiel viziaĵoj!

Sed ŝi daŭre brodas  
ŝiajn florojn kun ĉarmo,  
dum la brizo milde staras  
kaj taglumo ludas ŝakon  
alte tra la ĵaluzio,  
kie svenas milde tago.

La *Cigana Romancaro* estas la verko, kiu pli famigis tiun ĉi grandan poeton. La kritiko, kiun ricevis tiu libro estis tiel disopinia kaj ampleksa, ke oni povas paroli pri ĝi dum horoj kaj horoj, sed mi ne tion faros, mi nur konsideras oportune konigi al vi kelkajn frazojn de la propra opinio de la aŭtoro pri sia verko, gravaj deklaroj, kiel vi tuj konstatos. Lorca skribis:

*”La libro, en sia tuto, kvankam ĝi ricevis la nomon cigana, estas la poemo de Andaluzio, kaj mi nomas ĝin cigana, ĉar la ciganoj estas plej altaj, plej profundaj, plej aristokratacaj de mia lando, plej reprezentaj de sia propra karakteriza maniero, kaj gardantoj de la fajro, la sango kaj la alfabeto de la vero andaluza kaj universala. Do la libro spegulas Andaluzion kun ties ciganoj, ĉevaloj, ĉefanĝeloj, planedoj, brizoj juda kaj romia, riveroj, murdoj, apud la vulgara noto de kontrabandistoj kaj la noto ĉiela de nudaj infanoj de Kordovo, kiuj mokas Sanktan Rafaelon. Libro, kie apenaŭ aperas la Andaluzio, kiun oni vidas, sed kie tremas la Andaluzio nevidata. Libro, mi jam diru, nepitoreska, nefolklo-*

*ra, nekonvencia, kie ne troviĝas tipaj kostumoj, nek toreadoraj vestoj, nek aliaj tipaĵoj . . . kie la figuroj moviĝas ĉe fonoj miljare oldaj”.*

Tiel parolis pri sia verko García Lorca. Sed tiu libro de poemoj estas ja tio, kion opiniis Lorca kaj ankoraŭ multo pli, ĉar ne nur en tiu verko estas la plej elektita poezio de nia granadano, sed en ĉiu verso de li verkita, ne gravas pri kia temo, inkluzive en lia teatro, aperas ĉiam lia lirikismo senegala kaj lia popolstilo tre klare difinita. Lia speciala vizio pri la homa socio estas instinkte kontraŭa al ĝia normo starigita de leĝoj, kiuj, iamaniere limigas la homan liberon. El tio lia simpatio por ciganoj, homoj kun liberecanaj inklinoj, kiuj malfacile akceptas la konvenciojn kaj formalizaĵojn de rigora socio . . .

*”Esti naskita en Granado — li iam diris — inklinas min al simpatio por ĉiu, kiu sin sentas persekutata: ciganoj, judoj kaj negroj”.* Ĉiujn ilin li defendis, kaj ni povas konstati tion ne nur en la romanoj, aŭ en la poemaro *Poeto en Novjorko*, sed en multaj aliaj versaĵoj.

Lorca verkis ankaŭ *Poemoj pri ”Cante Jondo”*, kiuj brile esprimas la animon de Andaluzio adoptante la formojn kaj stilon popolajn de la andaluzaj kanzonoj, sed la granadano tute ne forlasis sian kutiman teknikon kaj modernan vidpunkton pri poezio.

Rimarkinde, en lia poezio ankaŭ estas certa tragedia sento kiu, verŝajne, obsedis lin kaj puŝis lin verki kun

obstino pri fatalo, fekundeco, vivo, amo, morto . . . Pri tiu ĉi lasta temo, ni citu kiel elstaran, elegion, kiun li verkis omaĝe al lia amiko, la toreadoro Sánchez Mejías. Al lia mortinta amiko, li dediĉis dramajn lirikajn versojn. Ni citu nur pecon el tiu bela poemo, sendube la plej bona elegio de la hispana liriko dum pluraj jarcentoj, enhavanta ne nur lian kutiman rakontan stilon, sed ankaŭ certan muzikan tonon tute originalan, nur propra de genioj. Mi aludas la poemon *Funebra Kanto por Ignacio Sánchez Mejías*, unu el la plej eksterordinaraj 20-jarcentaj toreadoroj, amiko de la renoma generacio de 27 kaj mem aŭtoro de teatraĵoj. Jen la unua el la kvar poemoj titolita:

### **La korno-vundo kaj la morto**

Je la kvina posttagmeze.

Ĝuste batis la kvina posttagmeze.

Infan' alportis la littukon blankan,

je la kvina posttagmeze.

Kalka korb' antaŭtempe atendanta,

je la kvina posttagmeze.

Ĉio estis morto, nur morto restis,

je la kvina posttagmeze.

La vento la kotonojn forportanta,

je la kvina posttagmeze.

Semis oksid' nikelon kaj kristalon,  
je la kvina posttagmeze.  
Kolombo luktas kontraŭ leopardo,  
je la kvina posttagmeze.  
Kaj kruro kontraŭ angorstreĉa korno,  
je la kvina posttagmeze.

Komencis vibri la burdunosonoj,  
je la kvina posttagmeze.  
L' arseniko kaj fum' de sonoriloj,  
je la kvina posttagmeze.  
Silentas la grupoj ĉe stratofinoj,  
je la kvina posttagmeze.  
La taŭro solas kun fieresprimo,  
je la kvina posttagmeze.

Kiam ekaperis la neĝa ŝvito,  
je la kvina posttagmeze.  
Kiam invadis l' arenon la jodo,  
je la kvina posttagmeze.  
Metis ovojn en la vundon la morto,  
je la kvina posttagmeze.

Je la kvina posttagmeze.  
Precize, je la kvina posttagmeze.

Mia bona amiko Miguel Fernández, sendube la plej  
klara hispana esperantisto kaj elstara fakulo pri la poe-



zio de Lorca, opinias, ke *tiu tute akcesora elemento, — la kvina posttagmeze —, la horo, en kiu ordinare ekas la torefesto, transformiĝas en unuarangam fundamentan poezion, kies alterna ripetado faras la komponaĵon korprenme litanieca, kiel konvenas al funebra kanto.*<sup>1</sup>

Oni devus retroiri al la mezepoko por trovi, en la poezio de Jorge Manrique okaze de la morto de lia patro, elegion tiel altnivelan.

Ankaŭ elstaris García Lorca kiel teatroverkisto: li publikigis teatroverkojn tiel belajn kaj interesajn, ke tiuj altiris la atenton kaj laŭdojn de la publiko kaj recenzistoj en Hispanio kaj Ameriko: ni menciuj la poezian dramon Mariana Pineda, kiun sekvis la farso La mirinda ŝuist-edzino. En 1933 li sukcese prezentas en la teatro Infanta Beatriz de Madrido la trilogian dramon Sanga Nupto, tragedia verko pri edziĝofesto, kiu malsukcesas, ĉar aperas en plena festo la antaŭa fianĉo de la ĵusedzino pretendanta forpreni la amatinon, konflikto, kiu fine solviĝas per mortbatalo de ambaŭ rivaloj sub la lunlumo.

Poste venis aliaj gravaj teatraĵoj, kiel *Sterila*, kiun reprezentis la fama aktorino Margarita Xirgu, verko prezentanta intiman konflikton de malfeliĉa virino pro sia sterileco, kies torturo finiĝas, kiam ŝi mortigas sian ed-

1 FERNÁNDEZ, Miguel. *Sur la spuroj de Federico García Lorca*. Universidade de Santiago de Compostela, 1996. (paĝ. 12)

zon. Sukcesa kiel la menciitaj, lia verko *La domo de Bernarda Alba*, kiu temas pri streĉa konflikto de pluraj virinoj disputantaj pro viro, kaŭzo de drama malfeliĉo de ili ĉiuj. En tiu trilogio, viroj kaj virinoj, ne agas kiel individuoj sed kiel arketipoj de pasioj, sentoj kaj homaj situacioj ekstertempaj, impulsataj de nebremseblaj primaraj fortoj ekster ĉia rezonado kaj intelektismo, kaj envolvitaj de praa fatalismo. La protagonistoj de tiuj dramoj havas kiel literaturaj antecedentoj la puran klasikan tragedion . . .

Dum la jaroj tridekaj, tuj post lia kontentiga turneo tra Ameriko kaj sukceso de lia teatraĵo, *La mirinda ŝuist-edzino* en la Hispana Teatro de Madrido, de la mano de la ĵus menciita aktorino Margarita Xirgu, Lorca realigas sian revon prezenti al la popolo la plej bonan teatron ĉe la ĉefplacoj de urboj kaj vilaĝoj, tra itinero apriore proletara, tute simple ĝuante kun la popolanoj la teatron de Calderón, Lope de Vega kaj aliaj famaj hispanaj aŭtoroj. Tio signifis reveni al la originoj de la klasika teatro reprezentata ĉe publikaj placoj. Por tiu projekto li ricevis gravan subvencion de la Ministro pri Publika Instruado de la Dua Hispana Respubliko, prof. Fernando de los Ríos, kaj la trupo de li nomata *La Barako* disvastigis per kleraj universitatoj la teatrokulturon, vojaĝante de urbo al urbo, ja ili aktoris por tiu celo anstataŭ ferii . . .

Kiam la intercivitana hispana milito eksplodis kaj Federico estis sovaĝe murdita, neniu povis tion kredi, kaj la novaĵo saltis super landlimoj ĝis la mondfino, sed evidente oni ne povis mortigi lin: ja li vivas por ĉiam ĉe la koroj de ĉiu poeziamanto. Kun lia morto naskiĝis la mito. Tiuj, kiuj ne konis lin pro lia vivo, de tiu momento konis lin pro lia morto. Lia verkaro disvastiĝis tra la tuta mondo kaj lia figuro gigantiĝis. La plej gravaj intelektuloj meritoplene parolis pri li, kaj multaj el liaj amikoj dediĉis al li artikolojn, eseojn, poemojn, kiel senprokraste faris Antonio Machado, apenaŭ li eksciis, ke Federico estis murdita. Jen la poemeto, kiun Antonio dediĉis al li:

### **La krimo okazis en Granado**

Oni vidis lin marŝanta  
inter homoj kaj fusiloj  
tra tre longa frida strato  
eliri al kamp' sen miro,  
ankoraŭ la steloj brilis  
venis haste la ektagiĝo.  
Kiam la orsun' eklumis  
oni murdis Frederikon.

Ne kuraĝis lin rigardi  
la grup' de ekzekutistoj,  
ĉiuj fermis la okulojn

preĝis: "savu vin ne Dio!"  
Sango sur la frunt' kaj ventro  
morta falis Federico.

La krim' en Granad' okazis,  
ho, terura malfeliĉo!  
— sciu, estis en Granado —  
la Granad' de Frederiko!

Unu el la plej prestiĝaj hispanaj intelektuloj de tiu tempo, la diplomato kaj verkisto Salvador de Madariaga, dediĉis al li jenan poemon:

### **Elegio al la morto de Frederiko García Lorca**

Du kristaloj nigrolumaj  
en lia rigardo helis  
kaj el lia buŝo brilis  
blanka ombro kiam li gestis.  
Liaj haroj, nokt' sen lumo,  
la vizaĝ' seren-prezentis  
koloron oranĝ-olivan  
geston de cigan' rivelis.  
Voĉo el gitar-borduno,  
el lia anim' dissendis  
la parfumon el bedaro  
de Granado kiam festis.

Cipresoj de l' Albajcino,  
belaj mirtoj de l' Alhambro,  
cedroj de l' Ĝeneralifo,  
arom' belo, suko, ĉarmo,  
la ĝoj-bruo de Seviljo,  
la graveco de Granado,  
la fajnaj bedar-jasmenoj,  
geranioj de Triano . . .  
El tiu spirito via  
ŝprucis kvazaŭ filigrano;  
la Andaluzi' eterna  
plena de kolor' kaj ravo.

Obeante lian voĉon  
la taŭro el la taŭraro  
rigardas lin kun surprizo  
kaj fiere levas kapon.  
La migdalarbo ruĝiĝas,  
rompiĝas blankŝaŭme l' akvo,  
ĉe floranta rubusujo  
ekstremas ĉe nest' birdaro.  
Restas la ĉasist' absorta  
revo brilas ĉe l' rigardo,  
la ĉeval' laŭ ĝia ritmo  
plezurigas la rajdanton,  
la riveroj streĉ-vekiĝas

sidas firma la montaro,  
profundiĝas ĉiel-bluo  
brilas sun' kun arda flamo  
kaj la bela amatino  
bremsas ŝian koran ardon.  
Ŝiavoĉe tutan vivon  
envolvas ŝin en dolĉamo.

Siavoĉe la romancoj  
revivas ĉe l' plac' kaj stratoj;  
alten flugas ja la koploj  
kun la fort' de la imago;  
pleniĝas de melodioj  
la ventroj de la gitaroj.  
Siavoĉe eĉ l' aero  
kantas, dancas eĉ la akvo.  
( . . . )

Kompreneble, ke, kiel mi jam diris je la komenco de mia eseo, ni povus ankoraŭ daŭrigi horojn kaj horojn parolante pri Federico García Lorca, deklamante aliajn el liaj belaj poemoj, ekzaltante lian lirikismon, parolante pri lia sojfo de kulturo kaj lia amo al homoj senhelpaj aŭ persekutataj, sed hodiaŭ mi ne plu volas lacigi vin. Permesu al mi fermi mian eseon deklamante al vi unu el la plej popularaj poemoj de Federico, temas pri la

**”Somnambula Romanco”**

Verda, mi ĝin volas verda.  
Verda vento. Verdaj branĉoj.  
La ĉevalo sur la monto  
kaj la ŝipo sur la maro.

Kun la ombro sur la zono  
revas ŝi ĉe la verando  
per okuloj arĝent-fridaj,  
haroj verdaj, verda karno.

Verda, mi ĝin volas verda.  
Sub cigana lunoĉarmo  
la ĉirkaŭo ŝin rigardas  
sed ŝi vidas kun amaro.

Verda, mi ĝin volas verda.  
Prujnaj steloj el gel-blanko  
kun ombrofiŝo venas  
kiam klaras nova tago.

La figarb’ poluras venton  
per la smirg’ de siaj branĉoj,  
kat’ putora, bruna monto  
sin hirtigas per agavoj.

Kiu venos? Kaj de kie?  
Restas ŝi ĉe la verando,

verda karno, haroj verdaj  
prirevanta amar-maron.

—Karo, mi deziras ŝanĝi  
por la domo la ĉevalon,  
por spegulo mian selon,  
por ponardo mian ŝalon.

—De la altaĵoj apud Cabra  
sangas mi je ĉiu paŝo.

—Se mi povus ŝanĝi tion  
mi akceptus ĝin kun danko,  
sed ne povas mi decidi  
ĉar ne estas mi la mastro.

—Mi deziras morti dece  
en la propra lit', kompano,  
sur ferluksa lit', se eblas,  
inter linotuk' el Flandro.

—De la brusto ĝis la gorgo  
vundoj verŝas mian sangon.

—Tricent' da brunetaj rozoj  
ruĝmakulas la subjakon,  
humidiĝas via zono  
kaj odoras sangfluado.

—Sed ne de mi, nek de domo  
mastras mi por interŝanĝo.



Lasu min almenaŭ iri  
ĝis la altaj balustradoj;  
lasu min atingi tie  
ĝis la verda verandaro!  
balustradoj de la luno  
kie tumultadas akvo.

Jam suprenas ambaŭ viroj  
al la altaj balustradoj,  
lasas post si sangogutojn  
kaj riveron da roslarmoj.

Dume sur tegmentoj tremas  
lanternetoj el stanlado  
kaj la frumatenon vundas  
milkristala tintilado.

Verda, mi ĝin volas verda.  
Verda vento. Verdaj branĉoj.  
Supreniris la du viroj.  
Lasis en la buŝ' l' amaron  
la impeta longa vento  
kun sensac' de ment' kaj galo.

La filin' amara via,  
kie estas ŝi, kompano?  
ŝi multfoje vin atendis,

rozvizaĝo, nigraj haroj,  
dum senfinaj longaj horoj  
sur ĉi verda verandaro!

En la puto rozvizaĝa  
flosas cigana kadavro.  
Verdaj haroj, karno verda  
kun arĝent-okula ĉarmo.  
Ŝajnas glaciaj' el luno  
subtenata sub la akvo.  
Iĝis nokto tuj intima  
kiel placo de vilaĝo.  
Gvardianoj tre ebriaj  
batis brue la pordaĉon.

Verda, mi ĝin volas verda.  
Verda vento. Verdaj branĉoj.  
La ĉevalo sur la monto  
kaj la ŝipo sur la maro.

Kiel oni povas konstati, la popolstilo de Federico aperas en ĉiu angulo de tiu ĉi poemo.

A N A M A N E R O


## TRO MALDARE

**K**iam unuafoje mi renkontis Migelukon<sup>1</sup>? Mi ne scias. Foje memoro iĝas nebula, kaj okazintaĵoj ne ordiĝas kronologie, kiel decus. Foje memoro knedas la pasinton kun la estonto, kaj spicas ĝin per sentoj; tiam porĉiame forvanuas pensoj dum samtempe malfacilas forgeso.

La tago de nia konatiĝo perdiĝis nespureble inter miaj neŭronoj, tial mia memoro pri li iasence eternas: sen komenco kaj fino. Tamen konjekteblas, ke tio okazis antaŭ pli malpli dek tri jaroj, pli frue ne eblis ĉar tiam mi ankoraŭ ne eklernis esperanton, kaj nur pere de ĝi ni amikiĝis.

Poste renkontiĝoj, kongresoj, laborkunsidoj, projektoj, ĉebudaj deĵoradoj en lingvo-foiroj . . . Kaj ankaŭ babiloj, amuziĝoj, bierumadoj, diboĉoj kaj kunridoj. Kaj beletro: li sorĉas min per siaj rakontoj, li ja povas emociigi min per ili ĝis eklarmo.

1 Migeluko: esperantigo de Migueluco, karesa nomo de Miguel en Kantabrio, regiono en la nordo de Hispanio, kie naskiĝis Miguel Gutiérrez Adúriz.



De tempo al tempo Miguel insistas, ke mi provu verki. Tial nun, nur liaomaĝe, mi provos ion fari. Mi elektis formon, kiu lastatempe tre interesas lin: mikronovelon. Kaj vorteton, kiu enŝoviĝis en la vortaron "Amika" (alinome, "Vortaro 2002"), uzata verŝajne nur de li en la tuta mondo, kaj kiu vekis mian simpatian, ĉar temas pri neologismo kondamnita al malapero antaŭ ol ĝi havos la ŝancon prui siajn taŭgecon kaj utilon. Temas pri "dara", t.e. "multekosta".

Jen Miguel, plia rano por via marĉo!

## TRO MALDARE

Ĉi-foje sufiĉis nur kvar fikoj, eĉ se la lasta, putinido!, foriris sen pagi. Sed hodiaŭ ĉio ŝajnas favori vin: neniam antaŭe La Rufulo konsentis provizi la horson ja tiom maldare!

Iom poste, la nokto trovas vin sidanta en malluma trotuaro, la kapon kline apogita kontraŭmure. Ombra frosto senbride galopas en viaj vejnoj dum la ĉirkaŭo neniiĝas lante.

## T O Ñ O D E L B A R R I O

TESTO:  
ĈU VI ESTAS BONA  
MIGELUKOLOGO?**Enkonduko**

**E**n tia ĉi verko devus enesti biografio de nia omaĝato. Sed kun Migeluko tio estus mistrafo.

La Migelukologio (Adurizologio laŭ la Nova PIV, scienco havanta kelkajn punktojn komunajn kun la Livendekologio, kvankam oni povas studi ilin iom aparte) estas scienco nova, kun ankoraŭ malmultaj fakuloj. Sed ĝi alvenis al punkto sufiĉe matura por ke oni jam enkonduku popularigajn verkojn, kaj oni eĉ enmetu ĝin en la popolajn amuzaĵojn, en la popolan (ne nepre civitan) folkloron. Vi mem, kara leganto, ravite de la elstaraj trajtoj de tiu ĉi scienco, probable ĝin jam trastudis, atinginte la gradon de fakulo. Sed tion vi devas pruvi. Kaj vi scias ke la fakuleco ne plu pruviĝas en la Fakultato: en tiu ĉi nia moderna mondo, tio vidiĝas ĉefe en la amaskomunikiloj.

Pro ĉio ĉi, mi proponas al vi kvizon, popolan kvizon. Jes, mi scias ke vi estas kabineta esperantisto, devotulo de la libroj kaj amanto de la beletro, kaj tial vi probable

eĉ ne okulumis revuajn testojn aŭ spektis televidajn kvi-  
zojn. Sed ne timu, eĉ homoj malestimantaj monon kaj  
famon, kiaj vi, kapablos bone elturniĝi en la subtilaĵoj de  
tiu ĉi provo. Simple elektu la solvon inter la kvar propo-  
nitaj ebloj.

Je la fino vi trovos la respondojn kaj kelkajn aldonajn  
klarigojn. Kaj ni estas tute certaj (ĉu oni entute estas  
tiom certaj?) ke vi estos honesta homo kaj ne agos trompe,  
subrigardante la respondojn antaŭ la fino de la kvi-  
zo.

Fine, indas ion gravan rimarkigi. Kompleta biografio  
de Miguel devus inkludi multajn faktojn de lia vivo kaj  
verkaro, kaj de lia rilato al amikoj, kunuloj kaj samide-  
anoj. Ni devis rezigni pri tia amplekso, kaj tial mankas  
tie ĉi multaj tre gravaj aŭ karaj aferoj. Ne gravas, ni ha-  
vos tempon: konsideru tiun ĉi amuziĝon kiel nuran en-  
kondukon en la jam disvastiĝantan areon de la Migelu-  
kologio.

Kaj jen, en la konkurson!

## UNUA DEMANDO

Kiu estas la plumnomo uzata de Miguel Gutiérrez Adúriz en liaj beletraj verkoj?

- A. Liven Dek
- B. Suden Ses
- C. Ien Kelk
- Ĉ. Dekstren Tro

## DUA DEMANDO

Miguel verkis lernolibron por lerni Esperanton, en kiu lingvo?

- A. La hispana
- B. La kantabra
- C. La fantasta
- Ĉ. La surdmutula

## TRIA DEMANDO

Jen la plej tikla demando: kiam naskiĝis Miguel?

- A. 1900: li havis la okazon saluti Doktoron Zamenhof dum la UK en Barcelono
- B. 1920: li tiom multefaris por Esperanto, ke li certe estas jam okdekjara
- C. 1950: liaj lipharoj jam ekgriziĝas
- Ĉ. 1980: li estas la nuna sekretario de la hispana junulara Esperanto-movado



## KVARA DEMANDO

Kiam li lernis esperanton?

- A. Li estas denaska esperantisto
- B. Li lernis la lingvon 19jara, dum la militservo
- C. Li lernis ĝin 29jara, dum vojaĝo al Kazohinio
- Ĉ. Li promesis iam lerni ĝin

## KVINA DEMANDO

Kiel nomiĝas la kolekto de sciencfikciaj verkoj, kiujn Miguel (kaj la grupo NIFO) eldonadis?

- A. Sferoj
- B. Cirkloj
- C. Cirkeloj
- Ĉ. Diskoj

## SESA DEMANDO

Kiu verkisto, ĝenerale inkludita en la grupo nomata "Ibera Skolo", ne aperigis novelaron en la kolekto "Ekstremoj", en kiu ankaŭ partoprenis Liven Dek?

- A. Miguel Fernández
- B. Jorge Camacho
- C. Gonçalo Neves
- Ĉ. Abel Montagut

## SEPA DEMANDO

Krom en la Akademio de Esperanto, en kiu alia grupo prenis parton Miguel?

- A. En la muzika bando "Los Golpes" ("La Batoj")
- B. En la futbala klubo "Racing de Santander C.F."
- C. En la montara skipo "La zamenhofaj grimpantoj"
- Ĉ. En la koruso "La stultaj infanoj"

## OKA DEMANDO

Pri kiuj universitataj studoj li diplomiĝis?

- A. Filozofio
- B. Kemio
- C. Geologio
- Ĉ. Sciencfikcio

## NAŬA DEMANDO

Lia novelo "La letero" estas dediĉita ne nur al lia patri-  
no, sed ankaŭ al homo, kiun li sentis tre proksima al si.

Pri kiu temas?

- A. Pri lia avino
- B. Pri lia fratino
- C. Pri lia instruisto
- Ĉ. Pri lia filino

## DEKA DEMANDO

Kiel nomiĝas la vortaro, kiun li publikigis en la jaro 2002?

- A. mga
- B. La Granda Vortaro Esperanta-Hispana
- C. La Malplena Kvazaŭilustrita Vortaro
- Ĉ. 2002

## DEKUNUA DEMANDO

Kiu estas María Zocato Diez?

- A. Lia patrino
- B. Lia sekretariino
- C. Lia eldonistino
- Ĉ. Li mem

## DEKDUA DEMANDO

Kiulingva estas la libro de rakontoj sciencfikciaj, "La fantasta lingvo", en kiu aperis enkonduko kaj kelkaj tradukitaj verkoj de Miguel?

- A. Eŭska
- B. Itala
- C. Klingona
- Ĉ. Germana

## DEKTRIA DEMANDO

En kiu jaro li komencis redakti la bultenon de la Hispana Esperanto-Federacio, "Boletín"?

- A. 1947
- B. 1975
- C. 1997
- Ĉ. 2000

## DEKKVARA DEMANDO

Kiu el liaj verkoj aperas en *Nova Esperanta Krestomatio*?

- A. La bleko de l' ŝargu'
- B. Marta kaj Maria
- C. Liza
- Ĉ. Se mi kapablus

## DEKKVINA DEMANDO

Kiu el la sekvaj rakontoj, aperintaj en numero 8 de la kolekto "Sferoj", NE estis verkita de Liven Dek?

- A. Mi estas fatraso
- B. La hiko
- C. Eĉ miaj okuloj jam violas!
- Ĉ. Tranĉita komuniko

## SOLVOJ

### UNUA

A: Facila, ĉu ne? Sed ni aldonu ke "Suden Ses" estis uzata de Abel Montagut en lia verko "La enigmo de l' @ra-neo", kiel avataro de Miguel. Kaj ke "Ien Kelk" . . . , nu, tiu de Jorge . . .

### DUA

A: Tiu inteligenta demando kun tiuj ĉi eble iom stultaj respondoj permesas al ni atentigi pri kelkaj gravaj informoj pri Miguel. La unua, ke li estas el Kantabrio (eta regiono ĉirkaŭ nordhispana havenurbo Santander), kie li naskiĝis kaj plu loĝas. Eĉ se li estas mondcivitano, kantabroj havas famon esti homoj sovaĝaj, nedreseblaj; juĝu mem ĉu li konformas al tiu bildo. La dua estas lia redakto de treege utila gramatiko, la plej uzata nune por la instruado de Esperanto en la hispana lingvo "Esperanto. Curso del Idioma Internacional"; ĉiuj hispanianoj ĝin konas, sed eble tio estas malpli konata de alilingvaj samideanoj. Kaj fine, estas lia rilato al fantasto: sed pri tio ni parolos poste.

### TRIA

C: Jes, li tiom multe faris ke oni pensus ke li estas okdekjarulo, sed aliflanke tiel juna animo nepre devus

aparteni al adoleskanto. Sed nek io, nek alio. Pri la trajtoj de liaj karakterizaj lipharoj . . . nu, pli bone ne paroli . . .

## **KVARA**

B: Li volontule militservis en aerarmeo je la aĝo de 18 jaroj. Tie li eklernis esperanton per libreto "Esprimo de sentoj en esperanto", de Privat, pruntita de unu el siaj patraj amikoj. Se vi respondis la eblon D, vi ricevu mil negativajn poentojn, pro perfidemo kaj blankastelismo.

## **KVINA**

A: Tiu estas supozeble la ekster Hispanio plej konata parto de lia agado rilate librojn. Ĝi estas des pli rimarkinda pro la konstanteco kaj la daŭro en la tempo. Miguel animis la eldonadon de kolekto de sciencfikciaj noveloj kaj rakontoj, ĉu originalaj ĉu tradukitaj, publikigitaj en dek volumoj de la serio "Sferoj". Neniu ĝenro de la literaturo tiel sisteme pritraktiĝis en Esperanto en la lastaj jardekoj kiel tiu ĉi, danke al modesta (nur iom pli ol unupersona) kaj persista grupo.

## **SESA**

Ĉ: Jen ni alvenis al la hiko: la "Ibera Skolo" estas grupo de verkistoj kun iel komuna vidpunkto pri beletro en Esperanto, loĝantaj en la sudokcidenta ekstremo de Eŭro-

po, en tiu terpeco sube de Pireneoj kaj iom supre de la Ĝibraltara markolo.

Kiuj ĝin konsistigas? Tion la plej famaj beletrologoj ankoraŭ ne findecidis, kaj tiu ĉi ludo ne havas aŭtoritaton por diri la lastan vorton, sed permesu ke ni menciu la nomojn de Jorge, Miĉjo, Gonçalo, Antonio, Abel, Joxemari, kaj eĉ ankoraŭ kelkaj aliaj, kaj ni ne forgesu la ombron de Fernando. Tamen, kiel ni diris, pri tio legu aliloke.

Sed, revenante al nia demando, ni memoru ke specife en la poemaro *Ibere libere* (1993) kaj en la rakontaro *Ekstretoj* (1997), aris, kiel eble jam tradicie en Esperantujo, nur kvaropo.

## SEPA

A: Jes, li tion volis kaŝi ĝis la konfeso ĉilibra, sed ja la honto falu sur lin! Li estis rokulo kaj hipiulo, kia degenerinto! Vidu fotojn 5 kaj 6 en ĉi tiu libro!

La respondo Ĉ ne estas tiel stulta kia ĝi por kelkaj aspektus. "La stultaj infanoj" estas verko de Ana María Matute, kiun Miguel tradukis kaj publikigis en 1988, ene de la serio "Hispana Literaturo" eldonita de Hispana Esperanto-Federacio.

Kaj la demando permesas al ni memorigi ke li estas akademiano de la jaro 2001.

## OKA

B: Tio probable estas pli hontiga ol esti rokulo, sed, jes ja, li estas kemia inĝeniero. Scienco tre gravas por li persone, kvankam ni agnosku ke estas la fikcia parto kiu plej interesas nun, ĉu ne?

## NAŬA

A: La dediĉo de "La letero" en "Ekstremoj" tekstas "Al miaj patrino kaj avino". Fakte, tenere li ĉiam parolas pri sia avino María kaj ofte rakontas simpatiajn anekdotojn. Ekzemple, kiam ŝi fritis ovon kaj la oleo bomb-eksplode ŝprucis, ŝi kutimis diri: "Putinida ovo! Ŝajnas, kvazaŭ ĝi enhavus atombombon!" Li ankaŭ rakontas pri la malbonaj momentoj suferitaj post la milito, kiam la edzo malaperis kaj ŝi devis labori en la trajn-stacidomo kiel valizistino. La avo estis maristo en komerc-ŝipo kaj oni ne scias ĉu dum la milito ĝi estis sinkigita de iu militŝipo aŭ retenita en Rusio. La avino ĉiam atendis vane lian revenon.

## DEKA

Ĉ: Originale, ĉu ne? Ĝi estas ĝis nun lia plej laciga verko. Prezentita en la Hispana Esperanto-Kongreso de la jaro 2002, lia unua ideo estis alnomi ĝin "Amika". Sed fine li rezervis la nomon por la dua eldono. Ĝi estas sen-



dube la plej praktika konsultilo de Esperanto por hispanlingvanoj. Kaj ĝi fiere kompletigas lian gramatikon.

Pri la "Granda Vortaro Esperanta-Hispana", verkita de Fernando de Diego, kaj al kies publikigo Miguel tiom kontribuis, ni esperas ke vi multe aŭdos.

## DEKUNUA

Ĉ: Jes, tiu María Zocato Diez, foje aperanta kiel M. Zocato Diez, foje kiel María Zocato, foje simple M.Z.D. estas pseŭdonimo kiun li uzas ekzemple por la redakto de artikoloj en "Boletín". Temas pri vortludo en rilato kun lia esperanta kromnomo: "zocato" estas ne tre ofta hispana vorto, signifanta "maldekstra, liva", kaj Díez estas tipa hispana familia nomo, sed li skribas ĝin sen korno, kio implicas la vorton "diez", t.e. "dek".

## DEKDUA

B: "La lingua fantastica", unu el la plej indaj verkoj kiuj inversigis la tradician vojon de la esperanta traduko. En tiu ĉi verko, eldonita en Italio zorge de Giulio Cappa, publikiĝis dudeko da sciencfikciaj rakontoj de esperantaj verkistoj, inter kiuj tri de Liven Dek. Ankaŭ tre kompleta enkonduko pri tiu temo "Esperanto, fantasta lingvo" estis de li verkita.

Mankas kompleta listo de ĉiuj verkoj de Miguel tradukitaj en aliajn lingvojn, sed ni menciuj la transversojn

en la hungaran, la finnan, la anglan kaj aliajn simile ekzotajn lingvojn.

### DEKTRIA

C: Miguel transprenis de Antonio Marco Botella la taskon redakti "Boletín", kaj de tiam, kvinfoje jare, li prenas sur sin la pezan kaj laborigan sed tre ĝinde fruktodonan taskon. Ankoraŭ ĝis nun.

### DEKKVARA

A: La aperigo de tiu rakonto en la Nova Krestomatio, redaktita de William Auld, bone pruvas la agnoskon de la Livendeka kariero. Tiu rakonto estas, krome, la plej multe tradukita alilingven.

Pri agnoskoj, ni menciuj ankoraŭ la serion da premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA (1987, 1993, 1995) kaj aliplurloke.

### DEKKVINA

Ĉ: Ni jam menciis la kolekton "Sferoj". Miguel faris imponan laboron ne nur eldone, sed ankaŭ verke kaj traduke. Sferoj 8 konsistis el originala literaturo, kaj Liven Dek kontribuis per la tri menciitaj verkoj. La kvara aperis en la 9a volumo; ĝi estas traduko far Liven Dek de rakonto originala de Rubén C. Tomasi.

## TAKSO

Nun alvenis la momento konfirmi vian fakecon en la Migelukologio. Kontrolu viajn respondojn, kaj kalkulu la trafajn.

1 ĝis 5 trafaj: Ah, ni forgesis averti ke estas malpermesite konkursi ebrie. Postpostebrie vi povas reprovi.

6 ĝis 10 trafaj: Vi ankoraŭ devas multe studi. Komencu per *Sferoj*, kaj post kelkaj semajnoj vi povos alpaŝi al novaj provoj.

11 ĝis 13 trafaj: Bone! Vi jam kompetentas pri Migelukologio, vi jam povas enposteniĝi en la Akademi'.

14 trafaj: Nekredeble! Vi ricevu la unuan katedron de la fako.

15 trafaj: Ĉu eĉ la lasta? Ni avertis vin ke estas malpermesite kaŝrigardi la solvojn antaŭ la kontrolo, trompulo!

## FOTOALBUMO



*1. Kun la patrino, kvar tagojn antaŭ ol iĝi kvarmonat-aĝa.*



*2. Proksimume du-jara Migueluko.*



3. La Unua Komuniigo.



4. "Los Golpes", bando en kiu li muzikis kiam li aĝis ĉirkaŭ dek ok jarojn.



5. *Pligrandigo de la kantisto-gitaristo el la antaŭa foto.*



6. TEJO-estraro enpostenigita dum la IJK en Poitiers, someron de 1977-a de maldekstre dekstren, starantaj: Miguel Gutiérrez Adúriz, Giulio Cappa, Thomas Borrmann, Gert van Tongerloo, Savas Tsiturides, Csaba Lendvay, Floréal Gabalda; kaŭrantaj: Amri Wandel, Brunetto "Bruĉjo" Casini, Stefan MacGill





7. HEJS-a epoko. Tendaro en Santander, ekskurso al Santillana del Mar (1980).



8. Kiu estas Liven Wally\* Dek?



9. Internacia Simpozio pri Sporto. Madrid 1982. Malantaŭ Miguel ludas sin kaŝi petola bubo, Jorge Camacho, tiam 15-jara. Rekoneblas ankaŭ sur la bildo Ada Fighiera, Rafaela Urueña, Luis Hernández kaj Augusto Casquero.



10. Valencia UK, 1993. La Ibera Skolo. De maldekstre: Miguel Fernández, Pedro Villaroig, Liven Dek, Jorge Camacho, Gonçalo Neves kaj Abel Montagut.



*11. Ibera besedo\* en trinkejo de la malnova Madrido. Ĉi tie kuirigis parto de la programo de KEF-2000. De mald-ekstre: Abel Montagut, Gonçalo Neves, Joxemari Sarasua, Liven Dek, Jorge Camacho, Riitta Hämäläinen, Antonio Valén, Ana Manero kaj Miguel Fernández.*

## NOTOJ


Wally: ĉefrolanto de plurtitola porinfana librokolekto verkita de la brito Handford Martin, okulvitrula turisto ĉiam portanta tornistran kaj fotilon, kaŝas sin en plej diversaj homamasoj.

Pluraj el la titoloj enhavas la frazon "Kie estas Wally nun?".

Besedo: pribeletra babilrondo



12. *Prezentado de "Fakistoj", de G. Neves, dum KEF-2000. De maldekstre: Liven Dek, Gonçalo Neves, Jorge Camacho, Miguel Fernández kaj Antonio Valén.*



13. Miguel de Joranta en la budo de HEF  
dum Expolingua-2002.

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

ISBN 91-7303-204-2